

EREVANA ŜTATA UNIVERSITATO  
INSTITUTO DE ARMENSCIENCAJ  
ESPLORADOJ

EDGAR HILZENRAT

# LA FABELO DE LA LASTA PENSO

ROMANO

LIBRO DUA

EREVAN  
ELDONEJO EŜU  
2017

UDC 82-31

Հայերենից էսպերանտո թարգմանեց  
Մասնագիտական խմբագիր՝

**ՍՈՒՍԱՆՆԱ ԳԵՎՈՐԳՅԱՆԸ  
ԵՐՋԱՆԻԿ ԳԵՎՈՐԳՅԱՆ**

**ՀԻԼԶԵՆՐԱԹ ԷԴԳԱՐ**

ՎԵՐՋԻՆ ՄՏՔԻ ՀԵՔԻԱԹԸ: ՎԵՊ/Է. Հիլզենրաթ: -Եր.: ԵՊՀ հրատ., 2017, 176 էջ:

Գերմանագիր հրեա էդգար Հիլզենրաթի այս վեպը նվիրված է 1915 թ. Հայոց ցեղասպանությանը: Այն լույս է տեսել 1989 թ. և նույն տարում արժանացել «Ալֆրեդ Դյոբլին» մրցանակի:

Esperantigis: doktorino **SUSANNA GEVORGJAN**  
Speciala redaktoro: **JERĜANIK GEVORGJAN**

**Hilzenrat E.**

La fabelo de la Lasta Pesno. Romano (Edgar Hilzenrat), esperantigis S. Gevorgjan. Eldonejo de Erevana Ŝtata Universitato. 2017j, 176 paĝoj.

Origine judo Edgar Hilzenrat estas germanskribanta verkisto. Li naskiĝis en Lejpcigo, en 1926. En 1938-a jaro li elmigriĝis el Germanio kaj, trapasinte multajn landojn, en 1951 ekloĝis en Usono. En 1975 Edgar Hilzenrat revenis Germanion – Berlinon. Jam estinte aŭtoro de kalkaj romanoj, Hilzenrat en 1989 eldonis tiun ĉi romanon, dediĉitan al Armena genocide. La verko tuj meritis al premion “Alfred Djoblin”. Unu el herooj de romano Tovma Ĥatisjan - filo de ĉefa hero, naskiĝis en 1915 dum la tagoj de Armena Granda masakro – dum la deviga perforta elpelado el patrujo, kaj mortis en 1988, en jaro de masakro en azerbajĝana urbo Sumgaito. El lia lasta penso naskiĝas kruela fabelo. Pere de dialogoj inter la fabelisto kaj la heroo antaŭ ni reviviĝas teruraj eventoj de Granda masakro. La romano estas tradukita en multnombrajn lingvojn.

ISBN 978-5-8084-2181-3  
© “Eldonejo de Erevana Ŝtata Universitato”, 2017  
© Susanna Gevorgjan, 2017

# LIBRO DUA

## 1.

Dum ĉi tiu tempo via patro ree estis kuŝinta sur la mato en mallibereja kamero. Li sciis, ke la mjudiro intencas lin konduki en Konstantinopolon, por ke li antaŭ tutmonda socio donu depozicion pri tio, ke en ĉiuj aferoj kulpuloj estas nur armenoj. Do, iutage oni lin kondukos en Konstantinopolon, sed ĝis la tiu tago pasos multaj tagoj, kaj eble oni plu ne bezonos lian depozicion, ĉar povas esti, ke dum tiu tempo konstantinopolaj sinjoroj trovos aliajn atestantojn – por tute alia kredinda akuziĝo.

Via patro ne povis dormi. Li pensadis pri sia nenaskita filo Tovma – iutage venonta en nian mondon sub la vito. Kaj li subite ekpensis: “Mi ankaŭ naskiĝis sub vinbera vito, sed ne tiel, kiel en tia inkubsonĝo, pri kiu terure rakontis la fabelisto. Tio estis malvera fabelo pri miaj patrinaj mamoj – krevitaj pro lakto”.

- Ne... ne! Liaj patrinaj mamoj neniam krevis. Mamoj de lia patrino ne krevis, - diris la fabelisto al la Lasta Penso. - Tio estas mensogo.

- Ĉu vi parolas pri mamoj de mia avino – plenitaj de lakto?

- Jes, Tovma, - kapjesis la fabelisto. - Mi parolas pri mamoj de via avino – plenaj per dolĉa lakto.

- **Estis, ne estis, estis** unu knabo, - diris la fabelisto. - ... dume ne naskita li kuŝis sub la vito. Li estis via patro, Vardan.

- **Estis, ne estis, estis** unu virino. Ŝi estis graveda, en naŭa

monato. Kiam la amoza kaj netoleranta Dio kreis turmentadon, kiun la popoloj nomas naskdoloroj, kaj kiam ŝajnis, ke ŝia korpo ekkrevos, ŝi diris al sia edzo:

- Vi rapide jungu azenon, ni sidu en azenĉaron, veturu alporti nian Vardan, ĉar li kuŝas sub la vito kaj plu ne volas atendi!

- Kie estas lia vito?

- Ĝi estas en lando de vitoj.

**Estis, ne estis, estis** unu azeno. Ĝi kuradis rapide, kiel araba ĉevalo. Ĝi, kiel la vento, rapide alportis la gravedan virinon kaj sian edzon en landon de vitoj.

Dum veturado la mamoj de gravedulino ŝvelis, sed ne krevis, ĉar la Dio volis, ke la lakto atendu.

**Estis, ne estis, estis** unu graveda virino. Ŝi kun sia edzo ĝustatempe alveturis en landon de vitoj. Kaj ŝi vidis la viton, kreskintan kiel lulilo por naskoto. Pli frue la virino ekvidis la viton, la patrina vidpovo estas pli forta, ol la patra. Ŝi kuregis al la vito, kaj la edzo kuris post ŝi. Vidante kiel edzino ĉirkaŭprenis knabeton, la edzo ekploretis kaj diris:

- Tiu povas esti nur nia Vardan.

Tiu estis eta Vardan. Nenia dubo estis, ĉar la edzino subite plu ne estis gravedulino.

- Via granda ventro malaperis! - eksklamis la edzo.

- Miaj doloroj ankaŭ malaperis, - diris la edzino.

Ili lavis etan Vardan en fonteto apud la vito. La feliĉa virino ekridis. La viro ankaŭ ekridis. Poste, kiam la virino proksimigis etan Vardan al siaj laktaj fontetoj, malfermiĝis la mampintoj.

Kaj eta Vardan trinkis dolĉan lakton de sia patrino. Kaj liaj gepatroj dankis al amoza Dio, ĉar la lakto atendis.

Dum reveno patrujan vilaĝon la azeno ne rapidis. Ili demontiĝis. La ĉirkaŭaĵo rimarkeble estis pli malriĉa, montpiedoj – senarbaraj. Kaj brilis malglataj, multkoloraj rokoj. Baldaŭ la lando de vitoj restis malantaŭe en malproksimo. La azena vojeto, tra kiu ili veturis, malaperis en altaj montoj, kies pintoj estis en nuboj. Ili ne stimulis azenon, ĉar nun jam ne rapidis. Ili ankaŭ ne bezonis montri direkton, ĉar la azeno sciis sian vojon. Post kelkaj horoj ili decidis ripozi. La viro eligis akvan felsakon de sub ŝaflana kuseno kaj branĉoplektitan korbon kun pano. Ili trinkis el felsako – plenita per freŝa fonta akvo de lando de vitoj, manĝis lavaŝ – bakitan de virino hejme, en toniro. Poste, kiam ili jam manĝis kaj trinkis, la viro deprenis infaneton, ekridis kaj levis super sia kapo.

- Ĉu vi pensas, ke nia Vardan scias kie nun li estas?

- Ne, - diris la virino, - redonu infaneton.

- Li devas scii, ke li estas en lando de niaj antaŭuloj, - diris la viro.

- Por li tio estas tute egale, - diris la virino, prenis infaneton, premis al siaj mamoj – plenaj per lakto kaj daŭrigis, - la infano devas nur scii, ke estas ĉe sia patrino. La restitoj estas tute egalaj por li.

- Kaj kiel estas la demando koncerne patro?

- Certe, - diris la virino, - li ankaŭ devas scii, ke estas ĉe sia patro.

- Kiam nia Vardan komprenetos kion vidadas, mi plezure montros ĉirkaŭaĵon al li, - diris la viro.

- Sed liaj okuloj ankoraŭ estas duonfermitaj, - rimarkis la virino, - ĉar la amoza Dio ne volas, ke li tuj vidu multon, ĉar povas teruriĝi.

- Sed vi lavis liajn okulojn.

- Mi nur lavetis okulojn.

- Kiam li tute malfermos siajn okulojn koni la mondon?

- Verŝajne post kelkaj tagoj, - diris virino.

- Se nia Vardan povus kompreni min, kaj se li havus aglajn

okulojn, mi dirus al li: “Rigardu, Vardan! Tiu ĉi estas lando de niaj antaŭuloj”. Poste mi montrus orienten kaj dirus: “Ĉu vi vidas tiun grandan neĝkovritan monton? Ĝi estas monto Ararato!”

- Sed li ne havas aglajn okulojn kaj tute ne komprenus, kion vi diras al li. Do, kia senco estos, se vi montros al li landon de niaj antaŭuloj.

- Ne ĉio havas sencon.

- Do, ĉu vi devas montri al li monton Araraton?

- Jes.

- Kion ankoraŭ?

- La urbon Bekiron, - diris la edzo kaj per fingro montris sud - orienten – ankaŭ urbon Erzrumon, kiun oni povas atingi dum kelkaj tagoj de Bekiro per azenĉaro. Mi montros al li ankaŭ armenan reĝan urbon Anion, urbon havantan mil kaj unu preĝejojn. Kaj diros al li: “Anio estas urbo de ruinoj. Anio estas mortinta, kiel estas mortinta armena regno, regno de diino Anahit kaj regno de unuaj kristanaj preĝejoj”.

- Ne, - oponis la edzino, - nia pastro Gabriel Hamadjan diris: “La armena regno ne estas mortinta”.

- Sed kie tio estas, se ĝi ne estas mortinta?

- Ĝi ŝajnas mortinta, - diris la edzino.

- Kaj kiu diris tion?

- La pastro Gabriel Hamadjan.

- Kaj al nia filo Vardan mi montros ĉiujn armenajn vilaĝojn kaj urbojn, ĉiujn en ĉi tia regiono. Jen tiel. Turkoj ĉion forprenis de ni. Ekzemple urbon Urfaon, Diarbekiron kaj iomete malproksime urbon Koniaon, ankaŭ urbon Svason. Kaj se nia Vardan demandus, ke kiel nomiĝas ĉi tiuj montoj? Mi dirus al li: “Mi ne scias, filo mia. Iuj ilin nomas kurdaj montoj, alioj – montoj de **Hajastan**.”<sup>1</sup> Sed unu scienculo el Frankistano, foje estinta en nia vilaĝo, al nia vilaĝestro – muĥtaro Jeprem Abovjan, montris neordinaran geografan mapon, kaj diris: “Ĉi

---

<sup>1</sup> Armenio /armene/.

tiu estas Armena montplato, ĝi situas en Turkio, sed daŭras ĝis rusaj kaj persaj limoj, eĉ ĝis Kurdistano”.

Kaj mi dirus al Vardan: “Ĉu vi vidas tie – malsupre, riveron, tio estas Karasuo, tie fluas ankaŭ rivero Murato. Nemaalproksime ĝi fluas riveroj Eŭfrato kaj Tigriso. Kaj se ni per azenĉaro atingu ĝis alia flanko de monto, ni irus en Malatiaon. Finiĝas la montoj, la tero iĝas tiel glata, kiel mia manplato, kaj tie estas tre varma. Por ke trapasi ĝin, oni bezonas akvon da sep felsakoj. Mi pensas, ke tiu lando nomiĝas Mezopotamio”.

Kaj mi dirus al li: “La armenoj vivas ĉie, sed pli multe en nia regiono. Ĉi tie ankaŭ vivas turkoj, ciganoj, kurdoj, persoj, araboj, judoj, grekoj kaj satanokultistoj, kiujn oni nomas jezdiroj kaj multaj alioj. Vi ne devas timi plej parton de ili, sin gardu nur, kiam renkontas turkojn kaj kurdojn”.

- Vi pravas, - diris la edzino. - Tuj, kiam li povos rekte rigardi mondon kaj komprenos, kion mi diras al li, havos unuajn dentojn kaj povos paŝi – movante piedetojn, ni diros al li: “Sin gardu, kiam vi renkontos turkojn kaj kurdojn”.

- Kaj kion vi diros pri satanokultistoj? - diris la edzino. - Ĉu vere ili povas sorĉi aŭ malicokuli nian Vardan?

- Ne, - diris la edzo, - tio estas malĝusta, ili ne povas sorĉi Vardan, kaj same ne povas malicokuli la ciganoj.

- Sed kiuj povas lin malicokuli? Ĉu ankaŭ turkoj aŭ kurdoj?

- Ne, - diris la viro, - ili povas fortranĉi lian kapon aŭ simple batadi lin ĝis morto.

- Kaj kiuj povas malicokuli lin?

- Nur homoj – havantaj malicajn okulojn. Kaj tiaj estas en ĉiuj popoloj, - diris la edzo.

- Ĉu ankaŭ en armenoj?

- Ankaŭ en armenoj.

- Tion mi scias delonge, - diris la edzino.
- Tiam vi ne demandu min, - diris la edzo.

Post la manĝo la edzo deziris fiŝon kaj pro tio diris al sia edzino:

- La lavaŝ-pano ne satigis min. Nun mi povas manĝi grandan fiŝon, kaj mi vetas, ke tion povas ankaŭ nia malgranda Vardan.

- Mi vetas, ke li tion ne povos, - diris la edzino.

- Ĉiufoje, kiam mi pensas pri grasa fiŝo, mi memoras armenan grandan lagon, nemalproksime rusa limo.

- Ĉu vi parolas pri la lago Vano, nemalproksiman de mia frata domo, tiom, ke oni povas ĝis lago fumi du cigaredojn?

- Mi ne parolas pri tio, - diris la edzo, - ĉar temas pri lago, kiun mi vidis lastatempe. Tiu ne povas esti la lago Vano. Ja mi vizitis domon de via frato – vivanta nemalproksime. Sed jam pasis kelkaj jaroj, kaj mi ne vidis vian fraton.

- Do, tiu estis alia lago.

- Estis alia lago, - diris la edzo, - mi nur forgesis ĝian nomon. Ĉar ĉiuj lagoj de tiu ĉi regiono estas armenaj, nomo ne gravas. Tio estis armena lago.

- Kaj kio okazis tie? - demandis la edzino.

- Nenio grava, - diris la edzo.

Kaj la edzo diris:

- Tio estis nedelonge. Jam dumonate vi estis graveda – atendente nian filon Vardan. Mi surzeniĝis kaj tritage rajdis tra montoj. Mi pasis multajn fruktodonajn valojn. Mi rajdis preter riveroj kaj kelkaj grandaj kaj malgrandaj lagoj.

- Sed tio ne povis okazi, - diris la edzino, - ĉar dum lastaj du jaroj vi tute ne foriris el la vilaĝo.

- Tamen estas tiel, - diris la edzo.

- Vi verŝajne nur revis.

- Tio ankaŭ eblas, - diris la edzo.

- Kaj la edzo diris:



- Tiel mi atingis ĝis tiu granda lago. Tie mi renkontis fiŝkaptiston, ĵetantan en lagon fiŝreton. Lia nomo estis Petr[os]<sup>2</sup>, sed li sin nomis Bedros, ĉar li estis okcident armeno.

- Ĉu Bedros?

- Jes. Bedros.

- Kaj kio okazis kun tiu fiŝkaptisto?

- Nenio grava. Li nur diris: “Ĉu vi aŭdas, kiel la fiŝoj interparolas?”

“Ne, mi ne aŭdas”, - diris mi.

“Ili ĉiuj parolas armene”, - diris la fiŝkaptisto.

“Do, ili estas armenaj fiŝoj”, - diris mi.

“Estas tiel, - diris la fiŝkaptisto.

“Turkoj insistas, ke tiuj estas turkaj fiŝoj, - diris la fiŝkaptisto, - sed mi scias, ke ili estas armenaj, ĉar mi komprenas iliajn lingvojn”.

“Jes”, - diris mi.

La floroj de ĉi tiu regiono ankaŭ parolas armene, same la herboj, eĉ la vento – ŝancelanta arbajn pintojn, kaj kantanta lulkantoj por tiuj pintoj”, - diris la fiŝkaptisto.

“Ĉu turkoj tion scias?” - demandis mi.

“Ili scias, sed ne konfesas”.

- Kaj kion pri la grasa fiŝo? - demandis la edzino.

- Nu, tio estis la grasa fiŝo, - diris la edzo.

- Pri kiu grasa fiŝo temas?

- Pri tiu grasa fiŝo – poste kaptitan de fiŝkaptisto por mi.

- Rakontu por mi pri tiu fiŝo. Ĉu ĝi vere estis grasa?

- Jes, - diris la edzo.

- La fiŝkaptisto rakontis por mi historion, - diris la edzo, - tiu estis historio de grasaj fiŝoj.

- Rakontu por mi tiun historion.

- Jes, - diris la edzo. - Mi rakontos por vi historion, kiun por mi

---

<sup>2</sup> Laŭ armena orfografio.

rakontis la fiŝkaptisto.

- Iam estis armena diino. Ŝi nomiĝis Anahit. Ŝi sidiĝis sur roko en akvoj de Eŭfrato kaj kombis siajn silkajn harojn. Kaj ĉiufoje falintajn harojn de ŝia kapo, la vento forportis.

- Kien forportis harojn la vento?

- Ĝi forportis malproksime kaj tamen ne tiom malproksime, ĉar ili ne devas eksteriĝi el armenaj limoj.

- Ĉu verŝajne la haroj haltis ie en aero?

- Ne, - diris la edzo. - La haroj malleviĝis kaj falis ĉiam en akvon aŭ de rivero, aŭ de lago, aŭ de lago, iam falis en maron.

- Kaj kion volis la haroj?

- Ili volis nutri fiŝojn en akvoj.

- Ĉu vi scias, kion diris al mi la fiŝkaptisto? - demandis la edzo.

- Ne, - diris la edzino.

- Li diris: "Tio estis la kaŭzo, ke en ĉi tiu regiono la fiŝoj estas tiaj grasaj kaj nekalkuleblaj, ĉar Anahit estas diino de fruktodoneco kaj patrineco".

"Kiom da infanojn vi havas?" - demandis la fiŝkaptisto Bedros al mi.

"Dekunu infanojn, - diris mi, - baldaŭ havos dekduan, ĉar mia edzino denove estas graveda".

"Ĉu estos virseksa ido?" - demandis la fiŝkaptisto.

"Mi esperas, ke estos knabo", - diris mi.

"Kiel vi nomos lin?"

"Mi mian filon nomos Vardan".

"Vardan estis armena heroo, - diris la fiŝkaptisto, - en 451-a jaro li kun siaj 60 000 armenoj batalis kontraŭ persa ŝtato. Ĉu vi scias lian batalvokon?"

"Ne, - diris mi, - kiel mi povas scii tion?"

"Je la nomo de Armenio kaj je la nomo de Kristo". Tio estis batalvoko", - diris la fiŝkaptisto.

“Do, ĉu li estis armena heroo?”

“li estis persono – elektita de Kristo”.

“Ĉu vi volas, ke via filo ankaŭ iĝos heroo?”- demandis la fiŝkaptisto.

“Ne, - diris mi, - la herooj mortas en juna aĝo, kaj mi deziras, ke mia filo maljuniĝu”.

“Tiam li ne devos iĝi heroo”.

“Estas ĝuste, - diris mi, - li ne devos iĝi heroo “.

“Li devas iĝi fiŝkaptisto, - diris Bedros, - kiel mi. Se li iĝos fiŝkaptisto neniam turmentos pro malsato”.

“Sed mi deziras, ke li iĝu vilaĝano”, - diris mi.

“Li devas iĝi fiŝkaptisto”, - insistis la fiŝkaptisto.

“Armena vilaĝano havas multajn zorgojn, - diris la fiŝkaptisto, - li estas dependata de suno kaj de pluvo, ankaŭ de turkaj impostkolektistoj, de kurdaj begoj, kiuj ankaŭ siavice postulas impostojn, se ne, iliaj rajdantoj forpelas brutaron de armenoj, aŭ forportas virinojn, aŭ bruligas domojn”.

“Vere, ili bruligas domojn, - diris mi, - ili povas forpeli vilaĝanon de lia terpeco”.

“Tion ankaŭ ili povas. KREDU min, estos pli bone, ke via filo iĝu fiŝkaptisto “.

“ Do, li iĝu fiŝkaptisto”.

“Jes”, - diris la fiŝkaptisto.

“Kaj la fiŝkaptisto kaptis por mi plej grasan fiŝon – viditan mi”.

Li tranĉis kapon de fiŝo kaj diris al mi: “Ni rostos tiun per rostostango kaj tuj manĝos, ĉar fiŝon bezonas manĝi nur en freŝa stato”.

“Jes”, - diris mi. Poste mi diris: “Bedaŭrinde mia filo Vardan ne povas manĝi ĉi tiun fiŝon”.

“Li kaptos kaj manĝos aliajn fiŝojn”, - diris la fiŝkaptisto.

“Ĉi tiun grasan fiŝon mi kun plezuro tenus por Vardan, sed mi

komprenas, ke tion ne eblas”, - diris mi.

“Ne eblas, ĉar mortinta fiŝo post tri tagoj odoraĉas, - diris fiŝkaptisto, - kiel subrobo de kurdino vintre, ĉar la kurdoj laviĝas nur somere, kiam povadas sin bani en rivero”.

“Estas tiel”, - diris mi.

Kaj la fiŝkaptisto diris:

“Via filo Vardan kaptos kaj manĝos aliajn fiŝojn”.

La edzino diris:

- Li iĝu fiŝkaptisto.

- Jes, - diris la edzo.

- Post la baptego ni metos fiŝhokon en lia lulilo, - diris la edzino.

- Tio estas bona penso, - diris la edzo. - Li ekde infaneco devos kutimiĝi al fiŝhoko.

## 2.

- Estas ĝuste, - diris la fabelisto al la Lasta Penso. - Kiam la pastro Gabriel Hamadjan baptis vian patron, la patrino tuj metis fiŝhokon en lulilon. Mi devas priskribi por vi tiun lulilon, kie dormis via patro, se jam ne dormis inter siaj patrinaj grandaj mamoj – plenitaj de lakto.

- Jes, Meddah.

- Juĝante laŭ unua rigardo, tio estis ordinara lulilo, kolombeto mia, kesto kun truo por elfluo de ekskremento, ĉar nenia bebeto en lulilo ne restas pura, eĉ nomita Vardan – kun nomo de heroo, malgraŭ ne iĝos heroo. Via avo rimede siaj manoj preparis la lulilon por sia unua filo. Poste dormis en ĉi tiu lulilo ĉiuj infanoj, ĉar kreskinte ĉiu el ili sian liton lasis kiel heredaĵo por sekvonta infaneto.

- Do, ĉu nenia grava io estis en tiu ĉi lulilo?

- Kiel ne, ŝafideto mia. Via avo sur kapapogilo de lulilo skulptis kolombon – kun olivarba branĉeto en beko.

- Kaj kion tiu signifas?

- Tiu estis kolombo de Noa arkeo –fluginta de kresto de monto Ararato al montbaza lando – al lando, iutage nomita Hajastano – alporti olivarban branĉeton, kiel signo, ke la diluvo estas finiĝita.

En familio de Ĥatisjanoj estis tradicio: la avino devas luli novnaskiĝiton, ĉar lia patrino dum tuta nokto ne dormis, estis ĉe la lulilo de bebo aŭ simple ŝi laciĝas pro ofta nutrado per mamoj. Por lia avino luli estis kutima afero. Sed ĉar ŝi ne volis senĉese sidi apud la lulilo, ŝi kun longa ŝnuro ligis sian piedon kun lulilo. Tiel ŝi povis paŝi tra la tuta domo aŭ korto, ankaŭ sidi antaŭ domo, interparoli kun najbarinoj. Sufiĉis iomete altiri longan ŝnuron aŭ movigi piedon – por trankviligi kriantan infanon.

- Ĉu mia patro havis avinon?

- Kia demando estas tio, ŝafideto mia, ĉiuj infanetoj havas avinojn.

- Vere, nenia grava io estis pri tiu lulilo, - diris la fabelisto. - En ĝi estis plenita mola sablo, kiun la avino ŝanĝadis, kiam ĝi tre malsekiĝis. La lulilo havis ankaŭ truon, rimede kiu oni ŝparis sablon. Pri tio mi jam rakontis. Ĝi estis vera armena vilaĝa lulilo – preparita kun amo kaj antaŭvideco. Tiel, nenia grava io estis rilate nek lulilo, nek via patro, kiu ploris, aŭ kriis, aŭ skuis siajn manojn kaj piedojn, aŭ kuŝis trankvile, kiel ĉiuj infanetoj. Via patro estis humila infano. Dum unuaj tagoj de sia vivo li dormadis profunde, ridetis dum dormo kaj sonĝis pri patrinaj grandaj mamoj – plenitaj de lakto, iomete pri la longa avina ŝnuro, per kiu ŝi movis la lulilon, verŝajne sonĝis ankaŭ pri kolombo kun olivarba branĉeto en beko, pri monto Ararato kaj pri Lando Hajastano, malgraŭ mi dubas pri tio.

Kiam devus naskiĝi via praavino (mi konsideras la avinon de via patro), ŝia patro diris al sia edzino: “Se ni havus filon, kaj mi esperas, ke ni havus filon, ni nomos lin Tigran, ĉar Tigran estis armena reĝo. Se ni havus filinon, ni nomus ŝin Satenik, ĉar Satenik estis armena

reĝino”.

Sed lia edzino diris: “Ni havos filinon, mi sentas. Sed ŝi ne iĝos reĝino. Pli bone estas, ke ni ŝin nomu Hamest”.

“Sed kial nepre Hamest?”

“Ĉar mi sentas, ke oportune estos ŝin nomi Hamest”, - diris via praavino.

- Hamest armene signifas modesta, - diris la fabelisto. - Kaj ĉar vere ili havis filinon, ŝin ili nomis Hamest.

- Ĉu ŝi estis modesta virino? - demandis la Lasta Penso.

- Ne, - diris la fabelisto, - ŝi estis ĉia, sed ne modesta. Jes, ŝi estis vera Kerbero – ĉirkaŭ reginta ĉiujn. La gepatroj devis nomi ŝin Tsovinar. Tiu nomo armene signifas nimfon de maroj kaj samtempe ankaŭ fulmon sen tondro.

- Ĉu ŝi similis sentondran fulmon?

- Jes, - diris la fabelisto. - Al impulsoj de ŝia pasia temperamento neniu reagis. Neniu ekscitiĝis, kiam ŝi riproĉis, ĉar oni sciis, ke ŝi deziris bonon.

- Ĉu ŝi estis bonkora koncerne mia patro?

- Ŝi estis bonkora koncerne via patro.

- Kaj ĉar ŝi ricevis eraran nomon, - diris la fabelisto, - iutage, kiam ŝi devis gravediĝi, t. e. nokte post edziĝfestoj, diris al sia edzo: “Vere, mia nomo devus esti Tsovinar, sed tio ne estas mia nomo”.

Kaj la edzo diris: “Se la Dio punus nin, kaj ni ne havus filon, sed havus filinon, ni ŝin nomus Tsovinar”.

- Sed estis alimaniere, - diris la fabelisto. - Ili neniujn siajn infanojn nomis Tsovinar, ĉar ju pli multe ili pensadis pri tio nomo, des pli ĝi malplaĉis al ili. Kiam la amoza Dio al ilia filo Hakob donacis edzinon kun nomo Tsovinar, Hamest diris al sia edzo: “Tamen, mi scias, kial ni havas unu Tsovinar. Ĉu vi memoras? vere, tiun nomon mi deziris havi”.

- Do, estis tiel, - diris la fabelisto. - Hamest havis bofilinon kun

nomo Tsovinar. Kaj Hamest diris al sia edzo: “Ĉi tiu nomo, laŭ mia opinio, konformiĝas al ŝi. Estas ĝuste, la edzino de nia Hakob estas fulmo sen tondro”. - Sed Hamest eraris, ĉar Tsovinar same havis eraran nomon. Ŝi estis modesta virino kaj al ŝi konformiĝis la nomo Hamest.

Malgraŭ sia pasia temperamento aŭ ĝuste pro tio, la avino de via patro havis ne rimarkeblan vidaĵon. Ŝi havis malaltan staturon, kiel nanoj, estis malgrasa, kiel kurda nigra monta kaprino, kun impulsiĝemaj movoj kaj tiel malmola, kiel malfacile digestata **basturma**<sup>3</sup> (la nekuirita presita sekigita viando) en vilaĝanaj staploj. Kaj por ke defendi sin de malicaj spiritoj kaj okuloj, ŝi ĉirkaŭ sia kolo portadis surfadenigitajn ajlerojn. Kaj pro tio ŝi ĉiam ajlodoris. Tio iujn forpuŝis kaj kontraŭe – ekscitis apetiton de iuj, ĉar la ajlo estas ŝatata spico por multaj homoj. Via patro ĉiufoje ekĝemploris, kiam la avino proksimiĝis al lulilo kun ŝancelitaj ajleroj, ŝi sin kliniĝis al li kaj diris: “He, mia sentima paŝao! Se vi ne estus bravulo, la kurdoj forŝtelos vin. - Poste ŝi ridetante aldiris, - aŭ la granda urso”.

Pasis malmulta tempo post bapteco. Via patro ankoraŭ estis tre malgranda diferencigi bonon kaj mablonon, aŭ kompreni kial la avino portadas surfadenigitajn ajlerojn ĉirkaŭ sia kolo. Li nur sciis, ke unu el flegantaj virinoj ajlodoras, sed alia virino odoras dolĉan lakton. Kaj tute kompreneble, ke li siajn manetojn kun plezuro etendis al la patrino.

La patrino ne nur odoris lakton. Ŝia vidaĵo ankaŭ similis melkatan bovinon. Kaj pro tio ŝi estis kontraŭaĵo de la avino, car la patrino estis grasa kaj dika, kun plenaj kaj ŝancelitaj mamoj. Ŝi paŝis tien kaj reen apud la lulilo. Kiam ŝi kliniĝis al la lulilo, siaj movoj estis glataj, kaj la teneraj vortoj, flustritaj ĉe oreloj de la eta Vardan, murmuris kiel fluetoj

---

<sup>3</sup> Tatara.

de lakto, melkataj en ligna bareleto. Dolĉa estis ŝia bonodoro. Kaj estis nenio mirinda, ke por eta Vardan estis tre plezure, kiam la patrino proksimiĝis al lulilo, tenere ĉirkaŭprenis lin por nutri.

La voĉo de la fabelisto estis serioza. Li diris:

- Ĉiuj armenaj infanoj dum unuaj 40 tagoj de sia vivo troviĝas en grandaj danĝeroj. Dum unuaj 40 tagoj la patrino ne rajtas lasi infanon sole. Malgraŭ, vere, la avino lulas infanon rime de longa ŝnuro, ankaŭ kiam ŝi ne estas en ĉambro, kiel mi jam diris, tamen la patrino ĉiam sidadas proksime. La infano kaj lia patrino dum unuaj 40 tagoj ne rajtas eliri el ĉambro, krom tago, kiam okazas baptecio, ĉar ambaŭ devas ĉeesti en preĝejo.

- Kial la armena infano dum unuaj 40 tagoj de vivo troviĝas en grandaj danĝeroj? - demandis la Lasta Penso.

- Pro malicaj spiritoj, ŝafideto mia. Multajn spiritojn konas la armenoj. Ekzistas drakoj, demonoj, diabloj kaj multaj alioj. Certe ankaŭ ĝinoj, ekziston de kiuj la turkoj ankaŭ kredas. Multoj el ĉi tiuj spiritoj divenas rime de hepatoj de malgrandaj infanoj, kiujn ili forŝtelas kaj manĝaĉas, se la patrino troviĝas malproksime. Tia eventualaĵo okazis en vilaĝo, pri kiu dum jaroj daŭre flustradas homoj.

- Kia eventualaĵo okazis, Meddah?

- Vere, ĉu taŭgas rakonti por vi?

- Jes, Meddah.

- Antaŭlonge, kiam armenoj inter aliaj popoloj unue akceptis kristanisman, sankta Grigor ordonis ruinigi templojn de persaj fajrokultistoj en urbo Vagharŝapato (nun – Eĝmiatsin) kaj sur la sama loko konstrui unuan kristanan ŝtatan preĝejon en mondo, kaj tian gracion, ke arkitektoj de reĝaj palacoj pro envio paliĝis. La urbo kaj la preĝejo ekzistas en niaj tagoj. Aliaj temploj de tie devenas la sanktan



oleon – **mjuron**<sup>4</sup>, kiun uzas ankaŭ dum baptecoco... Nu, ŝafideto mia, - diris la fabelisto, - la najbaro de Ĥatisjanoj havis etan knabinon, kiun nomis Taguhi, kiu armene signifas reĝino. Oni la patrino de eta knabino avertis kaj diris: “Dum unuaj 40 tagoj la infano ĉiam devas esti videbla por patrino. Ne forgesu, ke la spiritoj vivas en mallumo kaj koleras, ĉar vi havas tian miraklan infanon kaj ŝi estis nomita Taguhi...”. Sed tiam la patrino de infano ridis kaj diris: “Nenio okazos kun mia eta knabino, ĉar la pastro Gabriel Hamadjan ŝin baptis en bapta baseneto – plenita per mjurona akvo”.

Kaj kiam oni demandis patrino: “Ĉu vi banis infanon post tio?” Ŝi ridante respondis:

“Certe, mi banis”.

“Kaj ĉu la akvo estis oleoza?”

“Certe, estis oleoza, ĉar la spuroj de sakramenta mjurono estis en akvo”.

“Ĉu tiu estis sakramenta akvo?”

“Certe, tio estis sakramenta akvo”.

“Kaj kion vi faris tiun sakramentan akvon? Ĉu vi akvon elverŝis?”.

“Mi ŝprucigis ĝin ĉirkaŭ la domo”.

“Ĉu kontraŭ ĝinoj?”.

“Certe, kontraŭ ĝinoj”.

“Kaj ĉu vi pensas, ke la ĝinoj timas kristanan sakramentan akvon?”.

“Certe, ili timas”.

- Kaj tiel okazis, - daŭris la fabelisto, - ke la patrino ofte lasis sian infaneton sole. En lulilo de knabineto ŝi metis Biblion, de la pordo dependis ajleran ringon kaj kelkajn hufferojn de porda superparto tiel, ke iliaj randoj estis direktitaj al tero, por ke ĉiujn ĉambrojn defendi de la malicaj spiritoj. Antaŭ la lulilo ŝi metis balailon, ĉar la ĝinoj timas

---

<sup>4</sup> Sakramenta materio, preparita el oliva oleo, balzamo kaj pli ol 40 aliaj sanigaj bonodoraj kreskaĵaj komponentoj.

balailon kaj bastonon, sed nenio helpis.

- Kiel nenio helpis?

- Jen tiel, ŝafideto mia, - diris la fabelisto. - lutage la patrino revenis de fonto, kie ŝi ne rapidinte interparolis kun pliaĝaj virinoj, revenis kaj vidis...

- Kion ŝi vidis?

- Ke la infano estis malaperita.

- Ĉu la infano estis malaperita?

- Simple malaperis. Plu neniu vidis ŝin.

- Mi imagas, - diris Meddah, - ke mi – la fabelisto, antaŭe multaj jaroj estis sidinta apud via patro. Li estas trisemajnaĝa kaj rigardas al mi per siaj grandaj kaŝtankoloraj armenaj okuloj. “He, vi, eta fekanto, - diras mi al li, - ĉu vi ne timas?” Kaj via patro, ankoraŭ nepovanta paroli, diras al mi: “Kiun mi devas timi, Meddah? Ja mia avino rimede longa ŝnuro lulas min, kiam mia patrino ĵus iras en stalon – urini. Sed ŝi tuj revenos nutri min”.

“Ĝuste, - diras mi al li. - Vi tute pravas. Sed ĉu vi ne scias, ke patrinoj dum unuaj 40 tagoj de vivo de infanoj ne devas ilin lasi sole eĉ unu sekundo. Nur unu sekundo sufiĉas, por ke la infano eterne malaperiĝu”.

Via patro demandas: “Ĉu min forŝtelos la ĝinoj?”

Kaj mi diras: “Jes, la ĝinoj revas manĝi vian hepaton. Estu atenteme. Via patrino iris en stalon urini kaj kiam revenos, vi verŝajne plu ne estos ĉi tie, ĉar la ĝinoj forŝtelos vin”.

Sed via patro ridas kaj diras: “Ne, la ĝinoj ĉi tie estas malpotencaj, ĉar la pastro Hamadjan baptite min ŝmiris sakramentan oleon – mjuronon sur mia korpo. Post tio mia avino min banis kaj akvon kun sakramenta oleo ŝprucis ĉirkaŭ la domo. La ĝinoj ne povas pasi tiun influan ringon. Kaj ĉu vi scias kial?”

“Ne, - diris mi, - mi ne scias kial”.

“Ĉar Jesuo Kristo defendas min”.

“Nu, mi ne scias, - diras mi. - Ne ĉiam Kristo estas tie, kie oni bezonas Lin. Multaj armenaj patrinoj provis sakramentan oleon –

mjuronon, sed malgraŭ tio la ĝinoj forŝtelis iliajn infanojn”.

- Mi rakontas por via patro, kio okazis, kiam lia patrino gravedis je dekdua fojo: “La azena vojeto kondukas eksteren vilaĝo, - diras mi, - kaj se oni frumatene iru direkten la suno, daŭre fumado de dekkvin cigaredoj, oni atingus kabanon, kie vivas maljunulino Bjulbjul<sup>5</sup>”.

“Ĉu Bjulbjul?” - demandas via patro.

Kaj mi diras: “Jes. Najtingalo estas ŝia nomo. Simple – Bjulbjul. Kaj ĉu vi scias kial?”

“Ne”, - diras via patro.

“Ĉar ŝi estas akuŝigino kaj kantas, kiam la akuŝantino krias. Ŝi tiel obstine kantas, ke la akuŝantino pensas, ke aŭdas sian propran voĉon... kaj tiel longe ŝi kantas, ĝis la infano naskiĝas”.

“Ĉu ŝi kantas kiel najtingalo?”

“Ne! ŝafideto mia, - diras mi. Ŝia voĉo estas tiom malplezura, kiom azenbleko, pri kio la profeto diris, ke ĝia voĉo estas la plej malplezura inter kreituloj de Alaho.

Kiel oni diras, multoj hirtiĝas, - diras mi al via patro, - kaj multoj krucosignas, kiam aperiĝas kurbopiedula Bjulbjul sur sia sennoma azeno. Sed vi ne devas timi ŝin, eĉ kiam oni insistas, ke la ĝinoj sorĉis – iĝinte ŝin ion misteron, kiu moviĝas per kurbaj piedoj, havas viran raŭkan voĉon kaj kapran brunan barbon sur sia mentono.

Kaj tiel neniu sciis, kiu ŝi estas aŭ de kie ŝi venis. Oni diras, ke ŝi estas filino de kurda ŝejko kaj lia neleĝa edzino. Kaj ŝi venis el montlando Hakari. Oni rakontas, ke ŝia patro – la ŝejko, sciis nek skribi, nek legi, sed soifis sciencon kaj por tio iam li ordonis forŝteli koransciantojn. Ili estis islamanoj kaj povis parkere deklami Koranon. Liaj homoj iam forŝtelis fabelistojn el marketoj de grandaj urboj kaj ilin ĉenliginte alportis en la ŝejkan tendon. La koransciantoj deklamadis saĝajn elтираĵojn, ĝis la ŝejko tute kontentiĝis. Kaj la fabelistoj devis rakonti por li ĉiujn historiojn. Tio signifas, ke Bjulbjul, kiam estis malgranda knabino, daŭre aŭskultadis ĉi tiujn historiojn kaj baldaŭ

---

<sup>5</sup> Najtingalo/perse/.

mem ŝi parkere sciis la plej ĉefajn partojn de koranaj suraĵoj. Ŝi sciis same ĉiujn historiojn – rakontitajn de meddahoj. Oni diras, ke foje la kurda ŝejko forŝtelis maljunan fabeliston, tian maljunan, ke li jam estis centjaraĝa. Kaj ĉar li estis tiom maljuna, ke iam post iam rakontante dormetis. Kaj malgranda knabino Bjulbjul, sidinta apud li, simple daŭris la historion tiel bone, kiel maljuna fabelisto kaj eĉ pli bone ol li. Tiel ŝi rakontis liajn historiojn kaj finis”.

“Sed kial Bjulbjul plu ne vivas kun sia gento?” - demandis via patro.

“Ĉar iutage ŝia patrino gento elpeliĝis, kaj Bjulbjul iris kun sia patrino. Bjulbjul malbenis sian patron, ankaŭ malbenis lian genton. Ili iris tre malproksime de tie. Poste la patrino de Bjulbjul forpasis pro ĥolero. Oni diras, ke poste la ciganoj dekjaraĝan Bjulbjul akceptis en sian grupon, kaj ŝi kun ili migris tra tuta lando, ĝis foriris de ili same. Poste ŝi migris tra la vilaĝoj kaj urboj, kaj neniu sciis, kie ŝi estas. Kaj iutage aperinte en Jedi Suo, jam estis kurbopieda kaj kurbodorsa, kaj unuaj brunaj maljunulinaj haretoj jam kreskis sur ŝia mentono, malgraŭ ŝi ne estis tre maljuna. Ŝi venis sidinte sur bruna sennoma azeno kun sakego kaj bastono, kaj, kiel oni diras, kun ĉiaj ornamaĵoj kaj oraĵoj. Ŝi konstruis kabanon sur montbazo kaj tie vivas kun siaj hejmanimaloj – akirintajn dum pasinta tempo. Bjulbjul timis neniun, neniu ofendis ŝin, ĉar eĉ sovaĝaj kurdoj – vivantaj sur montoj, timis ŝiajn sorĉajn vortojn”.

Kaj Meddah diris:

- Mi rakontas por via patro: “Kiam via patrino gravedite atendis vin, Bjulbjul, sidinte sur sia sennoma azeno, venis en vilaĝon kaj diris al via patrino:

- Dum naŭ monatoj vi ne rajtas rigardi spegulon.
- Dum gravedeco mi neniam rigardis spegulon. Kaj tiel estis dum ĉiuj gravedecoj, - diris va patrino.
- Tre bone, - diris Bjulbjul.
- Mia patrino ĉiam avertis min. Dum ĉiuj gravedecoj ŝi diris al mi:

“Dum naŭ monatoj ne rigardu spegulon”, - diris via patrino.

- Via patrino pravis, avertinte vin, - diris Bjulbjul.

- Nur neniam eksplikis kial?

- Nu, kial?, - diris Bjulbjul, - mi pensas, ke naskiĝoto estas interese ma kaj samtempe malkonfidema... ĉar en patrina ventro li vidas ĉion, faritan de patrino.

- Ĉu ĉion faritan de mi? - diris patrino.

- Jes, ĉion faritan de vi.

Kaj Bjulbjul diris:

- Se vi rigardus spegulon, via nenaskiĝita filo vian spegulan bildon akceptus kiel sian veran patrinon. Kaj ĉar la spegula bildo havas kontraŭan pozicion, li moviĝus en patrina ventro kaj kuŝus kontraŭe. Tiuokaze ambaŭ – patrino kaj infano, dum akuŝo mortus. La infano mortas sen ia voĉeto, sed la patrino – kun krio sur lipoj. Mi jam tion vidis. Unu el tiaj akuŝantinoj – kun kontraŭe kuŝinta infano, tiel kriis, kiel mortigata porko de senkreduloj.

- Kaj tiel estis, - diris Meddah. - La patrino de via patro dum naŭ monatoj ne rigardis spegulon. Kaj kiam venis la tempo, kiam eta Vardan volis elgliti, vidi patrinon de ekstero, li tute ne sciis, kian vidon havas sia patrino.

- Do, mi sidas apud la lulilo de via patro, - diris la fabelisto al la Lasta Penso. - Kaj mi diras al li: “Ne timu! La spiritoj ne forŝtelos vin. Ĉiuj tiuj estas nur fabeloj. La vera danĝero estas turkoj kaj kurdoj. Kiam vi grandiĝos, vian voston, estontan voston, vi trempu en sakramentan oleon, ĉar turkoj kaj kurdoj havas malbonan kutimon tranĉi voston de armenaj viroj kaj precipe tiam, kiam komenciĝas **Mec Depk – La Granda Evento**”.

Via patro demandis: “Kio estas la Granda Evento?”

Kaj mi diris: “Depk, tio signifas evento, kiam okazas grava okazintaĵo, ekzemple, **masakro**”.

“Ne timu”, - diras mi al via patro kaj per mia fabela voĉo mi karesas etan Vardan – nur trisemajnan. Mi diras al li: “Dum unu sekundo Depk – masako, ne okazas, tamen en ĉi tiu landparto. Vin minacas nur la vilaĝanaj superstiĉoj”. - Mi ridante diras al li: “Rigardu, ŝafideto mia, en najbara domo mortis ia homo. Baldaŭ via patrino revenos el stalo kaj ĉirkaŭprenos vin”.

“Kaj ĉu poste?” - demandis via patro.

“Poste, ĉirkaŭpreninte vin, ŝi leviĝos sur tegmenton(ĉiuj armenaj domoj havas platajn tegmentojn)”.

“Sed kial mi leviĝos sur tegmenton kun ŝi?”

“Ĉar la mortintoj kun si forportas etajn infanojn, kiam homoj mortinton portas en tombejon, - diris fabelisto. - Sed mortintoj povas kun si forporti infanetojn, nur kiam infanaj piedetoj estas proksime tero. Sur tegmentoj etulojn ne minacas danĝero. Tie la mortintoj estas senpotencaj”.

Kaj mi parolas kun eta Vardan:

- En la vilaĝo ekzistas nur unu ĉerko – jam centjara. La mortinton baldaŭ oni pasigos preter via domo. Kaj baldaŭ via patrino revenos el stalo kaj vin portos sur tegmenton.

- Vi verŝajne deziras scii, kial nur unu ĉerko ekzistas en vilaĝo? - diras mi, - kaj eĉ centjara.

- Jes, - diras la eta Vardan, - kion vi diros pri la ĉerko?

- Por ĉiuj vilaĝanoj ekzistas nur unu ĉerko, - diras mi, - ĉar la sama ĉerko nur servas porti mortinton en tombejo. Poste la malplenan ĉerkon oni realportas.

- Sed kiel oni enterigas mortinton?

- Oni enterigas sen ĉerko, ŝafideto mia, nur envolvinte en sia **patank**<sup>6</sup> – tomba tolaĵo. Tiel estis enteritaj la ĉiuj viaj antaŭuloj.

- Kaj kion oni faras kun malplena ĉerko – realportita de

---

<sup>6</sup> Armene.

vilaĝanoj?

- Tio uziĝos por la sekvonto, verŝajne por via tre maljuna avo aŭ por unu el najbaroj.

- Kaj kiel okazos mia enterigo?

- Vi ankoraŭ havas multan tempon, ŝafideto mia. Vi dume estas trisemajna. Se la turkoj kaj kurdoj anticipu ne murdu vin, aŭ vi ne forpasus pro iu kruela malsano, vi vivos ĝis tre maljuna aĝo. Verŝajne vi iĝos centjarulo kaj eble iom pli. Kaj kiam iu fermos viajn okulojn, nepre diros: "Tiu ĉi ĉerko estas tre malnova – ducentjara aŭ pli, ĉar ĝi jam estis centjara kaj pli, kiam tiu ci forpasinto ĵus estis naskiĝita". - Sed vi estu konvinkita, la ĉerko ĉiam restos firma, ĉar la armenaj metiistoj estas la plej bonaj en mondo, - diris la fabelisto. Ĉiuj preparitaj de armenaj majstroj estas esperindaj.

Kaj mi – Meddah, diras al eta Vardan:

- Iutage via patrino metos vin sur plankon, por ke vi libere povu kvarpiede iri. Kaj ŝi atentus, ke neniu vin piedpremu kaj rememoros, kion diris Bjulbjul kaj ĉiuj: "Unuaj 40 tagoj estas danĝeraj. Singardu, Tsovinar, ne transpaŝu infanon, ĉar tio embarasos lian kreskadon. Kaj se tamen vi tion faros, vi transpaŝu kontraŭflanken, por ke la sorĉeco malaperu. Tiam li rekreskos".

- Aŭskultu, ŝafideto mia, - diras mi al via patro, - vi travivos multajn malsanojn, kiel ĉiuj malgrandaj infanoj, sed ne timu! Via avino metos sur via dorso kaprajn kornojn – elsegitajn konusformajn, kaŭterizitajn en toniro. Ŝi atendas ĝis via haŭto ruĝiĝos. Poste, via avino per kudrilo gratvundos kaj surmetos tie hirudojn, kiuj forsuĉos malpuran sangon, malsanajn mikrobojn. Kiam la hirudoj ŝvelos, via avino ilin kolektos kaj ĵetos en ujon kun saloza akvo, por ke ili elfluigu suĉitan sangon. Poste por garantio via avino masaĝos kaj premetos hirudojn, por ke ili tutan sangon forfluigu en ujon – kun saloza akvo. Poste ŝi denove surmetos la hirudojn sur punktoj, kie aperas sangaj makuloj. Ili forsuĉos la sangon ĝis vi saniĝos.

- Ĉu se tio ne helpos?, - demandis Vardan.

- En tiu okazo via avino forigos iujn viajn vestaĵojn – iomete tuŝintajn vian malsanan korpon kaj dependas ĝin sur sakramenta arbo – starinta sole sur vilaĝa placo. Se la sakramenta arbo ne forĵetus viajn vestaĵojn, do malaperos ĉiujn malsanojn – eligitaj el domo kun vestaĵoj.

- Sed vere, ĉu ekzistas sakramenta arbo ĉi tie – en Jedi Suo?

- Certe, ŝafideto mia. Ĉiu vilaĝo de ĉi tia landparto havas sian sakramentan arbon.

- Sed kial la arbo estas sakramenta, Meddah?

- Tion neniu scias, ŝafideto mia... aŭ neniu povas memori, kiam kaj kiu nomis arbon sakramentan, ĉar plejparte tio okazis tre delonge. Sufiĉis, ke iu derviŝo aŭ Sankta Sargis foje dormis sub iu arbo, kaj tion vilaĝanoj nomas sakramentan.

- Ĉu Sankta Sargis estis en nia vilaĝo?

- Li certe estis.

- Lutage, kiam vi jam havos dentojn kaj ili doloros, via avino kuracos per rakio aŭ uzos armenan brandon – oghi, devenitan de via lando. Ŝi viaj dentkarnoj frotos per brando kaj diros: “Ĝis 120-a jaraĝo li havu dentojn”.

- He, kion vi diras pri tio? - diris la fabelisto.

Mi diras al via patro:

- He, eta pisadanto, ĉu vi jam estis en armena tombejo de Jedi Suo? Certe, vi ankoraŭ ne estis. Tie la plej multhoma tago estas la Lundo post la Pasko, kiam la tuta vilaĝo kolektiĝas en tombejo, same la turkoj, kaj kurdoj, kaj ciganoj. Ili venas de montoj kaj dislokigas siajn varojn antaŭ la tombejo. Jen tiel, ŝafideto mia. Tio similas bazon. Kaj oni nomas ĝin Lunda bazaro de Pasko. Vilaĝanoj arde preĝas en tombejo kaj poste okazas festa Paska tagmanĝo. Laŭ la ordo, la pastro rajtas restintan tutan paŭlavaon porti hejmen, pro tio la tiu tago ankaŭ nomiĝas “Pastra paŭlavaa tago”.



Mi diras al via trisemajna patro:

- Ĉu taŭgas rakonti por vi same pri aliaj eventoj? Ekzemple kio okazis, kiam vilaĝanoj enterigis vian praavon. Kaj via trisemajna patro – Tovma Ĥatisjan, diras al mi:

- Rakontu!

Mi diras:

- Ĵus vian praavon oni mallevigis en novfositan tombon, poste kiam oni komencis plenŝuti tombon, la filo de via praavo – via avo, rapide eligis botelon da rakio aŭ brando, ĝuste mi ne scias, sed kvalitan drinkaĵon, metis en patran tombon, ĉar li kredis, ke spirito de armeno bezonas 3 tagojn – forlasi tombon. Post 3 tagoj la luma spirito rekte atingas ĉielon, sed la nigra spirito restas antaŭ paradizaj pordoj, ne povas pasi sojlon de puraj pensoj. Kaj via avo pensis, ke la brando verŝajne helpos drinkulan patran spiriton transsalti tra la sojlo de puraj pensoj.

Tiam via avo el sia poŝo eligas la duan brandplenan botelon, ankaŭ arĝentan glason, enverŝas kaj drinkas. Starintoj ĉirkaŭe konsolis: “Liaj ne travivitaj tagoj aldoniĝu al viaj tagoj”. Sed via avo diris: “Ne, ne, ne al miaj tagoj, sed al tagoj de mia nepo Vardan, kiun Hakob kaj Tsovinar ankoraŭ ne naskis, sed kiu iutage naskiĝos”.

“Ĉu Hakob kaj Tsovinar almenaŭ antaŭvidis tiun etan Vardan?” - demandis iu.

“Certe, - diris via avo. - Sed poste daŭraj persvadoj”.

- Kaj ĉiuj ĝuis brandon de via avo kaj diris: “Por sano de nia eta Vardan, kiu ankoraŭ ne naskiĝis”.

- Ĉu tiam vere ankoraŭ ne estis mi? - demandis Vardan.

- Tiam ankoraŭ vi ne estis, - diras mi. - Vi tute ne scias, kie vi estas, - diras mi al Vardan, kiu ree urinis en vindaĵoj kaj mallaŭte ekploris. - Nu, divenu, kie vi estas?

- Mi kuŝas en mia lulilo, - diras al mi Vardan, - en la lulilo kun kolombo kaj olivarba branĉeto. Ĵus mi urinis en mia vindaĵo kaj atendas mian patriron.

- Vi ĝuste kuŝas en via lulilo, - diras mi, - sed vi ne scias, kie troviĝas via lulilo.

- Mi ne scias tion, - diras Vardan.

- Via lulilo staras sur arkoformaj du lignoj, rimede kiuj luliĝas, kaj ĝi troviĝas en spaco de tri grandaj paŝoj ĝis la toniro, kaj la toniro troviĝas en centro de la ĝenerala ĉambro.

- Mi tion ne sciis, - diras Vardan.

- La vilaĝanoj de Jedi Suo siajn ĝeneralajn ĉambrojn nomas oda<sup>7</sup> kaj nur vilaĝestro ĝin nomas selamlik<sup>8</sup> – gastoĉambro.

- Ĉu ĉiuj odaoj havas la saman strangan odoron, kiel nia?

- Ĉiuj havas la saman odoron, - diras mi, - tio estas stalaodoro, ĉar la stalo troviĝas apud la odao, kaj la bruto pasas tra la ĉambro, ĉar devas eniri en stalon.

- Sed kial estas tiel?

- Mi precize ne scias, ŝafideto mia. Sed mi supozas, ke la armenoj en pasinteco sian bruton tenis en odao, ĉar la tonira fajro ne sufiĉe varmigi, precipe vintre. Ja spiro de bruto varmigas odaon. Ĉi tie ne nur stalaodoro ekzistas, tie ĉi ankaŭ fumaodoro estas, ĉar la domo ne havas fumtubon. Ĉi tie ankaŭ odoras spicoj, ankaŭ basturmao, vi ja scias ĝin – sekigitan viandon, pro kio la malgrandaj infanoj ekhikas. Ĉi tie odoras ankaŭ butero kaj fromaĝo ankaŭ restaĵoj de mielkuko – bakitan lastatempe de via patrino.

Kiam Hajk – la unua armeno, paŝadis sur montbazo de Ararato (tio estis tre delonge, ege antaŭe de nia ero), li venis ĉi tiun vilaĝon, kiu tiam ankoraŭ ne estis vilaĝo, sed estis senhoma kampo. Tie, kiel hodiaŭ, troviĝas via toniro, Hajk haltis kaj diris: “Unu el miaj posteuloj devos loĝi ĉi tie kaj fosi fajrokavon, kaj tiun fajrokavon li nomos tonir<sup>9</sup>”.

---

<sup>7</sup> Turke.

<sup>8</sup> Turke.

<sup>9</sup> Armene.

Kaj estas ĝuste tiel. Lutage, sidinte sur sia azeno, tra ĉi tiu kampo rajdis homo, same nomita Hajk. Ĉar Hajk estis tre laca daŭrigi vojon, ankaŭ malsatis kaj soifis kaj frostis, li haltis. La azeno lin alportis ĉe unu el sep fontoj, kies malvarmigan akvon delonge li vidis. Kiam ambaŭ malsoifigis, la homo revenis lokon, pasintan iomete malantaŭe, kie hodiaŭ troviĝas via odao. Li fosis fajrokavon, bruligis fajron kaj diris: “Ĉi tiun fajrokavon mi nomas **tonir**”. En tiu sekundo li aŭdis voĉon, venintan el ĉielo kaj dirantan:

**“La tonir estas sakramenta. Vi konstruu domon kun la tonir, elektu virinon kaj edziĝu antaŭ la tonir”.**

Kaj mi per fabela voĉo montris la toniron kaj diris;

- Rigardu, ŝafideto mia. Antaŭ ĉi tiu toniro Hajk edziĝis kaj havante toniron sur ĝi konstruis domon.

La parencaron, konsistitan de patro, patrino kaj infanoj, Hajk nomis **entanik**<sup>10</sup> – familio. En estonteco, kiam devenis unuiĝo de frataj familioj kun siaj geinfanoj kaj genepoj, Hajk tion nomis **gerdastan**<sup>11</sup>.

Antaŭe estis nur unu ĉambro sen fenestroj, kie vivis Hajk kun edzino, infanoj kaj bruto. Sed iutage Hajk, kunfirmante tabulojn kaj krucformajn trabojn laŭ ĉambra longeco, konstruis firman muron, kiu disigis homojn de bruto. Tamen du ĉambroj dum tempo iĝis mallarĝaj kaj maloportunaj. Pro tio liaj posteuloj apud la patriarka domo konstruis proprajn ĉambrojn, kun propraj muroj, kun propraj tegmentoj. Tio estis tre delonge. Tamen ĉiuj vilaĝanoj tre bone scias pri tio. Kaj pasanto preter ĉi tiu loko montras domojn de posteuloj de Hajk kaj diras: “Ĉi tie vivas Ĥatisjanoj... la tuta ilia gento, aŭ nun kiuj restis kaj ne foriris”.

- Ŝafideto mia, - diras mi al Vardan. - Vi eĉ ne scias kian vidaĵon havas via vilaĝo. Via vilaĝo havas la saman vidaĵon, kiun havas ĉiuj

---

<sup>10</sup> Armene.

<sup>11</sup> Armene.

armenaj vilaĝoj, kiuj ĉiam estas pli pura, ol kurdaj aŭ turkaj vilaĝoj. La domoj estas konstruitaj de argilo, de ŝtonoj, de prilaboritaj rokpecoj, kun tegmentoj – kovritaj per tremolaj branĉoj. La plej grandan domon posedas muĥtaro – vilaĝestro Jeprem Abovjan. Li delonge estis vilaĝestro de Jedi Suo. La stratoj certe ne estas pavimitaj en vilaĝoj, nu kiel alie. La vilaĝo havas sakramentan fonton, en kiu, antaŭ multaj jarcentoj, sin banis Sankta Sargis. La vilaĝo ankaŭ havas sep fontojn, unu el ili nomiĝas **Katnaghbjur**<sup>12</sup>, t.e. “Lakta fonto”.

Kaj mi diras:

- Ŝafideto mia, el Katnaghbjur ne fluas lakto, sed sufiĉas, ke mamnutrantaj patrinoj, havantaj senlaktajn mamojn, preĝu ĉe la Katnaghbjur, poste krucsigniĝu kaj dronigu mamojn en akvon, el iliaj mamoj elfluas lakto. Vi, ŝafideto mia, certe tre deziras scii, kion faris via patrino, kiam ŝiaj longaj pastosimilaj, senlaktaj mamoj malĝoje ŝanceliĝis kun ĉiu movo?. Ŝafideto mia, ŝi arde preĝis kaj krucsigniĝis certe antaŭ Katnaghbjur, poste dronigis siajn mamojn en kompateman akvon, kaj poste la lakto elfluis el ŝiaj mamoj, iĝante grasoza kaj abunda.

Fremdulo, rajdanta tra granda karavana vojo – inter Bekiro kaj Erzrumo, atingas ĝis Vano, Muŝo, Kesario, Koniao, Diarbekiro, ĝis vojkruciĝo kun vojmontriloj, ne havas eĉ prezenton pri vilaĝo Jedi Suo, troviĝanta en spaco de duontaga rajdo, sur montplata valo. Ĝi estas kaŝita en montoj kaj en spaco de fumado de 25 cigaredojn ĝis kurda tendaro de Sulejman aghao – nomita ankaŭ Sulejman bejo. Kaj la fremdulo, se kuraĝus forlasi karavanan vojon kaj duontage daŭre rajdi, sed tiam ankaŭ li ne vidus vilaĝon, ne vidus, kiam eĉ li estos proksime, ĉar la unuaj vilaĝaj domoj, kaŝitaj kiel birdaj nestoj, estas konstruitaj inter rokoj kaj nevideblaj por fremduloj, se eĉ li tra azena aŭ mula vojeto hazarde atingas Jedi Suon.

---

<sup>12</sup> Armene.

- Ĉu oni ne vidas eĉ domajn tegmentojn? - demandis Vardan.  
- Ne, ŝafideto mia. Oni povas vidi, se mem jam estas sur tegmento.

- Sed kiel esti sur tegmento?

- Ĉar la finparto de azena vojeto volviĝante atingas domajn tegmentojn. La fremduloj devas rigardi malsupren – vidi la tegmentojn de domoj, penditaj de rokoj. Sed ili plejparte rigardas rekten.

- Ĉu ne taŭgas rigardi rekten?

- Certe taŭgas, ŝafideto mia, sed ne ĉiam.

- Kiam via patrino estis trimonata gravedulino kaj atendis vian naskiĝon, preter vilaĝo rajdis kurdo – direkten matena suno. Ĉe la vilaĝo lia ĉevalo forglitis de vojeto kaj nemorteble falis en profundeton kaj tiel okazis, ke rajdanta kurdo alteriĝis sur vian doman tegmenton.

- Ĉu ĝuste tiel estis?

- Jes, ŝafideto mia.

- Ĉu mia patrino ne timis?

- Ho, ŝi tre timis, ĉar la tegmento, kovrita per tremolaj branĉoj, ruiniĝis kaj la kurdo kun sia ĉevalo falis ĝuste en vian ĉambron – t.e. selamlikon aŭ odaon. Jen tiel, ŝafideto mia. Via patrino ĵus dormetis. Subite ŝi aŭdas laŭtegan frapobruon, vekiga kaj vidas kurdon kun lia ĉevalo – falintan ĝuste ĉe la toniro.

- Kion faris mia patrino?

- Nenion faris, ŝafideto mia. Ŝi timis kaj fikse rigardis lin kaj lian ĉevalon.

- Kaj kion mi faris, Meddah?

- Vi pro patrino teruro kvazaŭ volis forĵetiĝi el ŝia ventro.

- Tio estas ĉu abortiĝi?

- Preskaŭ, ŝafideto mia. Via patrino povis perdi vin kaj tiam Vardan ne estus. Se ne estus Vardan, poste li ne povus havi edzinon kaj filon – nomitan Tovma.

- Ĉu mi havos filon, Meddah?

- Certe, vi havos filon.

- Kaj ĉu mi lin nomos Tovma?
  - Jes, vi nomos lin Tovma!
  - Kio okazis kun kurdo kaj lia ĉevalo?
  - Okazis tio, pri kio mi rakontis por vi.
  - Do ĉu la kurdo rajdis direkten matena suno?
  - Jes.
  - Kaj ĉu lia ĉevalo glitfalas? Ĉu ĝi forglitis de vojo? Ĉu ili supreniĝis tra la roko? Kaj ĉu ili alteriĝis sur nian doman tegmenton?
  - Ĝuste tiel estis.
  - Kaj ĉu kun sia ĉevalo li falis en nian ĉambron, kiun ni povis nomi ankaŭ selamlik, sed nomis odao? Kaj ĉu la ĉevalo kun rajdanto alteriĝis apud la toniro, kie briletante bruliĝis seka sterko?
  - Jes, ŝafideto mia.
  - Kaj ĉu mia patrino tiel timegis, ke povis perdi min?
  - Ĝuste tiel estis.
  - Kaj tio signifus, ke ĉu mi neniam iĝus patro, ĉar mi ne ekzistus?
  - Jes, ŝafideto mia.
  - Kaj nek estus mia filo Tovma – iutage naskota.
  - Jes, ŝafideto mia. Li same neniam ekzistus.
- Mi mallaŭte ridis kaj diris: Sed, kiel vi vidas, nenio serioza okazis. Nur via avino venis el najbara ĉambro, vidis la kurdon, vidis lian ĉevalon, prenis metitan sur tonira rando fajrostangon, kiu vere ne estis fajrostango, sed estis stango por miksi sekajn sterkojn en toniro. Ŝi prenis tiun stangon kaj malkompate ekbatis kurdon kaj lian ĉevalon. Kaj vi kredas aŭ ne, la kurdo teruriĝis, forgalopis el la ĉambro kaj malaperis.
- Jen kio! - diris eta Vardan – trisemajna, ankoraŭ nescipovanta paroli, - mia avino vere estis bravulino. Kiu povus tiel kondukti?
  - Jes, ŝafideto mia. Via avino estis sentima virino.
  - Ĉu ŝi estis la unua armenino kuraĝinta bati sovaĝan kurdon per fajrostango?
  - Ĉu vi pensas? Dum multmiljara historio de armena popolo ĉu ŝi estis la unua?

- Jes Meddah.

- Tion mi ne scias, ŝafideto mia. Pri tio ni devas demandi historiistojn. Tamen mi – Meddah, similan alian okazintaĵon ne scias.

Kaj mi – Meddah, diras al eta Vardan:

- Sed via avino ne ĉiam similis Kerberon – gardintan domon. Sed iu vidante ŝin unue ne imagos, ke ŝi iam estis alimaniere.

- Kiel alimaniere, Meddah?

- Nu, alimaniere, ŝafideto mia. Antaŭ multaj jaroj, kiam ŝi edziniĝis kun via avo kaj eniris en ĉi tiun domon, estis malgranda, timema knabino – apenaŭ 12 jaraĝa, havanta ĵus formiĝitajn mamojn, kaj haretojn sur pubo. Tamen ŝi havis grandajn orelojn kaj nenian buŝon.

- Sed, Meddah, ne povas esti tiel.

- Jes, ŝafideto mia, estis tiel. Ĉar ŝia bopatrino post unua edziĝfesta nokto diris al ŝi: “Gelin!” (tio estas turka vorto, signifanta junan bofilinon, malgraŭ ekzistas armena konvena vorto, kaj ŝi povis diri “harsik”, t.e. kareseme bofilineto). Sed la turka vorto sonas krude, inspiras respekton, same timon, do, estas pli impresa dum interinformado de du virinoj de malsama stato. Ĉu vi komprenas, ŝafideto mia? Jen tiel, la bopatrino diras al gelino: “Gelino, nun vi havas orelojn, sed buŝon ne havas. Vi povas paroli nur kun malgrandaj infanoj kaj kun via amata edzo, nur kiam vi estas sole kun li kaj tiam, kiam li sin turnas al vi. Ĉu vi komprenas? Vi ne rajtas paroli kun aliuloj, precipe kun via bopatro kaj kun fratoj de via edzo. Kontraŭe oni diros: “Ŝi ŝiris sian vualon””.

“Sed kiam mi povas paroli kun aliuloj?” - demandis via avino – la harsik-gelino.

“Nur kiam vi naskos sian unuan infanon, - diris al ŝi la bopatrino. Kaj kiam tio okazos, mi tuj diros al vi: Gelino, nun vi ree havas buŝon”.

La armenoj tiun provan tempon de junaj bofilinoj – bofilinan

moron, silentiĝan postulon nomas **mnĝutjun**<sup>13</sup>. Vere: Mi – Meddah, demandas min: “Kial la amoza Dio donis langon al junaj bofilinoj, se iliaj bopatrinoj malpermesas paroli?” Kaj la patrino de bopatrino de via avino diris al via 12-jaraĝa avino: “Gelino, glutu vian langon!”.

Kaj vere, ŝafideto mia, estas facile ignori skribitan leĝon, sed ne eblas malagnoski familian neskribitan leĝon. Via juna avino sciis pri tio. Ŝi estis postulema pri observado de malnovaj moroj. Kaj kiam naskiĝis la unua infano, via avino ree komencis paroli.

Kiel la plej juna bofilino, via avino plenumis la plej simplajn aferojn. Kun aliaj aferoj ŝi ĉiutage devis matene ordigi ĉies litojn, same litojn de bofratinoj, ĉar gerdastananoj ne ordigis siajn litojn. En korto, antaŭ la pordo staris najbarinoj kaj rigardis, ĉu ŝi faras ĉiojn?

- Se ĉu ŝi ne farus tiujn aferojn? - demandas eta Vardan.

- Tiam la najbarinoj dirus: “Rigardu, anoj de tiu ĉi gerdastano mem ordigas siajn litojn. Tiu ĉi familiego ne estas firma. Tio signifas, ke la gerdastano ruiniĝas”.

Ju pli multajn infanojn naskis via avino, des pli bonigis sian staton en la gerdastano. Ŝi naskis 14 infanojn. Via patro, ŝafideto mia, estas la plej juna. Via avino estis preskaŭ 40-jaraĝa, kiam naskiĝis via patro. Kaj vi, mia eta Vardan, estas la plej juna filo de via patrino, malgraŭ 12-a. Jen tiel estis, ŝafideto mia, kiam via avino iĝis aĝula virino, iĝis ankaŭ gentopatrino.

- Ĉu ĉiuj gerdastananoj obeas ŝin?

- Ĝuste tiel.

- Kaj certe, ŝi estas la plej maljuna ano en domo.

- Ne, ŝafideto mia, la plej maljuna estas via praavino, sed ŝin jam neniu serioze rilatas, ĉar pro marasmo ŝi malsaĝiĝis. Ŝi nur sidiĝas ĉe la toniro kaj malklare ion rememoras – pensante sole. Vi povas ŝin vidi, se levigos vian kapon.

---

<sup>13</sup> Muteco/armene/.



- Ŝafideto mia, la mamoj de via avino faltiĝis tiel, kiel ŝiaj manoj kaj vizaĝo. Sed la ardo de ŝiaj okuloj tiel fajriĝas, kiel la toniro. Tiel vigla estas same ŝia lango – ĉiam diranta tion, kion diktas sia koro. Ŝajnas ŝi venĝas pro daŭra muteco. Neniu povas tiel malbeni, kiel malbenas via avino.

- Nu divenu, ŝafideto mia, kion diris via avino al kurdo, forpelante lin el ĉambro per fajrostango?

- Kiel mi povas scii tion, Meddah? - diris Vardan.

- Ŝi diris: "He, ci, filo de putino, idaĉo de kolerinta ŝafo, kurda sako kun fiodoraj ovoĵoj! Diru al via beĵo, ke mi lin kaj lian tutan amasaĉon sendas al diabloj! Sekiĝu testikoj de viaj viroj! Kostandinopola padiŝaho pendumu vin ĉiujn! Viaj infanoj mortaĉu pro ĥolero, kaj viaj viroj infektiĝu en bordeloj de frankistana malsano, ties nomon mi – maljunulino, forgesis, aĥ, forgesis! La ĝinoj kaj la diabloj manĝaĉu hepatojn de viaj infanoj! La deluvo forportu vin!

- Diru al mi, Meddah. Kial mia avino estas tiel kolerema rilate kurdoj?

- Tio havas kaŭzojn, ŝafideto mia.

- La armenaj patrinoj pli timas kurdojn, ol turkojn, malgraŭ kompare turkoj, la kurdoj estas malminacemaj. La patrinoj timas kaj la patrinan timon sentas ankaŭ nenaskiĝita infano. La patrino tion scias kaj diras al infano: "Sin gardu, se vi ne iĝos bravulo, vin forŝtelos la granda urso aŭ la kurdo!"

- Sed la patrinoj kiujn kurdojn konsideras?

- Nek kurdojn – vivantajn en urboj, ŝafideto mia, ankaŭ nek duonnomadajn kurdojn – vivantajn en vilaĝoj. En montoj ekzistas kurdaj sovaĝaj gentoj, kiujn timas la virinoj. Iam post iam tiaj kurdoj forŝtelas virinojn, mortigas iliajn edzojn, rabas vilaĝojn kaj bruligas domojn.

- Sed kial ili faras tion, Meddah?

- Mi same tion precize ne scias, ŝafideto mia. Nu, tamen tio estas tre komplika, sed mi provos ekspliki. Ekzistas, ekzemple, la imposta problemo.

- Kio estas la imposto, Meddah?

- Nu, ŝafideto mia. La impostoj estas impostoj.

- La afero estas tia. La kurdoj neniam impostojn pagas al turkoj, ĉar ili ne konsideras tion necese. Ekzemple, lastatempe konstantinopola padiŝaho 5000 rajdantojn sendis al kurdaj montoj kolekti impostojn. Vi kredu, eble vi ne kredos, sed tiujn 5000 rajdantojn plu neniu vidis. La afero estas simpla. La kurdoj atendas, kiam la soldatoj supreniros ĝis montfendejoj. Poste kurdoj po unu pafmortigas ilin, ŝtelas iliajn ĉevalojn, vestaĵojn kaj ŝuojn kaj nudajn kadavrojn disĵetas en ravinon. Kaj ĉar konstantinopola padiŝaho nenian intencon havis ree perdi multnombrajn armeanojn kaj ĉevalojn, li plu ne maltrankviligas kurdojn. Pro tio turkoj duoble, trioble postulas imposton de armenoj.

- Sed mi tion ne komprenas, Meddah.

- La afero estas tia, ŝafideto mia. La turkaj impostkolektistoj vere rabas armenojn. La armenoj devas pagi ne nur imposton por senkredeco – nomatan raja<sup>14</sup>, ankaŭ kun aliaj impostoj, kiujn mi ne volas tranombri, armenoj pagas same kapo-imposton, kaj antaŭ ĉio imposton por ne soldatiĝi – nomatan bedel<sup>15</sup>. Neniu armeno povas liberiĝi de bedelo. Vi same, ŝafideto mia.

- Sed kial, Meddah?

- Ĉar la armenoj ne rajtas posedi armilojn, sekve ne povas servi en armeo.

- Ĉu ilin malpermesas servi en armeo, kaj sed ili estas devigitaj pagi bedelon?

- Jes, - diris fabelisto.

---

<sup>14</sup> Turke.

<sup>15</sup> Turke.

- Mi, - diris Vardan, - laŭdas kurdojn, ĉar ili ne volas pagi impostojn kaj principe refutas tiun civitanan devon. Vere, estas tre admirinde. Mi same refutas impostojn, malgraŭ estas trisemajna kaj tute mi ne scias kio estas imposto.

- Do, la afero estas tia, ŝafideto mia. Malgraŭ la kurdoj ne pagas impostojn al turkoj, sed mem postulas impostojn de armenoj.

- Mi pensis, ke la armenoj pagas impostojn al turkoj.

- Ili estas devigitaj pagi impostojn ankaŭ al kurdoj.

- Do, ĉu la armenoj pagas duoble?

-Ili pagas pli, ŝafideto mia. Se ili ne povas pagi ĉiujn impostojn, la turkoj bruligas iliajn domojn, forpelas ilin de iliaj terpecoj, kaj krom tio ankaŭ malliberigas.

- Sed kiel estas la problemoj rilate kurdojn?

- Jen tiel, ŝafideto mia. En ĉi tiu landparto ekzistas bejo, nomata Sulejman, kiu ankaŭ estas ŝejko. Ĉi tiu ŝejko imagas, ke la landparto ĝis Eŭfrato apartenas al si. Li ne agnoskas nek konstantinoplan padiŝahon, nek iun sultanon, kiel superreĝon. Li pensas, ke la tuta lando apartenas al si, same la vilaĝoj de ĉi tiu monta valo kaj ĉio, kion posedas tieaj loĝantoj. Sed la ŝejko ne estas malsaĝa. Li atendas ĝis armenoj kulturos siajn kampojn, kaj tute ne kontraŭas, ke ili bredu animalojn, konstruu domojn. Sed iam post iam li venas armenajn miletojn – armenajn regionojn, kaj forprenas ĉiujn bezonatojn: geĉevalojn, gebovojn, geŝafojn, grenaron, same plaĉatajn objektojn, iam belajn knabinojn. Li havas milajn rajdantojn, kaj kiu rezistas, li mallongiĝas laŭ mezuro de sia kapo.

Antaŭnelonge via patro diris al via patrino: “La kurdoj estas plej malsaĝa popolo en mondo, ĉar scipovas kalkuli nur ĝis dek”.

“Sed mi konas kurdon, kiu scipovas kalkuli ĝis dudek”, - diris via patrino.

“Do, li kalkulas ne nur manajn fingrojn, sed ankaŭ – piedajn”.

“Jes”, - diris via patrino.

- Nu, ŝafideto mia, - tion diras mi, Meddah, - estas la sama, ĉu kurdoj estas stultuloj aŭ intelektualoj? Sed estas certa, ne eblas ŝerci kun ili: aŭ vi devas doni al ili, kion ili postulas, aŭ matene vi vekigoŝ ne havante tegmenton, kaj se vi ne havas feliĉon, do vi vekigoŝ sen kapo.

- Meddah, ĉu vi mokas min? Kiel homo povas vekigi sen kapo?

- La kurdoj de armenoj postulas, tiel nomatan, fianĉinan imposton.

- Kio estas tio, Meddah?

- Nu, kiel ekspliki? Kiam la armeno edziĝas, li devas duonon de fianĉina doto doni al kurda ŝejko – Sulejman.

- Ĉu mi ankaŭ devas konduti tiel, kiam edziĝos?

- Certe, ŝafideto mia.

- Se mi ne kondukus tiel?

- Tiam kurdoj senkapigos vin, ŝafideto mia, aŭ okazos io pli malbona.

- T.e. kio, Meddah?

- La kurdoj forŝtelos vian fianĉinon antaŭe vi defloros ŝin.

- Ĉu tio estas pli malbono ol morto?

- Jes, tio estas pli malbona, ŝafideto mia.

- Sed nun vi devas dormi, ŝafideto mia. Ĉar morgaŭ venos alia tago. Nun alvenos via avino – luli vin per sia longa ŝnuro. Revenos ankaŭ via patrino el stalo, kie verŝajne ne nur urinis ŝi, sed ankaŭ plenumis aliajn aferojn tute neantaŭviditajn, kaj baldaŭ revenos via patro de kampo. Ĉu vi bezonas lulkanton?

- Jes, Meddah.

Sed mi diras al Vardan:

- Ĝis mi kantos lulkanton, mi rakontos kiel vi naskiĝis.

- Sed tion mi scias, Meddah, - diras Vardan.

- Do, kiel, ŝafideto mia?
  - Nu, kiel?, Meddah. Sub la vito.
- Sed mi – Meddah, diras al li:

- Ne, ŝafideto mia. Tio estas nur fabelo, kiun oni rakontas por malgrandaj infanoj. Ĉu vi deziras scii, vere, kiel tio okazis?

Kaj mi – Meddah, diras:

- Hieraŭ, sidinte sur sia sennoma azeno, alvenis vian vilaĝon Bjulbjul kaj eniris en ĉi tiun ĉambron. La azenon ŝi lasis apud la toniro kaj kaŭris antaŭ via lulilo. Ŝi diris al vi: “Nu, ŝafideto mia, ĉu vi volas scii kiel vi naskiĝis?”. Kaj vi respondis: “Bjulbjul, mi scias, kiel mi naskiĝis – sub la vito”. Sed Bjulbjul ekridis kaj diris: “Ne, ŝafideto mia, mi pli bone scias, ĉar mi estas Bjulbjul, kiu akuŝigadas”.

Kaj Bjulbjul rakontas:

- Tio okazis antaŭ tri semajnoj, mia eta Vardan. Sidinte sur mia sennoma azeno, mi eniris vian vilaĝon. Subite mi aŭdis, via patrino ĝemas. “La ĝemoj aŭdiĝas el stalo, - diris mi al mem, - kaj tuj el stalo de Ĥatisjanoj”. Mi rajdis al via domo. Mi eniris odaon, la azenon lasis apud la toniro kaj iris stalon. Nu, vi divenu, kion mi vidis?

- Mi ne scias, Bjulbjul, - diras Vardan.

- Mi ekvidis, ke via patrino estis kaŭrita apud la bovino kaj ĝemas. “Kio okazis nia eta dikulino? - diras mi, - ĉu la bovino sorĉis vin dum melko. Ĉu en ĝiaj mamoj estas diablo? Ĉu vi trinkis ĝian lakton? Kaj la diablo nun sidiĝas en via ventro?”

“Eta Vardan sidiĝas en mia ventro, - diris via patrino, - kaj ŝajnas li volas elgliti eksteren”.

Mi diras:

“Tio tute ne estas malbone”.

Via patrino diris:

“Ho, jes, tio tute estas ne malbone”.

Sed subite via patrino denove eksentis dolorojn. Mi firme tenis ŝin. Mi gratis ŝian nukon, gratis dorson, poste karesis harojn.

“Ĉu mi kuŝu sur dorso, Bjulbjul?”

“Ne, Tsovinar. Nur virinoj el Frankistano akuŝante kuŝas sur dorsoj”.

“Ĉu mi kaŭru ĉi tie apud bovino?”

“Jes, Tsovinar. Vi firme tenu bovinajn mampintojn”.

“Kaj kion alian mi devas fari, Bjulbjul?”

“Vi devas peni, simple peni”.

“Ĉu mi penu, Bjulbjul?”

“Jes, Tsovinar. Vi imagu, ke devas urini kaj meti ovon. Kaj por tio vi forte penu. Ĉu vi komprenas?”

“Jes, Bjulbjul”.

“Kaj mi gratos vian nukon kaj dorson. Mi firme tenos vin kaj karesos viajn harojn kaj vi, eta dikulino, iomete penegu!”

“Bone, Bjulbjul”.

Kaj mi masaĝis vian patrinon kaj trankviligis ŝin. Kaj murmuris kanton por ŝi per najtingala – bjulbjula voĉo, sonantan kiel azenblekon. Sed via patrino ĝemegis kaj penis tiom, ĝis vi elglitis eksteren. Kaj jen vi kuŝas sur pajlo apud bovino. Via patrino trankviliĝite elspiris. Kaj mi diris: “Ĉio jam finis”.

Kiam vi dum via vivo unue ekkriis, en stalon venis via avino. Ŝi vidis, kiel mi mordetis vian umbilikan ŝnuron kaj demandis:

“ Kiel vi faros tion Bjulbjul, ne havante dentojn? “

“Mi tion faras rimede lipoj”, - diris mi.

“Sed kial vi ne havas dentojn, Bjulbjul?”

“Ĉar mia edzo batante min rompis miajn dentojn ... nu, vi demandu al mi: kial?”

“Sed kial li faris tion, Bjulbjul?”

“ Ĉar mi montris mian vizaĝon al flankuloj”.

“Kaj ĉu vi viajn dentojn ankaŭ montris al aliuloj?”

“Jes, miajn dentojn ankaŭ”.

Poste via avino banis vin per sala akvo, samtempe kantante armenan malnovan kanton. La kanto rakontis pri bonaĵdona salo, kiu

firmigas korpajn membrojn. Ĝi rakontis ankaŭ pri amoza Dio, kiu donacis al armenaj infanoj grandajn velurajn nigrajn okulojn.

Poste venis via patro kaj vidis vian mordetitan umbilikan ŝnuron, falantan sur seka herbo, ĉe bovinaj piedoj. Li ankaŭ vidis placenton – same falintan sur seka herbo ĉe bovinaj piedoj.

“Kion vi faris kun placento?” - demandis via patrto.

“Nenion, Hakob efendio. Kion ni devis fari?”

“Kaj kion okazis kun umbilika ŝnuro?”

“Nenion, Hakob efendio. Sed kio povis esti kun ĝi?”

“Diru al mi, Bjulbjul, ĉu almenaŭ per umbilika ŝnura sango vi frotis vangojn de mia filo?, kiel mia patrino frotis miajn vangojn kaj kiel mia avino frotis vangojn de mia patro”.

“Jes, Hakob efendio, - diris mi. - Mi ĝuste tiel faris, por ke en estonteco li havu rozkolorajn vangojn. Nu, rigardu infanon, ĉu liaj vangoj estas palaj?”

“Ne, Bjulbjul. Ili estas ruĝaj pro nobla sango”.

“Kion ni devas fari kun umbilika ŝnuro?” - demandis via patro.

“Nu, ni devas ĝin enterigi en preĝeja korto, - diris via patrino, - kaj tiel profunde, ke la hundoj ne povu manĝaĉi”.

“Ĉu en preĝeja korto?” - demandis via patro.

“Jes, - diris via patrino, - en preĝeja korto”.

Mi demandis vian patrinon:

“Kial en preĝeja korto?”

“Por ke li estu nobla kristano”, - diris ŝi.

“Mi pensis, - diriis Bjulbjul, - ke verŝajne la diablo eniris en bovinon kaj ĝi havas malican rigardon. Pro tio mi iris vilaĝon, eniris sep domojn, prenis sep malsamajn kudrilojn el sep domoj kaj revenis, iris stalon, per sep kudriloj sepoble truis la placenton, ke mortigi la malicon, poste mi kraĉis sur placento kaj finfine kun kudriloj placenton enterigis malantaŭ domo”.

Bjulbjul diris:

Vi nenion timu, Varĉjo.<sup>16</sup> La diabloj ne forŝtelos vin. Vi nur timu siajn unuajn dentojn, ĉar ili dolorigas, kiam ekkreskas.

- Kiel tio okazas, Bjulbjul?

- Nu, tiel okazas Varĉjo. Ĉiuj homoj iutage havas sian unuan denton.

- Sed kial, Bjulbjul?

- Ĉar antaŭ ĉio Alaho volas montri, ke ni estas trueblaj el ekstero kaj interne.

- Sed mi tion ne komprenas, Bjulbjul.

- Nu, aŭskultu min, Varĉjo. La homo konsistas de viando kaj sango. Kaj ĉio, konsistita de viando kaj de sango, estas truebla. La kreskanta dento el interno truiĝas viandon kaj eliĝas. Sed vi volas tion aŭ ne, tute egale, ĝi dolorigas aŭ ne, la dento kreskas kaj kreskas, truiĝas vian viandon.

Sed, se ĉu mi preĝu al Kristo?

- Tio tute ne helpas vin. Eĉ Kristo ne scipovos preventi dentan kreskon.

- Do, mi tiel truiĝos el interno.

- Estas ĝuste tiel.

- Sed kiel ia homo truiĝas de ekstero?

- Por tio ekzistas diversaj eblecoj.

- Kiaj eblecoj?

- Ekzemple per tranĉilo de kurdo, aŭ per tranĉilo de turko. Eblas ankaŭ per pafila kuglo.

- Ĉu ekzistas ankaŭ aliaj eblecoj?

- Jes, ekzistas multaj eblecoj, Varĉjo, tre multaj.

Kaj Bjulbjul diris:

- Iam mi ankaŭ estis truiĝita. Sed tio estis delonge.

- Kiel tio okazis, Bjulbjul?

---

<sup>16</sup> Karesa nomo de Vardan, armene — Vardanic.



- Nu, okazis tiel, - diris Bjulbjul. - Mi estis 11-jaraĝa kaj sur mia pubo estis dornetoj. Malsupre pubo troviĝas pordoj de atendeco.

Bjulbjul iomete ridetis. Ŝi diris:

- La pordoj de atendeco troviĝis inter du lobetoj, havantaj problemon scii, esplori ĉian neinvitan gaston, ĝian intencon kaj demandi ĉu ĝi scias, ke malantaŭe pordoj de atendeco troviĝas ĉiuj revoj kaj sopiroj?. Tiuj lobetoj, ankoraŭ nematuraj, estis ne pli grandaj, ol lobo de oreloj de nenaskiĝita ŝafideto. Kaj inter tiuj lobetoj kaŝinte sidiĝis mia gardisto – maldika haŭta peco – tenera, kiel ĵus disflorinta roza petalo, sed obstina kaj nevundebla, kiel kaproledo tiritita sur tamburo de bekira tamburisto – mjunadio.

- Ĉu tamburisto kaj heroldo?

- Jes, Varĉjo, tamburisto kaj heroldo.

- lutage, sidinte sur blanka ĉevalo, alvenis princo forŝteli etan kompatindan orfinon. La orfino estis mi. Iam la imamo nin fianĉigis. Kaj mi memoras, la imamo diris: “Kaj estu benita nia profeto Muhamet, amanta orfojn, kompatindulojn”.

Kaj Bjulbjul diris:

- La princo kondukis min sian tendon kaj tie montris kion li havas inter siaj piedoj, kiun jam estis terure, ĉar similis morton, subite viviĝontan. Kiam tiu viviĝita morto enpikiĝis inter miaj piedoj, mi kriis kaj vokis mian patron estantan en ĉielo. Sed mia patro ekridis kaj diris: “Nu, tio ne estas morto, sed – doloro, dank’ al kiu divenas tuta vivo. Vi, kolombeto mia, devis froti kamelan, aŭ ŝafan vakson inter siaj piedoj, por ke la agluiĝitaj lobetoj disiĝis kaj la haŭta peco, tenera, kiel ĵus disflorita roza petalo, kaj ŝajnanta solida, kiel tambura ledeto de bekira mjunadio, tiam via roza petalo fleksiĝus kaj ne dolorus”.

- Tiel li truigis min,- diris Bjulbjul al Varĉjo, - kaj mi eksciis, ke la homo konsistas el viando kaj sango kaj estas truebla.

- Sed kio estas netruebla? - demandis Vardan.

- La spirito, - diris Bjulbjul. - Ankaŭ la penso.
- T.e. kiel?, - demandis Vardan.
- Simple tiel, - respondis Bjulbjul.

- Kaj kio okazos kun mia dento? - demandis Vardan. - Ĉu ĝi truigos min el interno?

- Jes, ŝafideto mia,- diris Bjulbjul. - Viaj dentoj en estonto muelos ĉion falitan sub ili. Ili finfine neniigos ĉion, por ke vi vivu.

- Mi timas, Bjulbjul.
- Ne timu, - diris Bjulbjul.

Ĉi tie la fabelista voĉo mallaŭtiĝis. Ie – en pasinteco, la bildoj malheliĝis.

- Ni estas sole, - diris la fabelisto: vi kaj mi – Meddah kaj la Lasta Penso.

- Ĉu la historio ne daŭros?
- Kia historio? - demandis la fabelisto.
- La historio de mia patro.
- Certe daŭros. Ĝi nedelonge komenciĝis.

### 3.

Kiam la unua dento de via patro truigis el interno kaj eliĝis, lia patrino konfirmis, ke li plu ne estas sendenta estaĵo, sed homo, kiu povas mordi, kaj rompi, kaj same mortigi. Ŝi diris al sia filo: "Baldaŭ vi ne bezonos mian lakton. Kaj mi frotos pipron sur miaj mampintoj, kaj vin malkutimigu, forigu vian plezuron suĉi. Poste manĝaĵon mi maĉos, enŝovos ĝin en vian buŝeton kaj diros al vi: Vi plu ne estas suĉanto, sed – mordanto". Kaj patrino de via patro ekridis, metis fingron en vian patran buŝon, palpis la denton kaj diris: "Tio estas, ni nun festos".

- La armenoj ŝatas festadi, - diris la fabelisto. - Iliaj festoj estas pli ĝojaj, ol turkaj. Kaj dum vivo de via patro la festo de unua dento estis

la unua festo – dediĉita al li. Post lia naskiĝo Hakob disdonis al homoj juglandojn, sekvinberojn kaj brandon. Sed Tsovinar kaj maljunulino Hamest ĉiujn rigardantojn tra la pordo de odao regalis per dolĉa riza pilafo kaj fonta malvarma akvo kun morusa doŝab<sup>17</sup> – morusa suko, kuirita sen sukero ĝis denseco.

Sed nun dum tuta tago kun helpo de najbarinoj kuirigis hatik<sup>18</sup>. Hatikon oni preparis el grio, blghuro, certe miksante same juglandon, sukeron, cinamon kaj aliajn komponentojn, sekreton de kiu Tsovinar kaj Hamest ne volis diri. Ankoraŭ Hajk – la unua armeno, taksis hatikon kaj sciis, ke ĝi estas pilafsimila manĝaĵo. Se ĝin rapide malvarmigi, iĝos kiel ĝelea bakaĵo – la plej bongusta en mondo. Pro tio tiam sur montbazo de Ararato li diris al sia edzino: “Se harisao – kuirita kun viando kaj grio estas la unua armena nacia tagmanĝo, do la dolĉa hatiko, mia ŝatata manĝaĵo, estos la dua”.

Kaj Hajk diris:

“Kiam miaj posteuloj havos siajn unuajn dentojn, la patrinoj devos festi, prepari hatikon kaj inviti ĉiujn, kiuj povus iĝi patrinoj aŭ jam estas patrinoj”.

- Kaj tiel estis, - diris la fabelisto. - Ĵus oni eksciis pri kreskinta unua dento de via patro, jam estas fakto, la vilaĝaj virinoj el ĉiuj kabanoj kaj domoj, kiel rivero alfluis ĉi tien – en la domon de Ĥatisjanoj, festi hatikan feston.

Do, imagu: sidiĝas eta Vardan en sia lulilo kaj premas dentojn – tute ne havantajn, tiu signifas, ke li havas unu. Tamen li premis lipojn, ĉar ne volas montri la denton. Sed li devas montri, ĉar kiu vidas la unuan denton, li en estonteco ne havos problemon perdi dentojn.

- Kial li ne malfermas buŝon? - demandas la avino, - li ja devas montri sian denteton.

- Mi ne scias, - diris la patrino de Vardan.

---

<sup>17</sup> Perse.

<sup>18</sup> Armene.

- Ni devas ridigi lin.
- Sed li estas serioza infano kaj ne ridas.
- Mi pensas, ke ni devas fari tion, kion faris mia patrino kun mi.
- Kaj kio ŝi faris?
- Peco de hatika kuko tenu ĉe lia nazo, duan pecon metu sur kapon, kaj li malfermos buŝon.
- Ĉu li malfermos sian buŝon?
- Certe. Li ekridos kaj sian unuan denton montros al kolektitoj.

Ĉifoje ankaŭ estis tiel, - diris la fabelisto. - La patrino de Vardan rondan kukan peceton movigis ĉe nazo de Vardan, kaj duan peceton metis sur lia kapo. Kaj Vardan, estinte serioza infano, subite ekridis kaj montris al ĉiuj sian unuan denton.

-Ĝis 120-a jaraĝo li havu dentojn, - diris la avino.

Kaj ĉiuj gastoj ekflustris: “Ĝis 120-a jaraĝo”. Poste ili proksimiĝis al lulilo de Vardan kaj diris: “**Aĉked lujs**”<sup>19</sup>, kio armene laŭvorte signifas: “Lumon en viaj okuloj”. La samajn vortojn ili diris ankaŭ al gepatroj de Vardan. Luj eĉ ekploris, ĉirkaŭpreninte Tsovinar kaj la samajn vortojn dirante al ŝi: “Aĉked lujs”.

- Kaj kion signifas “lumon en viaj okuloj?” - interesiĝis la Lasta Penso.

Kaj la fabelisto diris:

- Ĝenerale tio signifas: “ĉiam havu vidkapablon”<sup>20</sup>.
- Ĉu ne eblas deziri al homo ion plej bonan?
- Ne, - diris la fabelisto. - Se ies okuloj estas malklaraj –mallumaj, tio estas malbono por li. Kies okuloj estas lumaj, li venkas malluman nokton, en lia koro brilas sunplena tago.

Kiam la infano komencas paŝi, la armenoj festas **ŝekerli**<sup>21</sup> –

---

<sup>19</sup> Estas idiomo. Signifas – por ĉiam havi helan vidaĵon.

<sup>20</sup> Aŭtora ekspliko.

<sup>21</sup> Turke.

feston de unuaj paŝoj. La direkto de unuaj paŝoj montras lian vivan vojon.

En tago de “Unuaj paŝoj” de Vardan la tuta vilaĝo kolektiĝis en odao de Ĥatisjanoj, malgraŭ ne por ĉiuj sufiĉis lokoj. Tamen, kiuj ne ĉeestis en odao, sed tie estis liaj pensoj. Poste ili petis siajn parencojn aŭ najbarojn – povintajn ĉeesti, rakonti pri la festo, por ke poste, en estonto povu diri: “Mi ankaŭ ĉeestis”.

- Tiel estis, - diris la fabelisto. - La patrino de Vardan bakis tre multan da paĥlavaon en toniro kaj metis sur kupra sofrao – sur oportuna pletego. Ŝi ĝin unue prezentis al via praavino, poste al pli aĝaj fratoj kaj fratinoj de via patro kaj al ĉiuj ĉeestantoj. La lastan ne tre bonan pecon de paĥlavao via patrino prenis kaj per ruĝa fadeno ligis sur dekstra piedeto de Vardan. Ektimigita Vardan sidinta en ĉambro kun manetoj, kriante, firme tenis patrinajn piedojn, kvazaŭ volis diri al patrino: “Kia stranga festo estas! Kion vi ĉiuj volas de mi?”

- Hodiaŭ vi devas decidi, kion vi iĝos en estonto, - diris la patrino. Kaj samtempe ŝi levis lin, starigis sur du piedetoj. - Nu kuru, mia etulo, mia brava paŝao, - diris ŝi kaj palpebrumis al li, poste sin turnis al gastoj, denove palpebrumis: - He, ni atendu kaj sciu kio iĝos li. Sed ŝi tenis lin.

Kial vi ne lasas lin, Tsovinar? - demandis unu el gastoj.

- Mi mem ne scias, - respondis Tsovinar.

- Nedelonge mi sonĝis, - diris Hakob, starinta apud Tsovinar, - mi sonĝis, ke nia Vardan iĝis fiŝkaptisto.

- Kia malsaĝeco! - diris la avino. - Ne sonĝoj decidus kio iĝos li.

- Sed kio decidus?

- Decidas liaj piedetoj.

- Sed kial la piedetoj?

- Ĉar lia kapo decidus kiel devos iri liaj piedoj.

- Ne, ni baldaŭ scios, - diris Hakob, kaj turnis sin al edzino, - lasu etan paŝaon.

Tamen Tsovinar ankaŭ ne lasis infanon.

- Kio okazis? - demandis la avino.

- Nenio okazis, - diris Tsovinar.

Hakob – la patro de Vardan, nun ekridis, sin turnis al gastoj:

- Nu, vi rigardu ĉi tien. Komenciĝas la ludo ŝekerli!.

Hakob emociite misglutis kraĉon kaj plu ne ridis. Li mallaŭte diris al gastoj:

- Ni metis sitelon da akvo ĉe la toniro. Se nia Vardan iru al la sitelo kaj tuŝu ĝin aŭ siajn manetojn trempu en akvon, li iĝos fiŝkaptisto.

- Se ne? - demandis unu el gastoj.

- Do, ne iĝos, - diris Hakob. Poste Hakob diris, - se li preterpasu sitelon kaj haltu ĉe toniro, longe rigardu fajron de toniro, kie mia edzino bakis paŭlvaon, do li iĝos metiisto.

- Jes, li iĝos metiisto, - diris Tsovinar, - tio same ne estas malbona.

- Sed se li metos maneton sur Biblion, metitan apud la lulilo, - diris la avino, - en tiu okazo li iĝos Diadora homo, eble eĉ pastro.

- Jes, pastro, - konsentis patro de Vardan.

- Kelkaj gastoj aplaŭdis kaj ekkriis: "Pastro! Pastro!"

Ŝajnis, ke Hakob ne pensis plu aliajn variaĵojn. Li malcerte rigardis ĉirkaŭen kaj gratis sian vilaĝanan kranion.

- Se li irus al stalo, iĝos vilaĝano, - diris Tsovinar.

- Estas ĝuste, - diris Hakob.

- Li kulturos siajn kampojn kaj atendos sunon kaj pluvon, - diris Tsovinar.

- Ĝuste tiel, - diris Hakob.

- Sed se li irus al la pordo kaj rigardus eksteren, li iĝos aventurulo, - diris Tsovinar.

- Ĉu aventurulo?

- Jes.

- Kio estas aventurulo?

- Mi same precize ne scias, - diris Tsovinar.

Unu el gastoj diris:

- Aventurulo estas tia homa, kiu dum vivo serĉas danĝerojn, ekzemple la aferisto.

- Do, ĉu iĝos aferisto? - demandis Hakob.

- Ĝuste tiel.

- Ĉu vi konsideras la veran aferiston? - demandis Hakob.

- Certe.

Nun ekridis praavino, jam malsaĝa, kaŭrinta ĉe la toniro, rigardante ĉirkaŭen. La praavino subite vigliĝis.

- Aferisto, - ridetis ŝi, - li iĝos milionulo!

Hakob malrapide kapjesis: - Do ĉu milionulo?

- Kial ne, - diris Tsovinar, - ŝi pravas. Eble li vere iĝos aferisto, kaj havos milionojn kaj feliĉigos nin ĉiujn.

Tsovinar daŭris firme teni fileton, malgraŭ eta Vardan ree kriis, skuis brakojn, saltetis sur piedetoj, ĉar li deziris liberiĝi kaj ekkuri.

- He, kion vi pensas? - demandis Hakob ĉiujn, - kia estas via opinio? Ĉu li iĝos vilaĝano, aŭ metiisto, aŭ fiŝkaptisto, aŭ pastro, eble aferisto?

La homoj streĉite rigardis etan Vardan, kiun la patrino finfine forlasis. Vardan plu ne ploris. Li staris memstare sur siaj piedetoj kaj rigardis ĉirkaŭen. Poste li paŝetis al sitelo – plena de akvo, metita ĉe la toniro. Eble iu frapis sitelon, ĉar la akvo per strangaj cirkloj ondetiĝis. La matena suno kun siaj karesemaj radioj penetris ĉambron kaj kvazaŭ ridetis al cirkloforme ondetiĝanta akvo. Al Vardan ŝajnis, ke ridetas la akvo kaj nenio stranga estas en ĝi. Vardan paŝetis al rideta akvo, proksime distingis ridetatan akvon. Sed la sitelo estis metita ĉe la toniro. Ĉar la avino multe da seksterkon ĵetis en toniron, la fajro krakante-klare ekflamis. Tio derivigis iron de Vardan.

- Li iĝos fiŝkaptisto! - ekkriis la partino. - Nu, rigardu, li iras al sitelo. Mi vetas, ke li siajn manetojn ŝovos en akvon.

- Li iĝos fiŝkaptisto, - diris Hakob – lia patro.

Poste el amaso iu ekkriis:

- Ne, li ne haltis antaŭ sitelo, li iras al toniro. La fajro allogis lin.

Kaj aliulo ekkriis:

- Li iĝos metiisto!

Kaj ĉiuj ekkriis:

- Metiisto, metiisto!

La homoj aplaŭdis, iuj fajfis, aliuloj ridis aŭ ridetis.

- Tio estas pli honora afero, - ekkriis iu!

Tamen Vardan haltis nek antaŭ sitelo, nek toniro, nek Biblio – metiita apud la lulilo. Li iris al stalo, ĉar el tie aŭdis animalajn voĉojn.

- Li iĝos vilaĝano, - ekkriis la avino. - Nu, mi sciis. La vera Ĥatisjan devos iĝi vilaĝano.

- Estas ĝuste, - diris Hakob, - lia sango estas mia sango.

- Ankaŭ mia, - diris Tsovinar.

Sed Vardan ne iris stalon, malgraŭ la animalaj voĉoj allogis lin. Li turnis kaj kuris al malfermita pordo, ĉar kun frua mateno de tie penetris sunaj radioj. La frua mateno kunportis odoron de arboj, de floroj, de herbejoj kaj birdajn ĉirpadojn – pli allogan, plezuran, ol la mallaŭtaj voĉoj de animaloj en stalo.

- Li falos. - Ekkriis iu.

La aliulo ekkriis:

- Ne, li ne estas unu el tiuj, kiuj falas sur kapo, li antaŭ scias, kion volas.

- Rigardu, li iras al pordo.

- Li iĝos aventurulo.

- Aferisto!

- Aferisto!

La praavino denove ekkriis:

- Jes, aferisto. Li havos milionojn. Kaj siajn maljunajn manojn etendis al Vardan kaj ekkriis, “**Aĉked lujs**”, ŝafideto mia!

- Kaj vere, - diris la fabelisto, - via patro paŝetis al malfermita pordo kaj longe rigardis eksteren, kvazaŭ volis eliri. Sed ne.



- Sed kial ne, Meddah? - demandis la Lasta Penso.

- Via patro haltis ĉe porda sojlo, - diris la fabelisto, - haltis kaj per siaj grandaj okuloj rigardis eksteren, sed plu nenion paŝon.

- La homoj seniluzigitis, - diris Meddah, - ili inspiris vian patron, sed li ne volis daŭri vojon. Li simple haltis ĉe porda sojlo, kvazaŭ timante grandan eksteran mondon. Inter la gastoj estis la pastro. Hakob demandis lin: "Kion tio signifas?" La pastro pensis kaj diris:

- Li iĝos nek aferisto, nek aventurulo, ĉar ne kuraĝas eliri eksteren – al reala vivo.

- Sed li rigardas eksteren, - diris Hakob.

- Estas ĝuste, - diris la pastro. - Li estas unu el tiuj homoj, kiuj rigardas, sed nenion iniciatas.

- Sed li ne iris ankaŭ stalon. Li nenion volis scii nek pri toniro, nek pri Biblio, nek pri sitelo – plena de akvo.

Tiam la neinteligenta patrino de avino ekkriis:

- Mia Vardan observas.

La homoj ekridis kaj diris:

- Li staras ĉe porda sojlo kaj observas. Ni vetas, ke li nenion iniciatos.

Unu el gastoj kraĉis sur sia manplaton, masaĝis la okulojn, ekridis kaj diris:

- Li iĝos observanto, gapulo.

Aliulo diris:

- Li iĝos revemulo.

Sed la pastro diris:

- Li verŝajne iĝos poeto.

Ĵus la pastro diris tion, la patrino de Vardan ekdeŝiris siajn harojn kaj malĝoje ŝancelinte iris al la toniro. Ŝajnis, ŝi volas varman cindron ŝuti sur sian kapon. Hakob rapide fortiris ŝin. Jam estis klare. La bona humoro malaperis. La gastoj estis konfuzitaj. Hakob ankaŭ estis

konfuzita. Li tute nek aŭskultis pri kio interflustris gastoj, nek aŭskultis konsolajn vortojn – diritajn de kelkaj maljunuloj al Tsovinar.

-Ne ĉio tute estas malbona, - diris Hakob trankviligante Tsovinar. Pli bone esti poeto, ol neniu.

- Sed li ne scipovos nutradi sian familion.
- Do, ni devos nutradi lian familion, - diris Hakob.
- Liaj heredantoj mortos pro malsato.
- Ili ne mortos pro malsato, - diris Hakob.

- Inter gastoj, - diris Meddah, - estis same la vilaĝestro de Jedi Suo – muĥtaro Jeprem Abovjan, kiun facile estas koni pro kurdaj grandegaj lipharoj kaj ruĝa, senmakula feso, sub kio li kaŝis sian grandan kalvaĵon.

- Kial li kaŝas sian kalvaĵon sub la feso, - demandis la Lasta Penso.

- Ĉar la homo – estimanta sin, ĉiam devos porti feson. Sed ankaŭ pro muŝoj, pro iliaj jukigantaj piedetoj, ĉar muĥtaro Jeprem Abovjan estas ekscitema homo.

- Kaj kion vi diros pri senmakula feso?
- Tio estas la sola pura feso en tuta vilaĝo.
- Do, ĉu li estas pedanta kaj purema homo?
- Jes, verŝajne estas tiel.
- Ĉu ekzistas io speciala rilate feso?
- Jes, ŝafideto mia, la feso estas ankaŭ fama.
- Pro kio ĝi estis fama?

- La afero estas tia, - diris la fabelisto, - kiam vilaĝanoj elektas novan vilaĝestron, ĉiuj kandidatoj siajn fesojn turnante metas sur kupran pleton. La vilaĝaj superuloj kaj ĉiu ĉefo de mastrumoj metas po unu juglandon en feson – elektitan de si. En kies feso kolektiĝas la plej multaj da juglandoj, tiu homo iĝas vilaĝestro.

- Cu dum la lasta elekto en feso de Jeprem Abovjan estis plej multaj da juglandoj?

- Ĉerte, - diris la fabelisto, - ĉar Jeprem Abovjan estas la plej riĉa homo en vilaĝo, kaj neniu volas malbonigi siajn rilatojn kun li.

- Ĉu vilaĝanoj ĉiam elektas la plej riĉulon?

- Jes, - respondis la fabelisto. - Ĉiam elektiĝas la plej riĉulo – same la plej potenco.

- Se vi deziras vidi ĉion per miaj okuloj, - diris Meddah al la Lasta Penso, - kaj vin iomete helpus via imago, vi vidos, ke la patrino de Vardan eligis el toniro freŝan paŭlavaon, metis sur kupran pleton kaj regaligis gastojn. Kiel vi vidas, ŝafideto mia, ŝi antaŭe proponas al vilaĝestro kaj lia edzino. Poste laŭ vice ŝi proksimiĝis al sekvontaj gastoj. La lasta estis akvoportisto Hovhanes – la plej malriĉa en vilaĝo, li nek edzinon havas, nek infanon. Li estas vestita ĉifonaĵojn kaj fiodoras, kiel azena furzo en senfenestra stalo. Li balbutas, strabas okulojn, havas nervozan tikon kaj ĝenerale estas mizerulo, kompatindulo. Mi neniam komprenis, kial la vilaĝaj infanoj mokas lin kaj provokas hundojn fipersekuti lin.

- Ĉu li estas ankaŭ la vilaĝa stultulo?

- Jes, li ankaŭ estas vilaĝa stultulo.

La edzino de vilaĝestro estas graveda, kaj vi vidas, ke ŝi nun puŝas edzon, ion flustras ĉe lia orelo kaj samtemple montras akvoportiston.

- Sed tio ne povas esti, - diras la vilaĝestro.

- Sed estas tiel, - diras la edzino, - la akvoportisto havas malican rigardon.

- Nu, ni supozu, ke estas tiel, - diris la vilaĝestro.

- Li ĉiam rigardas mian ventron, - diras la edzino de la vilaĝestro, - mi vetas, ke pro tio okazos malfeliĉo.

- Nu, kia malfeliĉo?

- Povas esti, ke nia infano naskiĝos ne fileto, sed filineto.

- Tio ne gravas, - diras la vilaĝestro, - ni jam havas sep filojn, la oka estu filino.

Nun la patrino de Vardan kun pleto denove proksimiĝas al ili.

- Ĉu ankoraŭ pecon de paŭlavao? - demandis ŝi edzinon de vilaĝestro.

- Mi subite perdis apetiton, - respondas la edzino de la vilaĝestro.

Ĉu vi povas forigi akvoportiston el domo?

- Hodiaŭ li estas nia gasto, - diris la patrino de Vardan. Tio ne eblas.

- Ĉu vi kredas, Tsovinar, tiu diablo havas malican rigardon?

- Ne, - diras la patrino de Vardan.

- Sed li daŭre rigardas mian ventron.

Li rigardis ankaŭ mian ventron, - diras la patrino de Vardan, - tamen, kiel vi vidas, mia eta Vardan estas tute normala infano. Li estas bela knabeto, en unu kaj duona jaraĝo jam kuras kiel dujaraj knabetoj.

- Jes, li estas bela kaj forta infano. Sed ĉu estas normale, ke li volas iĝi poeto?

- Vere, ne, - diras la patrino de Vardan.

- Eble tio ligiĝas kun malica rigardo.

- Ĉu vi pensas, ke la akvoportisto...?

- Mi pensas, ke ĉio eblas.

- Mi devas demandi mian edzon.

Kaj la patrino de Vardan demandis Hakob:

- Ĉu vi kredas, ke la akvoportisto havas malican rigardon?

- Pri tio mi devas demandi pastron, - diris Hakob.

Kaj Hakob demandis pastron. La pastro malcerte diras:

- Ĉio eblas, Hakob efendio, ĉar la akvoportisto ne havas edzinon, kaj mi, kiel pastro, scias, ke li neniam havis edzinon. Nedelonge li estis kaptita de mi.

- Kie li estis kaptita?

En stalo – malantaŭ preĝejo. Tie li malantaŭe aliĝis kun mia

azenino.

- Sed kiel li aliĝis?
- Nu, vi scias, pri kio mi parolas, Hakob efendio. Li seksumis kun azeno, precize kun azenino.
- Nu, pri kiaj aĵoj vi parolas!
- Kaj eblas, ke li havas malican rigardon, ĉar tiun aferon la homo ne devas fari kun animaloj.

#### 4.

Post la festo de “Unaj paŝoj” de Vardan, Hakob kaj lia edzino nokte dormis maltrankvile kaj sonĝis strangajn sonĝojn. Ĵus ili matene vekigis, Hakob diris al sia egzino:

- Mi sonĝis, ke la malica rigardo de akvoportisto, knabeton farigis knabineto en ventro de edzino vilaĝestro.

- Mi same tion sonĝis, - diris Tsovinar.  
- Ekzistas kutimo, ke la knabineton oni fianĉas ankoraŭ en lulilo. Ekzemple vi fianĉigis kun mi, kiam vi ne sciis vian nomon, - diris Hakob.

- En sekvonta tago post mia bapteco.
- Jes, en sekvonta tago post via bapteco.
- Vi estis pliaĝa, ol mi, mia Hakob, jam tri jara kaj scipovis kalkuli.
- Mi povis kalkuli ĝis tri, - diris Hakob.
- Jes, - diris Tsovinar.

Tsovinar diras:

- Tiam via patro venis ĉe mia patro kaj de via nomo petis mian manon. Poste ili interŝanĝis monerojn, ĵetis ilin en toniron kaj konfirmis fianĉecon – reciproke manpremanante.

- Ĝuste tiel okazis, - diras Hakob.
- Mi ne sciis, ke la akvoportisto posedas malican rigardon, sed ĉar ni ambaŭ sonĝis pri tio, signifas, ke vere estas tiel.
- Jes, - diras Tsovinar.

Kaj Hakob diras:

- Estas ĝuste, tiel estas.

Kaj Tsovinar diras:

- Ĉar la malica rigardo de akvoportisto farigas knabon knabineto en ventro de patrino, estos ne malbone, ke la riĉa vilaĝestro fianĉu sian knabineton kun nia Vardan – same sorĉita en mia ventro, alimaniere li ne decidis iĝi poeto.

Vi pravas, - diras Hakob kaj aldonas, - morgaŭ mi parolos kun la vilaĝestro.

Sed okazis tiel, ke vilaĝestra graveda edzino naskis knabeton. Kaj kiam Vardan estis nur tri jaraĝulo, la vito al vilaĝestro kaj al lia edzino donacis knabineton.

En sekvonta tago, post Bapteco, kaj tio estis la naŭa tago, Hakob iris vilaĝestran domon, de nomo de Vardan peti manon de lia filino. Vere, la vilaĝestro rimarkis, ke li ne deziras sian filinon fianĉi kun nenifarulo – dezirinta iĝi poeto. Sed Hakob trankviligis lin kaj ankaŭ diris, ke ĉar la paŝtejo de Ĥatisjanoj limiĝas kun paŝtejoj de muĥtaro, kaj ĉar estas ĝuste tiel, sed ne alimaniere, en estonteco neniu disputo estos inter ili rilate pravoj de terpecoj aŭ vinberejoj k.t.p., k.t.p. Krom tio, - tiel diris Hakob, - si mem havas kokon, nomitan Abdul-hamid, kiu estas la plej bona koko en vilaĝo Jedi Suo, kaj se vilaĝestro, t.e. myĥtaro, volus, mem Hakob la saman kokon Abdul-hamid, senpage donus al muĥtaro, se, kompreneble, tiu estos deziro ankaŭ de lia edzino.

- Ĝuste tiel okazis, - diris la fabelisto al Tovma. - La viroj interŝanĝis monerojn, kiujn poste ili ĵetis en toniron kaj reciproke manpremis. Poste ili intertuŝante glasetojn drinkis brandon por sano de Vandan, t.e. same de lia fianĉino – antaŭ unu tago baptita laŭ armena nomo **Arpine**, armene signifanta “levantan sunon”. Hejme ĉiuj gratulis Vardan – vian trijaran patron, okaze fianĉiĝo. La najbaroj

venadis odaon prenis sur siajn brakojn vian patron kaj diris: “**Aĉked lujs!**” Kelkaj najbaroj diris: “Jesuo Kristo gardu vian fianĉinon de kurdoj”.

- Ĉu ili timis, ke la kurdoj ŝin defloros, ĝis mia patro edziĝos?

- Estas tiel, ŝafideto mia. Certe, via trijara patro ankoraŭ ne komprenis, kio okazas ĉirkaŭ si, kial ĉiuj gratulas sin kaj kion signifas virga membrano, kiun la fianĉino devos gardi por fianĉo. Li ne sciis ankaŭ, ke sia parto, interŝanĝante monerojn kun vilaĝestro, diris al li: “Bone gardu mian bofilinon, myĥtaro bejo, por ke neniu defloru ŝin”.

La vilaĝestro diris:

“Hakob efendio, via filo edziĝos kun virgulino, mi promesas. Nenia kurdo forŝtelos ŝin, ne havos aferon kun ŝi. Miaj rilatoj kun kurda ŝejko Sulejman estas bonaj. Ĝustatempe mi pagas impostojn, donas animalojn kaj grenon, mi devos ankaŭ pagi edziĝimposton, t.e. duonon de fianĉinpago, donotan de mi, por mia filino”.

- Kiel, Meddah! Ĉu la kurdoj vere deziras deflori ankaŭ malgrandajn knabinojn, kuŝitajn en lulilo?

- Ne, ŝafideto mia. Ili deziras, kiam la knabino iĝas seksa maturaĝulino, nu en deka, dekunua, dekdua jaraĝo.

- Mi jam rakontis por vi, ŝafideto mia, ke armenoj timas nek urboloĝantajn kurdojn, nek duonnomadajn el malpuraj vilaĝoj. Ili timas montajn, sovaĝajn, banditajn kurdajn gentojn. Ili spionoj estas ĉie. Ili precize scias, kio okazas en armenaj vilaĝoj, kiu estas riĉulo, kiu ne, kiu havas knabon kaj kiu knabinon. Ili scias knabinajn jaraĝojn, kiam ili iĝos maturaĝaj.

Jen tiam kurdoj venas kaj simple forportas knabinojn. KREDU MIN. Estas tiel. Pro tio laŭ eblecoj la armenoj frue edzinigas knabinojn, ĉar ili estas dezirintaj nur kiel virgulinoj. En malproksimaj montplataj sendefendaj vilaĝoj por kristanaj virgulinoj la sovaĝa kurdo tutkorpe estas simbolo de teruroza, rompanta, neniiganta viro. Ĉio lia estas

osta, pika, eĉ la malhela rigardo.

Kiam, post kolekto de rikolto, la kurdoj rajdas tra vilaĝoj – postuli imposton por ŝejko, la virgulinaj pro teruro kaj emocio urinas en siaj ligilulaj pantalonoj. La urino malsekigas iliajn femurojn, ĉar la loboj estantaj inter piedoj de virgulinaj pro teruro algluiĝas; ili plu “ne parolas”, “ne demandas” kaj nur streĉite premiĝas kaj dum iometa tempo ne povas disiĝi, kvazaŭ sankta Virgulino Maria zorgeme kudris unu al alian.

Mi vidas demandon en viaj okuloj, ŝafideto mia. Kaj mi diras al vi:

- Ĝuste tiel estas. La armenoj ne scipovas defendi siajn virinojn, ĉar ili ne rajtas havi armilon.

- Ĉu ĉar ili estas kristanoj?

- Ĝuste tiel.

- Sed ĉu la kurdoj?

- La kurdoj estas mahometanoj. Ĉiu mahometano rajtas havi armilon.

- Kaj kion pri turka registaro? Kial ili ne defendas armenoj de kurdoj?

- Ĉar turkoj ne estas interesigantaj, ŝafideto mia. Ili timas neobeecon de kristanoj, kaj pro tio turkoj konsentas, ke la kurdoj terurigu senkredulojn – kristanojn. La kurdoj estas, tiel nomata, etendita sultana mano – tenanta senkredulojn en teruro.

- Sed kion faras la juĝantaroj?

- Pri kiaj juĝantaroj vi parolas?

- Mi konsideras, kiam la armeno metas plendon ĉe juĝistaro kontraŭ kurdo.

- Iam tio okazas nur en urboj, sed ne en malproksimaj vilaĝoj, ĉar, ŝafideto mia, en vilaĝoj zaptiĥoj mem timas kurdojn. Sekvonte, kiu povas kapti kurdon kaj juĝi? Eĉ la bravaj zaptiĥoj, tiaj ankaŭ ekzistas, ĉu povos batali kontraŭ tuta kurda gento, aŭ persekuti kurdojn en montpasejoj, en ravinoj?



- Do, ĉu la kurdojn turkoj ne juĝas?
- Ne juĝas, safideto mia. Sed eĉ iu armeno sukcesos atingi juĝon, nenio utilo estas, ĉar la kristano ĉiam estas kulpa antaŭ kadio, eĉ escepte, se li havos du mahometanajn atestantojn.
- Kiun, certe, la kristano ne havas.
- Pleje li ne havas, sed povas okazi, se li aĉetos du falsajn atestantojn.
- Ĉu tio eblas?
- Eblas. Sed en la okazo, kiam kurdo forŝtelas kaj defloras knabinon, la juĝo ne konsolas plendantojn – nek filinon, nek ŝian patron.
- Kial Meddah?
- Nu, kial, safideto mia? Ĉu la gajnita juĝo revenigos la perditan virgecon aŭ virginan membranon? Kaj neniam armena viro, respektanta sin, ne edziĝos kun tia knabino. Li ja kun ŝi plenumas sakramentan proceduron kaj naskos kristanajn infanojn. Nu, kiel vi vidas la gajnita juĝo ne havas sencon.

Tiel, la vilaĝestro promesis al via patro donaci virgulinon, gardi ŝin kaj defendi de kurdoj. La sola vilaĝa zaptiĥo – platplandula, kalva Ŝekir efendio, post la fianĉeco en vilaĝa kafejo drinkis rakion kun la vilaĝestro, promesis ĉion fari kaj defendi infanon.

- Neniama neniu povas scii, muĥtaro bejo, - diris li al vilaĝestro, - ĉu la kurdoj truigas infanon per fingro, aŭ ŝovas ion, ekzemple safidetan maldikan oston, aŭ nuksarbetan maldikan stangeton, aŭ floran trunketon, aŭ ion similan? Nedelonge mi aŭskultis, ke kurdoj forŝtelis mamnutratan infanon.
- Kial? - demandis la vilaĝestro.
- Por ke flegi, ĝis ŝi kreskos kaj komencos sangflui.
- Kiel sangflui, zaptiĥo aghao?
- Ĉiumonate, laŭ la ordo.
- Kaj poste?

- Poste kurdoj defloros ŝin sen ia stangeto, sen ŝafideta maldika osto, sen flora trunketo aŭ sen io simila.

- Sed kiel, efendio?

- Nu, kiel, muĥtaro bejo, per tio kion havas kurdo inter siaj femuroj, kaj plejparte sufiĉe grandan.

Ili drinkis rakion kaj dolĉan kafon per tasetoj. La vilaĝestro sciis, ke la zaptiĥo diras pri tio, por ke terurigi kaj ĉiam ricevi drinkmonon. Krom tio la vilaĝanoj donas al li viandon, farunon, fruktojn.

- Kaj ĉu vi vere volas gardi ŝin, Ŝekir efendio?

- Mi ŝin gardos, kiel mian okulon, - respondis zaptiĥo, - je l' nomo de Alaho. Kaj kiam la kurdoj sekvontfoje alvenos forpeli animalojn, mi staros antaŭ via pordo kaj gardos, ke ili ne forportu infanon.

Kaj zaptiĥo, ĉar konfirmi siajn vortojn, per fingro batetis sian malnovan pafilon:

- Mi ŝin gardos, kiel propran knabinon.

- Sed vi ja ne havas infanojn, Ŝekir efendio. Vi ne havas knabineton.

- Bedaŭrinde ne, - diris la zaptiĥo. - Mia edzino forkuris, kaj kiu scias kie ŝi vagadas.

- Kial ŝi forkuris, zaptiĥo aghao?

- Ĉar ŝi ne povis gravediĝi, - respondis la zaptiĥo, - kaj ĉar mi minacis mortigi ŝin, se ŝi ne gravediĝos.

La vilaĝestro kapjesis kaj diris:

- Jes, Ŝekir efendio.

Kaj li pensis: la zaptiĥo ne atencos kontraŭ mia filino, se promesis gardi ŝin. Ne havante edzinon, li sian viran aferon faras kun azeninoj, aliĝante malantaŭe kun ili, kiel la stultula akvoportisto, kiun kaptis la diabloj, pro kio li havas malican rigardon.

En la vilaĝo estis ankoraŭ alia homo, pri kiu oni diras, ke ankaŭ havas malican rigardon. Tiu estis vilaĝa forĝisto – ruĝharula Gevorg Hakobjan. La problemo estis tia. Multaj virinoj per henao tinkturis siajn harojn, kaj poste ili kovris siajn ruĝajn harojn per kaptuko. Sed la haroj de forĝisto ne estis tinkturitaj nek per henao, nek per artefaritaj farboj

– alportitaj de Frankistano. Ilin donis la Dio. Kaj ĉar tio estis ne ordinara, sekvonte estis ankaŭ dubinda. Ĉu la normala homo de armena deveno havos ruĝajn harojn? Eble la amoza Dio punis nenaskitan infanon en patrina ventro, por ke li estu ruĝharula. Ĉu eble tio estis diabla afero? Verŝajne la patrino de forĝisto ĉu havis aferon kun diablokultistoj aŭ ciganoj, kiuj ĉiuj, estas konata fakto, havas malicajn rigardojn? Aŭ pravas la pastro Gabriel Hamadjan – foje rakontinta al vilaĝanoj en tombejo sekvonton:

- Mi diras ĝustecon. Mi scias kaŭzon de ruĝaj haroj, ĉar la patrino de ruĝhara forĝisto ĉion rakontis al mi.

- Sed ŝi neniam iras pentokonfesi, pastro.

- Estas ĝaste. Sed mi sonĝis ŝian pentokonfeson.

- Kaj kion vi sonĝis, pastro?

- Mi sonĝis, - diris la pastro, - ke la patrino de tiu ĉi ruĝhara diablo venis pentokonfesi.

- Kaj kion ŝi konfesis?

- Ŝi diris al mi: “Ĉu vi memoras, pastro, tiun ruĝharan irlandanon, kiu antaŭ naskiĝo de mia filo – ruĝhara forĝisto, estis en nia vilaĝo?”.

“Certe, memoras”, - diris mi.

“Tiu falsa sanktulo tiam deziris vian tutan gregon iĝigi katolikanoj, malgraŭ ni ĉiuj sciis, ke nia Savanto – Jesuo Kristo, ne povas havi du naturon, kiel opinias la katolikanoj, sed laŭ la logiko Li havas nur unu – Dian. Kaj nia Gregoria kredo estas la sola, vera kredo”.

“Vi pravas, - diris mi, - sed kion vi volas konfesi, filino mia?”

“Ŝajnas, - diris la patrino de ruĝhara forĝisto, - ke tiu ruĝhara irlandana predikisto ekposedis min, kiam mi dormis, malgraŭ mi ne estas tute konvinkita, ĉar estis juna kaj profunde dormadis, tiel profunde, ke mi nenion povis scii”.

“Sekvonte, ĉu tiu ĉi falsa sanktulo ekposedis vin aŭ povis ekposedi vin?” - diris mi.

“Jes, pastro”.

“Ĉu kaj tiel eblas ekspliki kaŭzon de ruĝaj haroj de via filo?”

“Jes, pastro”, - respondis ŝi.

Tiel aŭ aliel, - diris Meddah, - la ruĝhara forĝisto por Vardan estis la plej grava homo post sia patro.

- Sed kial?

- Ĉar li estis baptopatro de Vardan.

- Ĉu baptopatro? Kiel?

- Guste tiel, ŝafideto mia. La ruĝhara forĝisto estis bapto de via patro, ĉar por bapto Hakob ne povis trovi alian baptonon.

- Sed ĉu Hakob ne timis lian malican rigardon?

- Ne, - diris Meddah, - ĉar avino Hamest, pri kiu vilaĝanoj diris, ke ŝi ĝisfunde vidas ĉiujn, diris: "Hakob, la forĝisto estas persono, kiun ni bezonas, kiel bapto, ĉar li havas bonajn okulojn. En liaj okuloj nenio estas diabla". Nu, se ŝi diris tiel, do ĉiu devas consenti.

En vilaĝo ĉiu homo sciis, ke armenaj forĝistoj estas savantoj de la mondo, kvankam eniuloj kaj malamikoj de Gevorg Hakobjan ne volis konfesi tion.

- Sed kial armenaj forĝistoj estas savantoj de la mondo?

- Pri tio rakontas armenaj fabeloj, precipe fabeloj pri monto Ararato.

- Kiel Meddah?

- Estas tiel, ŝafideto mia.

En monto Ararato estis malliberita giganto Mher<sup>22</sup> – enkatenigita al roko. Sur lia frunto estis kreskintaj kornoj. Lin gardis sovaĝaj hundoj, nigraj kornikoj kaj venenulaj serpentoj. Sed iutage en nokto de Ĉieliro de Kristo, Mher devos forĵeti ĉenojn kaj eliros el monto – neniigi tutan mondon.

- Sed kial li faros tion, Meddah?

- Nu, ŝafideto mia, la Tero estas argila sofrao – duonronda pleto,

---

<sup>22</sup> La aŭtoro miksis la legendon pri armena eposa heroo Mher kun la legendo pri armena reĝo Artavazd la Unua. Presentita historio rilatas al Artavazd la Unua.

sur kio nia Dio dislokis ĉiujn aĵojn – ŝatatajn de Si. La gigantan sofaon anĝeloj tenas – regule ŝanĝiĝante. Ĉiuj konstelacioj turniĝas ĉirkaŭ la argila sofao – nomata de homoj Terglobo. Kiam la giganto Mher forĵetos siajn ĉenojn, li furioze muĝante eliros el monto, per siaj grandegaj manoj renversos la sofaon kaj ĉio amata de Dio forfalos en abismon kaj neniigĝos.

- Ĉu la floroj ankaŭ?

- La floroj ankaŭ.

- Ĉu la arboj ankaŭ?

- La arboj ankaŭ.

- Sed ja ili estas firmitaj en tero!

- Ĝuste tiel, ŝafideto mia, sed estas tiel.

- Mi opiniis, ke povas fali nur aĵoj nefirmitaj en tero.

- Ne, ŝafideto mia. Se la giganto renversus sofaon, plu nenio restus sur ĝi.

- Ĉu nenio amata de Dio?

- Plu nenio, ŝafideto mia. Ĉio amata de Dio ekstermiĝus. Kaj ĉiu mondo ekstermiĝus, ĉar neniu senco restus, se ĉio amata de Dio forestus.

- Ĉu simple forestus?

- Guste tiel.

- Sed kian ligon havas kun renverso armenaj forĝistoj? - demandis la Lasta Penso.

- Tre gravan ligon, ŝafideto mia. La forĝistoj de tiu ĉi landparto ekde Paska lundo ĝis Ĉielira frumateno, tri foje frapadas per martelo amboson. Kaj poste tio maldikitaj ĉenoj de giganto ree firmiĝas. Sekve, la giganto ne povas liberiĝi kaj pereigi la mondon.

- En tiu okazo ĉu la armenaj forĝistoj vere estas savantoj de la mondo?

- Estas tiel.

- Ĉu ankaŭ ruĝharula forĝisto Gevorg Hakobjan – la baptopatro de mia patro?

- Precipe, ĉar li frumatene tri foje frapadas per martelo amboson ne nur ekde Pasko ĝis Ĉieliro, sed dum tuta jaro.

- Ĉu ĉiumatene?

- Jes, ŝafideto mia, ĉiumatene, pro singardeco. Nu, ĉar ni parolas pri tempo ekde Pasko ĝis Ĉieliro, mi devas por vi rapide same rakonti alian malgrandan historion.

En Jedi Suo en la Ĉielira tago armenoj festas paganan strangan feston, preskaŭ ne havantan ligon kun Ĉieliro de nia Savanto. Kaj tamen ĝi iomete havas ligon, ĉar mi estas konvinkita, Jesuo Kristo ĝojus sciante, ke la infanoj de vilaĝo Jedi Suo en la tago de Sia Ĉieliro kalkulas stelojn.

- Kiel tio okazas, Meddah?

- Tio okazas tiel, - diris Meddah. - En Ĉielira tago de Kristo, frumatene, ĉiuj infanoj kolektiĝas sur vilaĝa placo. Kaj ili aranĝante grupojn iras kampojn kaj herbejojn, ŝiras florojn kaj per ili ornamiĝas. Ĉi tiun feston la armenoj nomas **Viĉak**<sup>23</sup>, kaj ĝi havas ian ligon rilate kun suna dio Mihr.

- Ĉu ĝi estas flora festo?

- Ne, ŝafideto mia. Vere, ne. Tio estas festo de eventualecoj, stelkalkulo, ankaŭ partoprenantoj divenas siajn sortojn.

- Kaj kiel tio okazas, Meddah?

- Tio okazas jen kiel, - diris Meddah. - Post ornamigo sin per floroj, la knabinoj kunprenas argilajn potojn, iras al Jotnaghbjur<sup>24</sup> -. Dum irado, survoje, ili ne rajtas rigardi nek flanken, nek malantaŭen. En vilaĝo Jedi Suo kun ili iras ankaŭ la akvoportisto, ĉar por knabinoj estas malfacile levigi akvon el profunda fonto.

- Ĉu tion faras akvoportisto?

- Li lignan pezan sitelon malsuprenigas en profundon de fontoj,

---

<sup>23</sup> Armene - sorto, diveno de estonteco.

<sup>24</sup> Armene. Nomo de sep tre proksimaj fontoj, kiuj estigas profundan akvabasenon – Sepfontojn .

levigas plenan sitelon kaj metas ĉe piedoj de knabinetoj – nerajtantaj rigardi nek flanken, nek malantaŭen. Poste la knabinetoj, krucante manojn sur siajn dorsojn, prenas akvon el sitelo – certe per buŝo.

- Ĉu per buŝo?

- Jes, ŝafideto mia. La knabinetoj faras tiel, kvazaŭ trinkas freŝan akvon. Sed ne trinkas, la akvon knabinetoj verŝas en siajn argilajn potojn – alportitajn al Sepfontoj. Tiel ili plenigas argilajn potojn, poste en potojn ĉiu el ili metas aŭ ŝtonon, aŭ butonon, aŭ alian aĵon kaj iras preĝejon. Tie jam atendas la pastro Gabriel Hamadjan, kies afero en Ĉielira tago estas beni akvon de knabinetoj, kaj kion li faras. Post tio li la knabinetojn kun siaj potoj sepfoje turnigas ĉirkaŭ la preĝejo.

- Kaj kion poste, Meddah?

- Poste la knabinetoj iras hejmen kaj kaŝas la potojn jam kun sakramenta akvo. Vespere ĉiu el ili kun sia poto leviĝas sur tegmenton, metas poton ĉe fumtruo kaj lasas tie, por ke la sakramenta akvo de festo Viĉako kalkulu stelojn.

- Ĉu vere la sakramenta akvo kalkulas stelojn?

- Jes, ŝafideto mia, ĝuste tiel, kiel la dio de suno Mihr ĉiunokte kalkulas la stelojn en ĉielo, por vidi, ĉu ĉiuj sunfiloj estas sur siaj lokoj?

## 5.

Kiam Vardan estis trijaraĝa, en Ĉielira tago la pliaĝaj vilaĝaj knaboj lin kondukis al kampoj kaj herbejoj. Ili ornamis Vardan per floroj kaj, preninte sur siaj ŝultroj, promenis. Poste la knaboj atingis knabinetojn ĉe Jotnaghbjur – Sepfontoj, mokis ilin kaj ĵetis sur ili birdajn ovojn – precipe kolektitajn. Unu el knaboj diris al Vardan:

“Vi estu atenteme! La knabinetoj kaŝos potojn plenajn de sakramenta akvo. Ni provu trovi potojn, ĝis la knabinetoj ilin levigos sur tegmentojn – kalkuli stelojn. Etulo, estu atenteme! Vi ŝtelu unu poton, poste postulu elkaŭciigon de knabineto. Kaj vi, ricevinte elkaŭciigon, redonu poton”.

Kaj via trijara patro, nekompreninte kio estas elkaŭcipago, demandis:

“Ĉu kaŭcion?”

La pliaĝaj knaboj ekridis kaj diris:

“Jes, etulo, elkaŭciigo. La knabineto devos unu foje kisi vin, en kontraŭa okazo vi ne redonu poton, ĉu vi komprenas?”

Kaj via patro ekridis, malgraŭ nenion komprenis.

Dum la festo Viĉako, kiam la knaboj provokis vian patron preni elkaŭciigon, porke ricevi kison, okazis ankaŭ alia io, pri kio via patro rememoris pli poste.

- Kaj pri kio, Meddah?

- Pri historio de stulta akvoportisto.

- Kio okazis kun li?

- La knaboj dum tuta tago serĉis potojn – kaŝitajn de knabinetoj. Jam estis krepusko. Dum serĉado ili trovis la akvoportiston, kiam li aliĝis kun azenino de Ĥatisjanoj.

- Ĉu kun azenino?

- Jes, jes.

- Ĉu ĝi ankaŭ estis sennoma, kiel azenino de Bjulbjul?

- Ne, ĝia nomo estis Cejda.

- Kiel la akvoportisto eniris stalon, se nur pasante tra la ĉambro eblas atingi stalon?

- La azenino kun nomo Cejda ne estis en stalo, ĉar la avino ĝin lasis en korto – certe ligitan.

- Kaj kio okazis kun akvoportisto?

- La knaboj kaptis lin, fortiris, ligis lin kaj levigis sur tegmenton de Ĥatisjanoj. Kaj via trijara patro ĉion vidis. Kaj unu el knaboj diris al via patro: “Ni, punante akvoportiston Hovanes, ĉiun nokton lasos sur tegmento – kalkuli la stelojn”.

- Ĉu vere la akvoportisto dum tuta nokto restis sur tegmento, kaj kalkulis la stelojn?

- Ne, ŝafideto, mia, - diris Meddah, - tio ne estas bone, kiam



homo, kun malica rigardo, estis ĉe sankta akvo. Pro tio la avo de Vardan malsuprenigis kompatulon de tegmento.

- Nun pri avo de via patro. Mi ankoraŭ nenion rakontis pri li, ĉar li tute estis sub ombro de sia edzino. Li estis kompatinda homo – la kontraŭulo de sia edzino Hamest. En pasinteco li eble estis ĝoja, ŝercema homo, sed ĉio ŝanĝis.

- Ĉu en vivo de mia antaŭulo – de avo de mia patro, io okazis, pro kio li iĝis tia kompatinda?

- Jes, ŝafideto mia, - diris Meddah.

Kaj Meddah diris:

- La sovaĝaj kurdoj, vivantaj sur montoj, vintre siajn maljunulojn kaj malsanulojn sendas en malsuprajn armenajn vilaĝojn – tie vivi vintre. Maljunaj kaj malsanaj kurdoj estas neinvititaj gastoj, kiujn neniu kuraĝas rifuzi. Pleje ili vivas en stalo. Ili prenas manĝaĵon kaj ĉion necesan, certe, el tenejoj de armenoj kaj denove revenas stalon. Printempe ree ili malaperas.

- Kial neniu kuraĝas forpeli ilin?

- Ĉar en tiu okazo tuta kurda gento alvenos ne vivi en staloj, sed venĝi anstataŭ siaj maljunaj kaj malsanaj gentanoj. La kurda ŝejko sendos siajn rajdantojn – tranĉi vostojn de viroj, perforti virinojn kaj bruligi domojn.

Tiel: la avo de via patro en 1846 jaro malpermesis maljunajn kaj malsanajn kurdojn eniri en sian stalon. Sed tio iĝis kaŭzo de malfeliĉo, ĉar en sekvonta tago cent armilulaj kurdaĵaj rajdantoj invadis en vilaĝon. Avon de Vardan ili trenis en vilaĝan placon, nudigis kaj jam volis tranĉi lian voston, kiam lia edzino Hamest hurlante alkuris kaj petis indulgon de kurdoj. La kurdoj trankviliĝis kaj ne tranĉis lian voston, sed tranĉis liajn orelojn kaj vipbatis. Ĉi tiun lecionon la avo de Vardan neniam forgesis.

- Ĉu la vilaĝanoj ne rezistis?

- Ili neniam rezistas, ŝafideto mia. La sola vilaĝa zaptiĥo tremis pro timo, mordetis li siajn malpurajn ungojn kaj ridetis kiel stultulo, kiam unu el kurdoj forprenis lian pafilon, dirante:

“Ne travivu, via pafilo estas pli maljuna ol vi. La regantoj donos novan”.

- Sed kion faris la viroj de vilaĝo?

- Ili silente staris sur vilaĝa placo, ŝafideto mia. Ne miru, ke la turkoj kaj kurdoj rigardas armenoj, kiel la plej timema popolo en mondo. Ŝajnas, ke ili naskiĝis, por ke oni vipbatu iliajn dorsojn, per kurbaj glavoj tranĉu iliajn vostojn. Kaj la truoj de iliaj virinoj nur ekzistas, por ke cirkumciditaj vosto de ortodoksulaj muzulmanoj ricevu plezuron.

Ĉi tiu avo post tia precedenco kun kurdoj, pro sia placa humiligo kaj senpotenca teruro, parolis per falseto, kvazaŭ la kurdoj ne nur minacis senigi lin de vireco, sed vere tiam tranĉis viran respekton de ankoraŭ juna praavo.

Estas tiel, ŝafideto mia. La vira digno kaj fiereco estas pendita inter femuroj. Sed la digno kaj fiereco same troviĝas en lia kapo, ĉar inter kapo kaj respekto – pendita inter viraj femuroj, ekzistas sekreta ligo. Do, ne estas mirinde, ke homo, akceptanta sen rezisto viran humiligon de vira senhonorigo, iutage komencas kredi, ke vere perdis kaŭĉuktubon – atestantan pri vireco.

Kiel mi jam diris, ĉi tiu avo iĝis malfervorulo, sentis sin en ombro de sia edzino, perdis sian bason, parolis malesprimplene, kvikis, kiel malsana birdo, kiam subite plendis kontraŭ avina virsimila tempesta karaktero. Li komencis drinkadi kaj finfine iĝis drinkulo. Sed mi ne volas okupi vian atenton per tiaj aĵoj, ŝafideto mia: mi konsideras kvazaŭ perditan kaŭĉuktubon – atestantan virecon aŭ lian falseton. Mi volas, pli bone, rakonti pri lia bonkoreco kaj pri neordinara vatita kovrilo – iutage donacita al via patro.

Vardan estis la plej junaĝa nepo, kaj verŝajne, pro tio la avo precipe ege amis lin. Iutage li donacis al Vardan diverskoloran manfare vatitan kovrilon kaj diris al li:

“Tiu ĉi kovrilo – jorghan<sup>25</sup>, estas de tempoj de sultano Ibrahim – t.e. de 1642 j. Tiu ĉi jorghano estu via, ŝafideto mia, kaj ĝi en estonto apartenu al via unua filo”. Kaj via ankoraŭ nekvarjara patro demandis: “Ĉu al mia unua filo?” Kaj la avo respondis: “Jes, al via unua filo, ŝafideto mia. Vi nomos lin Tovma, t.e. kiel mia nomo – simple Tovma”.

- Kaj la avo diris: “Tiu ĉi jorghano estas fakte de tempo de sultano Ibrahim. Ĉu vi scias, ŝafideto mia, kiu li estas?” Kaj ĉar via patro ne sciis, la avo diris: “Sultano Ibrahim estis homo, havanta ion lacan kaj orgajlan inter siaj femuroj, ĉar li havis multajn virinojn en sia haremo. Kiel ĉiu viro, la sultano ankaŭ havis kaŝintan en vestoj ion – permesintan tempesti kaj ataki. Iam ĝi estis malgranda, streĉa kaj elasta. Sed poste ĝi iĝis malstreĉa, senpotenca. La edzinoj enuigis lin, ĉar ili estis ege multaj kaj pretaj por ĉio kaj des pli estis obeemaj. Malgraŭ tio, ke la sultano estis ĵaluza, ĉiun edzinon li konsideris kiel proprajon. Foje la sultano sciis, ke unu el siaj edzinoj havas rilatojn kun eŭnuko, kvankam tio ŝajnis nekredeble, ĉar, kiel sciate, la eŭnukoj ne havas testikojn. Ĉu vi scias kio estas testiko? – Seksa ovo, kolombeto mia”.

- Kaj via nur kvarjara patro diris: “Jes, la koko Abdul-hamid ĉiutage metas unu ovon”.

- Kaj lia avo, - diris Meddah, - kiu rare ridis tuj laŭte ridegis kaj diris: “Ne la koko Abdul-hamid, sed la kokinoj metas ovojn”.

- Poste li diris: “La afero, do estis tiel rilate virinoj de sultano Ibrahim. Unu el ili havis rilatojn kun sentestika eŭnuko. La sultano klopodis klari, kiu estis tiu eŭnuko, ignorinta edzan rajton? Sed neniel li povis malkovri, ĉar la haremaj virinoj estis solidaraj kaj ne perfidis.

---

<sup>25</sup> Turke.

Nu, divenu, kion faris la sultano?” - Ĉar via patro ne povis diveni, la avĉjo diris: “Do, okazis tiel. Iutage la sultano ordonis ĉiujn haremajn virinojn, t.e. 280 edzinojn (tiel multaj estis ili), firme ligi, enlokigi en grandaj sakoj, por pezo plenigi per ŝtonoj kaj poste alporti konstantinopolan havenon, ĵeti en akvon kaj ĉiujn dronigi. Oni ĝuste tiel faris”.

“Ĉu tio vere estis, avĉjo?”

“Jes, vere, ŝafideto mia. La historio de Turkio estas plena de tiaj kruelecoj, kaj pro tio ne estas mirinde, ke la frankistanaj frankoj, kiuj estas ne malpli kruelaj, la turkojn konsideras la plej kruelan popolon en la mondo”.

“Tiu ĉi jorghano akceptis multajn idarojn de puloj, kiuj mortaĉis en ĝi, - diris la avĉjo, - sed la mortaĉintaj puloj ne mordas, kolombeto mia”.

- Kaj kion vi diros pri vivantaj puloj, Meddah?

- La homoj al kutimiĝas al ili, - respondis Meddah. - En domo de Ĥatisjanoj la puloj svarmis. Ili saltis sur kovriloj, tapiŝoj, argilaj potoj, oleaj lampoj kaj aliaj aĵoj. Ili vivis ankaŭ en novdonacita, jam tre malnova jorghano de via patro. Dum infaneco via patro per buŝo ĉasis pulojn kaj ĝojis kaptinte unu el ili. Certe, tiam via patro ne dormis en lulilo kun kolombo kaj olivarba branĉeto. Li havis sian propran liton kun litaĵoj – preparitan de ŝafidaj feloj. Kiam la avĉjo donacis la jorghanon, diris; “La lulilo kun kolombo kaj olivarba branĉeto iotempe estos malplena, sed iutage tie dormos via filo”.

“Ĉu mia filo?” - demandis via patro.

Kaj la avĉjo respondis:

“Jes. Via filo Tovma”.

Via patro iam post iam ludis kun sia vosteto, kreskinte inter femuroj, kiel faras ĉiuj malgrandaj knabetoj, nekomprenante, ke tio

estas danĝera. Foje la avĉjo kaptis Vardan, kiam li ludis kun sia vosteto, kaj diris: “Neniam faru tion, en kontraŭa okazo via filo Tovma neniam naskiĝos”. Kaj aldonis: “Kaj vi iĝos malsaĝulo, kiel akvoportisto Hovanes, kiu dum infanaj jaroj ludis kun sia vosteto”.

Via patro diris:

“Sed ja mi ne estas akvoportisto”.

“Mi ankaŭ ne insistas, - diris la avo, - la vosteto estas danĝera ludilo. Ludante per ĝi – oni iĝos ne nur stultulo, eĉ iĝos pharvana<sup>26</sup>”.

Ĉar via kvarjara patro ne sciis kio estas pharvana, la avo eksplikis. “Jen tiel: la pharvana estas orienta nokta papilio, kiu precipe vivas ĉi tie, en ĉi tiu landparto, ĉar ĝi estas riĉa per suno, per kuloj kaj per muŝoj. Kiam la homo ege ofte ludas kun sia vosteto, troviĝita inter femuroj, la amo povas influi sur lia cerbo, kaj li ĉiun knabinon konsideros sian amatinon. Ofte li ne distingas ŝin de flamo en toniro”.

“Kio okazos poste?” - demandis via patro.

“Poste la amanto ekpensos, ke mem estas pharvanao, kaj la flamo ŝajnos al li amatinon, kaj li sin ĵetos en flamon”.

“Kaj poste kio okazos?” - demandis via patro.

“Poste nenio restos de li”, - diris la avo.

- Kaj la avo ekridis kaj diris:

“Sed vi ne timu, ŝafideto mia, mia eta paŝao, mia kolombeto, mia knabo – havanta en si semon de mia pranepo Tovma. Vi ne bezonos ludi kun via vosteto. En estonteco, kiam vi kreskiĝos, la sopiro al unu virino estos kaŝita en via skroto. Vi ne bezonos ankaŭ aliĝi kun azenino, kiel akvoportisto Hovanes. Vi ne bezonos ankaŭ iĝi pharvanao kaj pro ama turmento ĵeti sin en toniron, ĉar ni jam elektis fianĉinon por vi. Kvankam ŝi ankoraŭ urinas en siaj vindaĵoj, sed ŝi atendas vin, ŝafideto mia. Ŝia patro – nia vilaĝestro, flegos ŝin. Ŝi havos pufiĝitan postajon. Vi ankaŭ estos prudenta viro kaj vi la edziĝan sakramentan unuecon havos kun ŝi. Kaj vi kun ŝi naskos

---

<sup>26</sup> Armene.

knabeton, kiun vi nomos Tovma”.

- Sed ankoraŭ longa tempo estis ĝis la naskiĝo de lia filo Tovma, - diris la fabelisto al la Lasta Penso, - tiam pri tio sciis nur la Dio. Kaj via patro, estante nur kvarjara, ankoraŭ nenion sciis pri seriozeco havi infanojn, pri armena vira respondeco por gento. En kvara jaraĝo via patro nenion sciis ankaŭ pri Abdul Hamid, kiu metiĝis sur la tronon, kiel sultano antaŭ du jaroj ĝis lia naskiĝo – en 1876 j. Li nur sciis, ke la patra koko nomiĝas Abdul-hamid. Do ĉiuj kokoj devos nomiĝi Abdul-hamid, ĉar laŭ koka fatalo ili senkapiĝos. La deziro de ĉiuj armenoj estis, ke Abdul Hamid senkapiĝu, ĉar pri tio flustris multoj de ili. Tio signifis, ke Abdul Hamid volas ekstermi ĉiujn armenojn .

Via patro ankoraŭ vivis en mondo de fabeloj. Kaj vere, ekzistis neordinaraj fabeloj – rakontitaj de avino. Inter ili, ekzemple, estis fabeloj pri Noa arkejo, pri anĝelo kaj ŝvitoza tuko de Savanto. Ĉu necesas rakonti ilin por vi, ŝafideto mia?

- Jes, Meddah, - diris la Lasta Penso.

- Nu, okazis tiel kaj tiel, - ekkomencis Meddah. - Foje la armena reĝo Abgar malsaniĝis je lepro. En sonĝo li aŭdis voĉon dirantan: “Ho, Abgar! Nur la dio de Suno – Mihr, scipovas kuraci vin de lepro. Abgar, leviĝu sur monto Ararato, sur plej alta kresto. Tie vi estos proksime de Suno kaj de dio Mihr”.

- Li ĝuste tiel faris, - diris la fabelisto. - La reĝo leviĝis sur kresto de armena monto. Sed kiam li estis sur la plej alta loko, la ĉielo mallumiĝis kaj la suno malaperis. La reĝo ekpaŝis stumblante. Kaj subite lia piedo tuŝiĝis al peco de ŝipo – tre similanta arkeon. Kaj ĉar neniam li aŭdis pri Noa arkeo, nek konata estis la Biblio – tiam jam ekzistanta, nek Korano – tiam ne ekzistanta. Vidante arkeon, li mirinde demandis si mem: “Kiel la ŝipo leviĝis sur monton?” Kaj ĵus li prononcis ĉi tiun demandon, tuj aperigis anĝelo kaj diris: “lutage de ĉi tie forflugis kolombo malsupren – landon, en estonto nomita **Hajastan** – **Armenio**, kaj de tie alportis olivarban branĉeton”.

“Ĉu olivarban branĉeton?” - demandis la reĝo .

“Dian signon, - diris la anĝelo, - refoje savinta mondon”.

Kaj la anĝelo diris:

“Ne ekzistas dio de Suno kun nomo Mihr. Kaj neniel li helpos vin – starantan sur la plej alta kresto de armena monto, por ke estu proksime de Suno. La Suno ne scipovas kuraci vin de lepro”.

“Sed kiu scipovas kuraci min de lepro?”

Kaj la anĝelo diris: **“Jesuo Nazaretano”**.

“Ĉu Jesuo Nazaretano?”

“Jes”.

“Kie mi povas trovi tiun homon?”

“En lando de judoj, - diris la anĝelo. - Li tie vagadas, kolektiĝas animojn”.

“Do, ĉu li estas kolektanto de animoj?”

“Jes”.

“Kaj ĉu miraklofara kuracisto estas li?”

“Same”.

“Ĉu li kuracos min, se mi trovus lin?”

“Se vi trovus lin en via animo ankaŭ”, - diris la anĝelo.

“Sed kiel mi povos trovi lin en mia animo?”

“Vi kultu lin!”

“Se mi kultos lin, ĉu mi kuraciĝos?”

“Jes!” - diris la anĝelo.

Tamen la reĝo estis nekonfidema, kaj li decidis ekspedi homojn Judujon – informiĝi, ĉu vere vivas tie iu kun nomo Jesuo Nazaretano – scipovanta kuraci lepron?

Kaj okazis tiel, - diris la fabelisto, - ke la tiuj homoj de armena reĝo ĝuste tiam atingis Sakramentan landon, kiam Jesuo deziris legi sian Montan Predikon. La reĝaj homoj sekvis amason – kiel rivero irantantan monton. Kaj tiel okazis, ke ili aŭskultis Montan Predikon.

Kiam Jesuo finis sian Predikon, unu el homoj de Abgar diris al kunulo: “Li estas stranga sanktulo, li benas humilojn, mizerulojn,

simplanimulojn, li por ili promesas ĉielan regnon. Kiel en tio okazo li kuracos nian reĝon? Ja nia reĝo estas nek mizerulo, nek humilulo, nek simplanimulo. Estas konata fakto, ke nia reĝo iros ĉe ĉielaj dioj”.

Kaj ili jam volis foriri, sed unu el reĝaj homoj diris: “La mensoga savanto Jesuo Nazaretano nun malsupreniĝas. Ni havas leteron de nia reĝo Abgar – adresitan al li. Ni ĝin enmanigu”. Kaj ili la leteron de armena reĝo Abgar donis al Jesuo. Jesuo legis la leteron kaj diris: “Via reĝo deziras kulti min kaj petas min iri Hajastanon – kuraci lin de lepro. Sed mi ne havas tempon plenumi tian malproksiman vojaĝon per azeno. Krom tio mi havas multajn aferojn en Judujo. Mi devos iri ankaŭ urbon de Davido – Jerusalemo, forpeli komercistojn kaj uzuristojn el templo”. Poste Jesuo diris: “Mi devos ankaŭ iri al mia kruco, baldaŭ preparota por mi”.

Lia parolo estas neordinara, kaj la senditoj de Abgar ne sciis, kiel kompreni. Jesuo Nazaretano, vidante konfuzon de reĝaj homoj, deprenis sian tukon – ligitan sur frunto dum Monta Prediko, kaj diris: “Mi tre ŝvitis dum Prediko, ĉar malfacile estis konvinki rigidajn cerbojn, ke mizerulojn, humilulojn, simplanimulojn atendas ĉiela regno. Prenu ĉi tion ŝvitozan tukon, aldonu al via reĝo kaj li kuraciĝos”.

La reĝaj homoj kunprenis ŝvitozan tukon kaj forgalopis de tiu loko. Kiam ili eliris el Judujo, rajdis tra cedraj arbaroj kaj montpasejoj de Libanono, ilin atakis rabistoj – antaŭuloj de montloĝantaj sovaĝaj kurdoj. Ili mortigis homojn de armena reĝo, ĵetis iliajn kadavrojn en ravinon, ŝtelis iliajn vestaĵojn, ŝuojn kaj ĉevalojn. Vere, ili forprenis ĉion, krom la malpura ŝvitoza tuko de Savanto. Ili ĝin forĵetis en libanonan plej profundan montpasejon, kie ĝi estas falita ĝis niaj tagoj.

“La ŝvitoza tuko de nia Savanto, - ekpensis la Lasta Penso, - do ĝis nun estas falita en montpasejo de Libanono. Kial la Dio ne malhelpis rabistojn mortigi reĝajn homojn? Kial ili devis morti kaj perdi ŝvitozan tukon?”.



- Diru al mi, Meddah, kio okazis kun armena reĝo?

- Li mortis pro plorinda morto, ŝafideto mia.

- Sed kio okazus, se li ricevus la ŝvitozan tukon?

- Li kuraciĝus de lepro, ŝafideto mia. Li akceptus kristanisman en vivtempo de Savanto, mem kaj verŝajne tuta sia popolo. Sed ĉio okazis tiel, kiel mi rakontis por vi. La ŝvitozan tukon li neniam ricevis kaj la Armenio daŭris resti pagana. Nur en 301 jaro la Armenio aŭ Hajastano iĝis la una kristana ŝtato en mondo.

- Kaj tio okazis jen kiel, - diris la fabelisto. - En Armenio regis Trdat la Tria – nomata Trdat Granda. Iutage Trdat aŭdis pri apostolo Grigor, kiun la popolo nomis **Grigor Lusavoriĉ**<sup>27</sup> – **Grigor Klerigisto**. Li vojaĝis tra Hajastano kaj predikis kristanisman. Pri li oni diris, ke li estas filo de fuĝinto – mortiginta patron de nuna armena reĝo. Kaj pro tio li havis problemon de indulgencio pro pekoj de mortigisto. Sed ĉar la reĝo Trdat timis, ke la filo de reĝmortigisto povis mortigi ankaŭ sin, ordonis kapti Sankta Grigor, ĉenligi kaj ĵeti en fosegon<sup>28</sup> de leonoj.

Vere, tio estis la fino de Sankta Grigor. Sed kiam reĝaj soldatoj ĵetis Sanktan Grigor en fosegon, la amoza Dio korojn de leonoj iĝigis kiel koroj de ŝafidoj. Grigor multjare vivis en fosego de leonoj. La sekretaj kristanoj alportadis por li manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. Dum ĉi tiu tempo Trdat frezeniĝis. Baldaŭ li komencis kvarpiede rampi, kiel la bestoj kun ŝafidaj koroj en Grigora fosego.

Iutage, kiam la konscio de reĝo Trdat klariĝis, kiu estis rare, lia scipovo de pensado jen aperadis, jen malaperadis, lia fratino Ĥosrovduĥt diris al reĝo: “Grigor ankoraŭ vivas. Korojn de sovaĝaj bestoj li iĝigis ŝafidaj koroj. Li estas magiisto kaj vian frenezecon li scipovas forigi.

---

<sup>27</sup> Armene.

<sup>28</sup> Temas pri **Ĥor virap** – historia vidindaĵo, troviĝanta en Orienta/nuna/ Armenio. /Trad./

Kaj la reĝaj soldatoj Sanktan Grigor eligis el fosego de leonoj, alkondukis ĉe reĝo kaj ĉe lia fratino. La fratino diris al Grigor:

“Ĉu vi scipovas mian fraton – armenan reĝon, kuraci de frenezeco?”

“Jes, - diris Grigor, - ĉar la reĝo nur estas kaptita de diabloj”.

“Per kio vi povas kuraci lin, Grigor?”

“Per Biblio, - respondis Grigor”.

Kaj Grigor Sanktan Libron tri foje turnis ĉirkaŭ kapo de freneza reĝo kaj diris la samajn vortojn, kiujn diris la Savanto – kuracinte malsanulojn kaj malfortulojn. Kaj li demandis malsanan reĝon, ĝis lia konscio ree ne malklarigis: “Ĉu vi kultas Filon de Dio – kuracintan malsanulojn kaj malfortulojn?” Kaj la reĝo diris: “Jes, mi kultas”.

Tuj, post la tiu momento, la reĝo estis kuracita.

Kiam la armena reĝo Trdat akceptis kristanismon, laŭ la ĝusta vojo ekiris la tuta reĝa familio, poste – la tuta popolo. Kaj estis tiel, ke la armenoj en 301 jaro de nia ero, kiel la unua popolo en mondo, proklamis kristanismon, kiel ŝtata religio.

- La armenoj estis devigita turmenti por Kristo, kiel neniu alia popolo en mondo, - diris la fabelisto. - Kaj inter multegaj historioj pri turmentoj de unuaj armenaj kristanoj – rakontitaj de avĉjo por via kvarjara patro, ekzistas ankaŭ historio pri Hazkept kaj Ŝapuh.

- Kiu estis Ŝapuh? - demandis la Lasta Penso.

- Persa reĝo, ŝafideto mia. Li estis fajroadoranto, perfekta satano kun homa aspekto. Armena kristana sklavino en lito provis lin helpi akcepti kristanismon. Sed ŝi ne sukcesis, ĉar ŝia pagana konkurentino sekvontan nokton enlitiĝis kun reĝo Ŝapuh kaj aliaĵon flustris ĉe lia orelo.

- Sed kion, Meddah?

“Se Vi akceptus kristanismon, - diris ŝi al Ŝapuh, - Viaj militaj elefantoj senpotenciĝus, kiel la leonoj en fosego kun Grigor Klerigisto – ŝanĝinto kredon de popolo: li korojn de ĉiuj leonoj iĝigis ŝafidaj koroj”.

“Sed tio estas malbona, - diris Ŝapuh, - ĉar kiel mi militos kontraŭ miaj malamikoj, se miaj elefantoj havus ŝafidajn korojn?”

Kaj ĉar la reĝo timis, ke la kristanoj povas devigi sin akcepti kristanan kredon, decidis mortigi ĉiujn.

Post semajno ekde tago, kiam Ŝapuh aŭskultis konsilojn de kristana sklavinio – pri ŝanĝo de kredo, kaj sekvontan nokton malicajn interparolojn de ŝia konkurentino resti firme rilate sia kredo, liaj armeoj kampiris al najbara Armenio. En la okupintaj landpartoj la reĝo kruele masakris homojn. Li ordonis mortigi milajn armenojn, ruinigi urbojn, kaj la fortranĉitajn ĉiujn kapojn de pastroj kaj aliaj famaj kristanoj surpalsi sur urbaj murzonoj de armena ĉefurbo. Li ordonis peli virinojn en bazarajn placojn, ilin malkaŝe perforti kaj poste frakasi sub piedoj de militaj elefantoj.

- Teruriga historio.
- Jes, ŝafideto mia.
- Ĉu Ŝapuh?
- Jes, la reĝo Ŝapuh.
- Kaj kiu estis Hazkert?
- Li estis alia persa reĝo, same fajrokultisto kaj terura homo.

- Tiu ĉi Hazkert estis tiom kruela, kiom estis Ŝapuh, sed estis pli inteligenta. Li sciis, ke en invaditaj landpartoj eblas obeigi armenojn, se sukcesus ŝanĝi ilian religion. Pro tio li diris al tiaj armeestroj: “La religio de armena popolo per helpo de militaj elefantoj ne eblas ŝanĝi”.

“Sed rime de kio vi volas ŝanĝi, via moŝto Hazkert? - demandis la armeestroj”.

“Ni devigos iliajn ekleziularon ŝanĝi sian kulton, - diris Hazkert, - kaj iĝi fajroadorantoj”.

Kaj estis tiel, - diris la fabelisto. - Hazkert decidis skribi leteron al

armena ekleziularo, kun sekvonta enhavo: “Se vi akceptus mian religion, ni respektus kaj abunde rekompencus vin. Se ne, ni en tuta Armena lando establos altarojn, kaj niaj magoj kaj magestroj regos vian landon. Kaj kiu ribelus, mortus kun siaj parencoj”. Kaj ĉu vi scias, ŝafideto mia, kiel respondis la armena ekleziularo?

- Ne, Meddah.

- Ili skribis al reĝo Hazkert: “Neniu povas senigi nin de nia religio. Forprenu de ni kion vi volas, via moŝto Hazkert, ni donas al vi niajn terajn bonaĵojn kaj ni estas pretaj respekti vin, kiel solan reĝon de mondo, sed en ĉielo Jesuo Kristo estas nia sinjoro”.

La vilaĝaj pliaĝaj infanoj ofte ludadis ludon “reĝo Hazkert” kaj “reĝo Ŝapuh”. Ili ludis ankaŭ “reĝo Trdat kaj” “reĝo Abgar”. Precipe estis alloga la historio de reĝo Abgar kaj ŝvitoza tuko de Savanto, kiun, unu el reĝaj homoj defendis de antaŭuloj de montaj kurdoj, ĝis falis mortigita apud tuko de Savanto en unu montpasejo de Libanono.

Kiam estadis seka vetero, la infanoj ludis pluvludon kun pupo Nuri, kiu estis kristana kruco – vestigita pupajn vestaĵojn. Kun tiu pupo ili iris vilaĝajn domojn. Ĉiu familio devis doni ion al infanoj – iam ovojn, oleon, ofte hatikon, same poĥindon<sup>29</sup> – dolĉaĵon, preparitan de juglando, mielo kaj faruno. Samtempe la infanoj kantis armenan malnovan kanton pri pluvo – kantitan de iliaj antaŭuloj: *“Amoza Dio, amoza Dio, Vi donacis kredon al niaj soifaj animoj, nun donu akvon al floroj. Sendu por ni pluvon, amoza Dio ... Pluvon... Pluvon..”*. – Kaj la infanoj petegis krucan pupon, kolektis hatikon, poĥindon, oleon kaj ovojn, pentiris krucpupon kaj kantis: *“Amoza Dio, amoza Dio, sendu pluvon por ni...”*.

Certe la petolemaj knaboj kun plej granda plezuro ludadis ludon “turkoj, kurdoj kaj armenoj”. La bravuloj ĉiam estis armenoj, kaŝantoj

---

<sup>29</sup> Armene.

kaj timuloj – kurdoj kaj turkoj. La turkoj kaj kurdoj havas armilojn, sed la armenoj por defendo povis uzi nur siajn manojn, piedojn kaj kapojn. Sed finfine ĉiam la timuloj venkadis bravulojn, ĉar la plej fortaj manoj kaj la plej inteligentaj kapoj neniel povis helpi, se la konkurantoj havis armilojn. En luda finalo la bravaj armenoj kuŝis mortinte sur tero, kaj la turkoj, kurdoj akriĝis siajn lignajn glavojn, dancis ĝojinte.

Via patro, nur kvarjaraĝa, sed jam ludis kun ili. Foje la knaboj kaptis la plej malpliaĝan ruĝharulan filon de forĝisto – pli etan ol via patro, kaj sendis al kampo – ŝteli ŝafideton. “Nun vi estas kurdo, - diris knaboj al li, - kaj vi iros paŝtejon kaj ŝtelos ŝafideton kaj alportos ĉi tien, donos al ni”. La fileto de forĝisto – nomita Avetik, faris tiel, kiel la knaboj ordonis. La ĉiuj hundoj de najbara paŝtejo konis etan ruĝharulan Avetik kaj iomete bojis, kiam Avetik kunprenis ŝafideton, ili muĝetis, komencis ankaŭ akrekrii, sed ne malutilis lin.

Avetik alportis ŝafideton kaj donis al knaboj. Unu el knaboj ludis rolon de jam maljuna zaptiĥo Ŝekir efendio, la aliulo – rolon de turka kapitano, kaj la tria – rolon de kadio. La zaptiĥo kaptis kurdan ŝteliston, kvankam ĉiu knabo sciis, ke zaptiĥo Ŝekir efendio terurigiĝis, ne kuraĝos aresti kurdon. Sed la ludo estis tiel. La zaptiĥo tenis kolumon de eta ruĝharulo, iomete sufoketis kaj kuntiris al turka kapitano.

- Kie estas la mastro de ŝafideto? - demandis la kapitano.

Ĉiuj knaboj montris vian kvarjaran patron. Li sciis ludon kaj ekridetis. Kaj ĉar lian rolon anticipe klarigis pliaĝaj knaboj, via patro sciis ankaŭ kion fari kaj kion diri. Li antaŭe donis al zaptiĥo drinkmonon, t.e. baĥŝiŝon, poste – pli multekostan, li donis al kapitano, sed la plej multekostan – li montris al knaboj, sed ree kaŝis, ĉar ĝi estis por kadio – muzulmana juĝisto.

Vian kvarjaran patron la knaboj kuntiris ĉe kadio. Via patro devos diri kion ili instrukciis lin.

- Kadio, - diris li kaj montris etan ruĝharulan Avetik, - tiu ĉi muzulmana kurdo ŝtelis mian ŝafideton, kaj ĉiuj armenoj de vilaĝo tion vidis kaj atestas.

- La armenoj estas kristanoj, - diris la kadio, - kaj la atesteco de kristanoj kontraŭas leĝon. Vi devos alkonduki du muzulmanajn atestantojn.

- Sed inter atestantoj ne estis muzulmanoj.

- Do, vi ne havis feliĉon, filo de senkredula putino kaj de senkredula kalumnianto.

Via patro metis grandan koruptaĵon en kadian manplaton kaj samtempe ion flustris ĉe la orelo de kadio. La kadio kapjesis kaj diris mallaŭte, sed sufiĉe aŭdeble por ĉiuj: "Antaŭ hjukjumeto staras falsaj atestantoj: aĉetu du atestantojn. Ĝuste diras Alaho – la plej granda en mondo: mi nenion vidis kaj nenion scias. Tio estas du arĝentajn piastrojn".

Via patro metis du arĝentajn piastrojn en manplaton de kadio, poste iris al hjukjumeto – konstruita de infanoj de du kunmetitaj grandaj skatoloj.

Tie estis starintaj falsaj atestantoj – havantaj mizerulajn aspektojn. Iliajn rolojn ludis la infanoj. Via patro pririgardis falsajn atestantojn, elektis unu el ili kaj diris:

- Efendio, ĉu vi volas veni kun mi ĉe kadio, doni depozicion, kion vi vidis?

- Sed kion mi vidis, ĉelebi<sup>30</sup>?

- Nu, kion, - diris via patro – ne montrante, ke la tiu ĉi titolo estis flata por si(ĉelebi signifas ĝentilan, inteligentan sinjoron),- nu, kion, efendio, vi ĵus vidis, ke la malpura kurdo ŝtelis mian ŝafideton. Vi vidis tion per viaj propraj okuloj.

- Ĉu per miaj propraj okuloj, ĉelebio?

- Certe, malsaĝulo, sed ne per miaj okuloj!

- Kaj kia ŝafideto estas tio, ĉelebio? Eble ĉu la ŝafideto havas

---

<sup>30</sup> Turke.

nigran makulon sur kolo aŭ havas multajn makulojn? Kiom da semajnojn jam pasis post ĝia naskiĝo? Mi devas anticipe vidi ĝin, efendio.

- Sed la ŝafideto estas en policejo, en tiu okazo mi tuj iros policejon.

Baldaŭ via patro revenis kaj diris al falsa atestanto:

- La ŝafideto vere havas nigrajn makulojn: unu el ili estas tuj sur kolo, la alia – sur muzelo. Kaj ĝin la patrino naskis ĝuste antaŭ du semajnoj.

- Ĉu necesas, ke mi estis vidinta ankaŭ kiel la ŝafino ĝin naskis, ĉelebio?

- Ne, malsaĝulo!

- Kion mi ankaŭ vidis, ĉelebio?

- Nu, kion, malsaĝulo. Ci vidis, kiel la malpura kurdo ŝtelis la ŝafideton – havantan ĝuste du nigrajn makulojn: ĝin la ŝafo naskis antaŭ du semajnoj.

- Kaj kiel aspektas tiu malpura kurdo, ĉelebio?

- Tio estas tute egala, kiel aspektas li. La kadio montros lin, kaj ci diros: “Jes, estas li mem!”.

- Mi devas esti vidinta vizaĝon, kiam li ŝtelis ŝafideton – havantan du nigrajn makulojn kaj naskitan antaŭ du semajnoj.

- Certe, ci estis vidanta vizaĝon de la kurdo!

- Ĉu tiam, kiam li ŝtelis ŝafideton?

- Ĉerte, stultulo.

- Kaj kiom vi pagos, ĉelebio?

- Duonpiastron.

- Sed, ĉelebio, tamen mi ne povas por duonpiastro mensogante ĵuri kaj vendi mian animon.

- En tiu okazo mi donos al ci ankaŭ kelkajn paraojn.

- Sed, ĉelebio, ĉu mi devos vendi mian animon por duonpiastro kaj kelkaj paraoj?

- En tiu okazo mi donos al ci unu arĝentan piastron. Nu!...
- Tio jam estas alia afero, ĉelebio. Por unu arĝenta mono mi, vere, ĉion faros. Sed vi forgesas, ke Alaho postulas almozon de mi.
- Kian almozon?
- Ĉelebio, ja kiam mi pekas – false atestante, mi poste devos sep tagojn fasti aŭ doni almozon al malriĉuloj. Nur post tio Alaho indulgos miajn pekojn.
- En tiu okazo fastu sep tagojn.
- Sed, ĉelebio, kiel mi povos fasti sep tagojn? Vi ja vidas, kia maldika mi estas. Mi pli maldikiĝos kaj estos mokinda por mia edzino kaj dektri infanoj.
- Do, ci donu almozon, por ke Alaho indulgu cin.
- Sed, ĉelebio, kiel mi povos doni almozon, havante nur unu piastron? Vi devos aldoni ankaŭ unu piastron: unu por mi kaj la alian por Alaho.
- Bone: du arĝentajn piastrojn.

- Sed, ĉelebio, por du arĝentajn piastrojn mi vidis nur dorson de kurdo, sed ne lian vizaĝon. Kiel mi povas por du arĝento vidi ankaŭ lian vizaĝon?

- Sed kiom da monon ci volas, por diri al kadio?: “Mi vidis ankaŭ la vizaĝon de kurdo – ŝtelinta ŝafideton”.

- Tri arĝentajn piastrojn, ĉelebio. Vere, tio nenian signifon havas por tia riĉa, klerigita homo, kiel vi estas. Ja vi ne volas ridi pro mia malriĉeco. Jam malhonorigo estas, ke mi – kredula muzulmano, por tia necirkumcidita gjavuro, t.e. senkredulo, kia vi estas, mi falsante atestos. Kaj ĉu tio pro tri pedikulaj piastroj?

Tiam via patro ektiris siajn harojn, kaj per la tuta gorĝo ploris. La infanoj ekridis kaj ion flustris ĉe lia orelo. Via patro kriis al falsa atestanto.

- Efendio! Vi pereigas min, mi jam estas pereigita. Ĉar mi devos la saman pagi por dua atestanto kaj korupti ankaŭ kadijon, ankaŭ



kapitanon kaj zaptihon! Ĉio kostas pli multe ol unu ŝafideto. Mi estas pereigita! Do, ĉu ne estas en mondo almenaŭ iometa kompatato al necirkumcidituloj?

Inter la ludantaj knaboj estis pli jaraĝa knabo, dum bapteco nomata Karapet, sed poste ĉiuj lin nomis Karo. Li estis dekjaraĝa kaj la pli junaĝa filo de selisto Kupeljan, kies brutaron iutage kurdoj pelis el stalo kaj kunportis.

Do, tiel: la filo de selisto Kupeljan, t.e. Karo, estis stranga knabo – bruema, kaj li obstaklis ludojn. Ludante batalon – li ĉiam estis en rolo de brava, sed senarmila armeno, kaj kiam la roloj ŝanĝiĝis, li refutis rolojn de timema, sed armilula kurdo aŭ turko. Li ne deziris ankaŭ permesi timemajn kurdojn aŭ turkojn mortigi sin – antaŭdecidita laŭ reguloj de ludo. Li nur ŝajnis ilin, ke ludas kun ili normale. Sed Karo atendis ĝis la kurdoj kaj turkoj kun siaj lignaj glavoj ataku, li furioze defendiĝis per pugnoj kaj piedbatoj forprenis iliajn glavojn, frapadis ilin kaj ili hurlante forkuris. Pri tiu Karo oni diris, ke li ne nur obstaklas ludojn: li estos batalanto de estonta armena liberiga batalo, verŝajne unu el ili, kiu iutage finos sian vivon sur turka pendigilo, t.e. estonta naciisto.

La naciistoj!

En la 80-aj jaroj oni multe parolis pri ili. Foje unu el ili eĉ venis vilaĝon, paroli kun vilaĝestro, forĝisto, pastro, patro de Vardan – Hakob, kaj kun aliaj viroj. Sed li nelonge restis en vilaĝo kaj, sidante sur sia mulo, forrajdis.

Vardan ne sciis, kiuj estas la naciistoj, kaj kion volis surmuliĝinta homo? La avo eksplikis:

- La naciisto deziris, ke liaj batalantoj alportu armilojn por vilaĝanoj. La vilaĝestro armilojn devos kaŝi ie, verŝajne, en tombejon.
- Sed tie estas enterigitaj mortintoj, - diris Vardan.
- Jes, ŝafideto mia.
- Ĉu la armilojn oni kaŝas sur tomboj?

- Ne, ŝafideto mia. Ili enmetos en tombejojn, ĉe mortintoj.
- Ĉu la mortintoj ne vekigoŝ, se ĉe ili oni metu armilojn?
- Certe ne, ŝafideto mia. Ili pli bone dormas, ĉar scias, ke ni bezonas armilojn defendiĝi de kurdoj.
- Ĉu la mortintoj timas kurdojn?
- Ili ankaŭ timas kurdojn, ŝafideto mia, kaj ĝojas, sciante, ke ni – vivantoj, plu ne volas timi.
- Ĉu la surmuliĝinta homo alportis armilojn?
- Ne, ŝafideto mia.
- Sed kial?
- Nu, kial, ŝafideto mia? Ja tio estas malpermesita. Ĉu vi pensas, ke ni ĉiuj deziras pendumiĝi?

En vilaĝo oni flustris, ke la naciistoj en multaj vilaĝoj kaŝis armilojn. La ruĝharula forĝisto diris:

- La armenoj devos armiĝi.

Kaj Karo diris:

- Se la impostkolektistoj kun zaptiĥoj alvenus, kaj poste rajdantoj de ŝejko Sulejman, ni devos ilin senkapigi.

Sed la pastro Gabriel Hamadjan, ĉeestanta dum ĉi tiu interparolo, diris:

- Ne, ne, tio malfeliĉigus nin.

La vilaĝestro diris:

- La turkoj sendos ĉi tien batalionojn, kaj komenciĝos **nor depk**<sup>31</sup> – nova masakro.

- Guste, - diris la edzino de vilaĝestro, - nova depko. Dio savu nin!

- La naciistoj estas malfeliĉo por ni, - diris la vilaĝestro, - la turkoj kaj kurdoj atendas ilin, por ke serĉi armilojn ĉe ni. Tio iĝos preteksto neniigi nin ĉiujn.

La pastro diris:

---

<sup>31</sup> Armene.

**Mets depk<sup>32</sup>** – granda masakro! Mi vidas multajn pendigilojn, vidas same fajron kaj fumon.

Foje preskaŭ cent rajdantoj kun juzbaŝio<sup>33</sup> (centestro) alvenis nian vilaĝon – serĉi armilojn. Ili ĉie inventron inversis en domoj, kiel fojnon, disfosis kortojn kaj kampojn. Ili eĉ iris tombejon, levigis tomboŝtonojn, sed nenie trovis armilojn.

## 6.

Kun pliiĝo de jaroj, - diris la fabelisto, - por homo la tempo pasas pli rapide. La patrino de via avino delonge ne kalkulis jarojn. Nedelonge ŝi diris al sia nepino Tsovinar:

- Aĥ, nia Vardan saltetas en korto, kiel ĉevaleto, kiel la pulo sur tapiŝo Kilim, kaj rajdas, kiel aĝulo – sidante sur senhontema azenino Cejda, kiu permesas akvoportiston malantaŭe aliĝi kun ĝi. Sed pasis unu jaro, kiam Vardan urinis en littukoj. Kaj ĉu vi scias, Tsovinar, kiel mia filino Hamest lastatempe banis lin per saloza akvo?

- Sed, avnjo, - diris la patrino de Vardan, - tio okazis antaŭ multaj jaroj!

- Rapide kreskanta Vardan ankaŭ sentis, ke la tempo ne staras senmove. La tria pantalono, donacita de patro okaze sepa jaro ekde naskiĝo, daŭre mallongiĝis, kaj patro diris al li:

- La pantalono ne mallongiĝas, viaj piedoj longiĝas.

Por aliaj infanoj estas ĝuste same, precipe por Avetik – ruĝharula filo de ruĝharula forĝisto. Ŝajnis li kreskas tre rapide, superkreskis ĉiujn vilaĝajn infanojn. Estante naŭjaraĝa, li portis patrajn vestaĵojn, ne atentante flustrojn, ke foje, kiam li estis suĉinfano, nutriĝis per lakto de ciganino, kiu en sia vico suĉis mamojn de longpieda hundino.

---

<sup>32</sup> Armene.

<sup>33</sup> Turke.

Tamen estis klare, ke amoza Dio malegale disdonas tempon, kiu por praavino kuregas, por Vardan movas tre malrapide, kiel paŝaĉanta Cejda, kiam Vardan rajdas tra mallarĝaj vojetoj de proksimaj montpasejoj.

En la vilaĝo malmultaj okazintaĵoj estadis. Iam post iam alvenadis vizitantoj el najbaraj vilaĝoj, el malgrandaj, iam ankaŭ el grandaj urboj, kiaj estas Muŝo, Erzrumo, Diarbekiro, Vano aŭ Bekiro. Foje alvenis iu eĉ el Konstantinopolo – portinte frankistanan modernan vestaĵon. La avo de Vardan diris:

- Iutage via onklo, t.e. mia filo Nahapet, alveturos el Ameriko. Li tie vendas malnovaĵoj kaj estas riĉulo.

- Kiom da onklojn mi havas en Ameriko?

- Multegajn, ŝafideto mia. Sed mi povas rememori nur du.

- Kaj kiu estas la dua?

- Mia filo Grigor. Li estas arabaĉi<sup>34</sup> – ĉaristo.

- Sed unu el miaj onkloj estas ĉaristo en Bekiro.

- Ĝuste, ŝafideto mia: unu el ili estas arabaĉio en Bekiro, la alia – en Nov-Jorko.

- Ĉu mia Nov-Jorka onklo al sia ĉaro jungas mulon?

- Ne, ŝafideto mia. Li havas ĉevalon – veran amerikan mustangon.

- Kia ĉevalo ĝi estas?

- Tiu estas indiana ĉevalo, ŝafideto mia.

- Kaj kia estas lia ĉaro?

- Li havas ĉaron, radoj de kiu aksumas.

- Sed, avĉjo, la ĉaraj radoj ja ne aksumas. Foje mi firme alnajlis radojn de nia ĉaro al aksoj.

- Ni estas ĉi tie – en Hajastano, ŝafideto mia. Kaj niaj ĉaroj estas la samaj, kiaj estis dum tempoj de niaj antaŭuloj.

- Sed kiel estas en Ameriko?

---

<sup>34</sup> Turke.

- Tie ĉio estas alia, ŝafideto mia. En Ameriko ĉiuj radoj aksumas. Kaj vi kredos, eble ne kredos, tie la arabaĉioj sur malbone movantaj detaloj ne ŝutas kretan polvon, kiel ni faras ĉi tie, ili lubrikas per diabla lubrikaĵo – eligita el tero.

- Ĉu onklo Grigor faras la saman?

- Jes, faras ĝuste la saman.

- Kiel aspektas onklo Grigor?

- Mi jam ne scias, ŝafideto mia. Mi havas nur unu foton de alia via onklo, t.e. de Nahapet, kiu vendas malnovaĵojn.

- Kaj kiel aspektas li?

- La foto ne estas klara, tie vidiĝas nur unu granda ĉapelo – kun larĝaj randoj.

Vardan ekridis:

- Mi aŭdis pri tiu stranga ĉapelo, sed neniam vidis.

- Ne rapidu, - diris la avĉjo. - Kiam via onklo alvenos el Ameriko, ĉapelon vi vidos.

Certe, iam okazis, ke mem vilaĝanoj ankaŭ vojaĝis, pli ofte al najbaraj vilaĝoj, iam eĉ al grandaj urboj. Poste vilaĝanoj rakontis strangajn historiojn pri grandaj bazaroj, almozuloj, bordeloj, fortikaĵaj murzonoj, kaleŝoj, plumulaj kaleŝistoj kaj belaj virinoj – odorantaj aromojn de lilio kaj rozo. Kuraĝajn vojaĝintojn vilaĝanoj enviis, certe ne ĉiam: neniu enviis, kiujn kurdoj rabis aŭ mortigis en montpasejoj.

- Ĉu nun vi vidas apud la vilaĝo blankan montbazon? - demandis la fabelisto al la Lasta Penso. - La homoj tiun nomas Akh Bajir<sup>35</sup> – Blanka Montbazo. De tiu montbazo en spaco de fumado duoncigaredon aŭ, kiam la azeno fiodoras tri foje, ne malproksime troviĝas Gjobekli Thephe<sup>36</sup> – Grandventrula Monteto, kie la infanoj ludadas “batalon”. Kaj tie – inter Akh Bajiro kaj Gjobekli Theptheo, ekzistas malnova kabano. Vi povas vidi ĝin.

---

<sup>35</sup> Turke.

<sup>36</sup> Turke.

- Jes, mi povas vidi ĝin, - diris la Lasta Penso, - ĉar mi vidas ĉion, kion vi vidas. Mi vidas ankaŭ Blankan Montbazon – nomatan Akh Bajiro, ankaŭ la monteton – nomatan Gjobekli Theptheo. Mi aŭdas bruon de infanoj – ludantaj “batalon”, ankaŭ povas vidi malnovan kabanon, same fumon – elirantan el toniro tra la jerdik<sup>37</sup> (plafona fumtruo) al aero.

- Tie ne estas toniro, - diris la fabelisto, - estas nur turka forno, kiu similas armenan toniron, kaj turkoj alie nomas ĝin.

- Kiel ili nomas?

- Ili tiun nomas tandir.

- Kiu vivas en tiu ĉi kabano?

- La sola turka familio en vilaĝo.

- Vi nenion rakontis al mi pri ili.

- Mi forgesis, ŝafideto mia. Simple forgesis mi.

- Sed kial, Meddah?

- Mi ne scias, ŝafideto mia. **La vorto turko kvazaŭ estas danĝera malsano**, kaj pri la danĝera malsano oni parolas, kiam ĝi minacas iun. Sed ĉi tiuj turkoj de Jedi Suo neniun minacis, ĉar ekde multaj jaroj pace vivis kun najbaraj armenoj. Ili tiel estis kutimaj, ke ilin plu neniun rigardas, kiel malamikojn.

- Ĉu la turkaj infanoj same ludis kun armenaj infanoj sur tiu grandventrula monteto – nomita Gjobekli Theptheo?

- Memkompreneble, ŝafideto mia.

- Kaj ĉu ili dancis en armenaj edziĝfestoj?

- Jes, ŝafideto mia.

- Kaj neniun pensis ion malbonan?

- Neniun pensis ion malbonan.

- La sola cirkonstanco, ligita kun tiuj pacaj turkoj – maltrankvilanta armenojn, - diris la fabelisto, - estis viraj kaj knabaj

---

<sup>37</sup> Armene.

nomoj, ĉar ili estis la samaj, kiajn havis la turkaj impostkolektistoj, zaptiĥoj, postenuloj kaj kurdaĵ rabistoj, kiuj minacis la vilaĝon, kaj kiujn eĉ oni ne volis rememori. Pro tio la vilaĝanoj turkojn – havantajn tiajn malŝatitajn nomojn, simple vokis per kromnomoj, certe, turke, kiuj estis pli precizaj, ol iliaj veraj nomoj. La kromnomo ne devis memori malplezurajn konfuziĵojn. Ĝi substrekis solecon de konvena homo. Okazis tiel, ke la ĉefon de tiu ĉi turka familo, t.e. Sulejman – havanta la saman nomon, kiam havis la ŝejko de kurda terura gento, nun la vilaĝanoj nomis Taŝak.

- Ĉu Taŝak?

- Jes.

- Kion signifas?

- Tio estas nomo de aĵo, kiun havas viro en skroto.

- Sed kion havas Sulejman en sia skroto?

- La saman aĵon, kion havas ĉiu viro, ŝafideto mia. Nur lia skroto estis plu substrekita. Unu tagon Sulejman surdorsigis farunan sakon kaj pro tio havis ingvenan hernion. Vi povas kredi aŭ ne kredi, la homoj insistas, ke lia skroto pendiĝas ĝis genuoj, kvankam neniu vidis tion, ĉar Sulejman neniam malleviĝas sian pantalonon, se iu ĉeestas, eĉ dum kampaj laboroj, kiam li devas rapide zorgi pri natura postulo. Kaj ĉar en Jedi Suo ne ekzistas hamamo<sup>38</sup> – banejo, por ke iu antaŭ homoj malkaŝe sin bani. Sekve, ne ekzistas ia okazo konvinkiĝi en ĉi tiu fakto.

- Sed kiel oni eksciis, ke la testikoj de Sulejman atingas ĝis genuoj?

- Tio estas videbla laŭ lia paŝado. Ĉar li paŝas tiel, kvazaŭ en pantalone tenas ovojn de tuta kokinejo.

- Ho, tio ne eblas!

- Tamen tio estas ĝusteco.

- Vere, tio estas sufiĉe malplezura.

- Certe, ŝafideto mia. Precipe, kiam la impostkolektistoj venas la

---

<sup>38</sup> Turke.

vilaĝon. Kompatinda Sulejman ne kuraĝas aperi en vilaĝaj stratoj. Li timas: la impostkolektistoj ekpensos, ke li ion kaŝas en pantaloneo.

- Ĉu en pantaloneo?

- Jes.

- Ĉu misteran ŝancelantan saketon kun ovo?

- Ĝuste tiel.

- Ĉu Taŝak?

- Taŝak.

Pliaĝan filon de Taŝak vilaĝanoj nomis Bodur, t.e. mallongpiedulo. Li ankaŭ, kiel sia patro paŝadis ŝancelinte, sed laŭ alia kaŭzo. La kaŭzo estis mallongaj kurbaj piedoj – similantaj literon “O”. Bodur jam estis 15-jara kaj volis baldaŭ edziĝi. La homoj ŝercis kaj diris: “Vi devos sekvi, ke la estanta edzino ne trapaŝu sian filon. Se ŝi trapaŝus, ne forgesu samamane paŝi malantaŭen. Kontraŭe la filo iĝos mallongpiedula, kiel la patro”. Patrino de Bodur malhelpis kreski filajn piedojn, ĉar anticipe pasos 40 tagoj ekde lia naskiĝtago trapaŝis lin, kiam la filo kuŝis sur preĝa tapiŝo, kaj ŝi ne trapaŝis malantaŭen.

La nomo de malpliaĝa frato de Bodur estis Tirjaki, t.e. narkotisto. Kutime homoj tiel nomadas pasiajn fumantojn. La malgrandaj infanoj kuradis malantaŭ li kaj ekkriis “fozur-fozur”, t.e. fumanto-fumanto. Fozur-fozur – Tirjaki, nehavante monon aĉeti veran tabakon kaj fumis kion trovadis. Pli ofte li fumis maisan harosimilan stupon – sekintan sur suno, same sekan herbon, pajlon, iam – sekiĝitan brasikajn foliojn.

Per brasikaj folioj, freŝaj, ne sekaj, vilaĝaj virinoj preparis volvaĵetojn, farĉitajn per viando kaj rizo, aldonante grasan gustozan sukon. La armenoj tiun manĝaĵon nomas patato, la turkoj – sarmao.

- Jes, - diris la fabelisto, - rememorante ĉi tiun manĝaĵon la buŝo pleniĝas per salivo. Ĉu ankoraŭ rakonti pri tiuj ĉi turkoj?

- Jes, jes...

- En turka familio estis ankaŭ kelkaj knabinoj. Ili ĉiuj dum



paŝado allogante svingis siajn postaĵojn – danĝera cirkonstanco. Armenaj knaboj ne kuraĝis pinĉi iliajn postaĵojn, ĉar bone sciis, ke en poŝoj de turkoj, precipe de fratoj, ekzistas akriĝitaj tranĉiloj. Nomo de dekjarulino estis Hjulja – revemulino, de naŭjarulino – Ŝirin – dolĉa, kaj de gracia sepjarulino – Maral – damao. La nomo de edzino de Taŝak estis Neŝee – ĝojo. Ĝuste tiel. Verŝajne ĉar ĉiam ŝi havis ĝojan humoron, neniam forgesis ridi. Aŭ ĉar, kiel oni diras, ŝi naskiĝis kun krio de ĝojo. La pliaĝa filo de Taŝak interesiĝas pri kokinoj, havis supernomon Gjog-gjog kaj je tri jaroj estis malgranda ol via patro.

Gjog-gjog estas ekkrio por voki kaj nutri gekokojn. Kun sunleviĝo Taŝak sian turkan kranion direktante al Mekko, genuis antaŭ pordo sur preĝtapiŝo. Dume Taŝak kun klinigoj, kiel mahometano adoreme preĝis, Gjog-gjog kuris malantaŭ domo kaj alvokis gekokojn: “Gjog, gjog, gjog!” Pasantoj preter domo de turko sciis: estas frua mateno, ĵus la koko kokblekis, Taŝak preĝas al Alaho, kaj Gjog-gjog alvokas gekokojn.

Vi imagu: la knaboj staras sur piedoj de Gjobekli-Theptheo kaj konkurante urinas. Via patro estas kvarjaraĝa kaj staras apud Gjog-gjog. Dum sia mallonga vivo li unue vidas cirkumciditan voston. Pro teruro li urinas sur propraj genuoj kaj plorĝemante kuras hejmen.

- Kial li plorĝemas? - demandas Hamest.
- Li vidis cirkumciditan voston, - diras la avĉjo.
- Kian voston?
- Nu, ordinaran cirkumciditan voston.
  
- Antaŭ multaj jaroj en turka vilaĝo mi vidis ceremonion de cirkumcido, - diris la avĉjo, - similan edziĝfeston.
- Ĉu similan edziĝfeston?
- Jes, similan edziĝfeston.

- Nu, certe, mi jam tute klare ne memoras tion, - diras la avĉjo. - Sed memoras, ke ĉiuj vilaĝaj viroj kun knabeto, kies kolbaseton oni devos tranĉi, kolektiĝis en domo de muĥtaro. Ili multe babiladis kaj fumis. Poste mi vidis patron de knabeto. Tiu ĉi viro, tenante bridon de blanka ĉevalo, eliris el stalo de muĥtaro. Li ĉirkaŭprenis knabeton kaj sidigis sur ĉevalon. La knabeto surĉevalinte pasis de domo al domo, kaj ĉiuj deziris al li bonan vivon. Imagu: princeton, sidantan sur blanka ĉevalo, reĝidon, portantan blankajn vestaĵojn – broditajn per orfadenoj kun ruĝaj strioj. Sur lia kapo estis blua trikita ĉapeleto.

- Kaj poste? - demandis Hamest.

- La patro de knabeto, tenante bridon, kondukis ĉevalon ĝis sia domo. Tie jam atendis **sjunetĉi**.

- Kiu li estas?

- La cirkumcidanto.

- Kaj kion okazis poste?

- Nenio, - diris la avĉjo, - subite mi vidis aliajn virojn. Ili kaptis princeton, mallevigis lian pantalonon. La sjunetĉio kaptis birdeton – estintan inter maldikaj femuroj de princeto, tute eligis el kaŝejo, kaj subite en lia mano aperis akra tranĉilo.

- Kaj ĉu poste?

- Kaj poste li tranĉis pecon de haŭto.

- Kaj ĉu tio estis la fino?

- Jes, tio estis la fino.

- La sjunetĉio certe ŝutis farunon sur vundon. La patro ĉirkaŭprenis plorantan knabeton, sidigis lin ĉe enirejo de domo, sur granda kuseno tiel, ke ĉiuj povu vidi knabeton. En korto ludis tamburisto kaj ŝalmisto. Kelkaj homoj ekdancis. Poste dancis la tuta vilaĝo.

- Nia Vardan verŝajne timis – vidinte cirkumciditan vosteton de Gjog-gjog.

- Jes, - diris la avĉjo.

- Verŝajne li ekpensis, ke ĉu tio estas birda beko sen haŭto?
- Sed, Hamest, la beko ne havas haŭton.
- En tiu okazo li ekpensis, ke tio estas kapo de rano.
- Ĉu senhaŭta kapo de rano? Ĉu eble skalpita?
- Ĝuste tiel, - diris Hamest.

## 7.

Ekzistas aĵoj, kiujn ne dignas fari viroj. Tia estas ankaŭ kolekti gebovan sterkon. Ĉi tiun aferon plenumas virinoj, sed unuvicite – infanoj. Somere la suno sekigas sterkon sur plataj tegmentoj. Vintre vilaĝanoj sterkon simple algluas sur ĉambrajn murojn kaj atendas ĝis ĝi sekiĝos rime de tonira varmo. Sekiĝite, sterko falas de muro, kaj nur restas preni ĝin.

Vardan jam en kvarjara aĝo kun aliaj infanoj kuris kolekti sterkon, imitis aliulojn kaj laŭte ploris, kiam iu prenis frue ol li aŭ pelis lin. En estonto, jam kreskinte, li interbatadis, mem pelis knabetojn aŭ knabinetojn – volontajn pli frue kolekti sterkon ol li.

Lin helpis ruĝharula Avetik. Ili kune kolektis, poste honeste interdividis trofeon. Avetik pensis, ke ne ĉiam taŭgas sterkon porti hejmen, eblas ankaŭ vendi. Sed tio estis afero de sperta homo – komprenanta komercon. Foje li diris al Vardan:

- He, kiel estas viaj aferoj? Vi ja volis iĝi verkisto. Ĉu vi nenio pensis pri vendo? Kie ni devos vendi sterkon?

- En urbo, - diris Vardan. - En vilaĝoj homoj mem multe havas.

- Sed kiel ni atingos ĝis urbo?

- Sidante sur azeno, - diris Vardan.

- Sed necesas ankaŭ sako.

- Sakon mi sekrete prenos de patro, - diris Vardan, - li eĉ ne scios.

- Sed ĉu se la kurdoj forprenos sakon de ni?

- Ĉu vi pensas, ili forprenos, kiam ni veturos tra la montoj?

- Jes, ĝuste tiam.

- La kurdoj ne ŝtelas sterkon.
- Kiel vi tion scias?
- Nu, mi scias.

Sed la knaboj ne kuraĝis sole foriri el vilaĝo.

- Se ni estus pliaĝuloj, - diris Avetik, - ni estus sufiĉe fortaj – batali kun kurdoj, se ili ekpensus forpreni seksterkon.

- Ni povas proponi, ke Karo venu kun ni, - diris Vardan, - li baldaŭ havos fortajn muskolojn, kiel nia forĝisto.

- T.e., kiel mia patro?

- Jes.

- Tio bona pensaĵo estas.

- Aŭ ni atendu ĝis mi oficiale fianĉiĝos. Tiam mi iĝos plenaĝulo kaj povos vojaĝi por aferistaj celoj, se volus. Ĝis tiu tempo mia patro ne permesos min sole iri urbon.

- Vi pravas, - diris Avetik. - Mia patro ankaŭ sendube ne permesos.

- Nu, jen tia estas la situacio, - diris Vardan.

- Sed kion pri via oficiala fianĉeco? Mi scias, ke vi delonge estas fianĉita.

- Certe, mi delonge estas fianĉita, - diris Vardan. - Sed mia oficiala fianĉefesto okazos, kiam mia fianĉino ekkomencos mem sangflui de interspaco de piedoj.

- Kiel vi sciis pri tio?

- Al mi rakontis mia patro.

- Kiaman aĝon havas via fianĉino?

- Ŝi je tri jaroj estas malpliaĝa ol mi. Nun ŝi estas kvinjarulino.

- Kaj kiam ŝi ekkomencos sangflui de interspaco de piedoj?

- Kiam ŝi kreskos?

- Nu, kiam taŭgas kreski.

- Mi pensas, kiam ŝi iĝos 10 -11 jaraĝulino.

- Sed rilate seksterko ni ne povas atendi ĝis tiu tempo.

- Vere, vi pravas.

Foje patro de Vardan kunportis lin en azenĉareto muelejon. Tio estis la unua vojaĝo en lia vivo. La muelejo troviĝis en najbara armena vilaĝo **Phireĝik**, kiu turke signifas “pulnesto”. Phireĝiko troviĝis en marĉa valo Sinek-Dereo, nemalproksime, verŝajne en spaco por fumi 20 cigaredojn, se ekzistus karavana rekta vojo. Sed nun taŭgas kelkaj horoj pasi montpasejojn kaj abruptojn. La muelejo de armenoj laboris, nur kiam la nivelo de akvo estis alta, aŭ printempe, kiam degelas montaj neĝoj, aŭ dum pluvegoj. Kaj ĉar kiam Vardan kun sia patro venis muelejon, nek akvoj estis altnivelaj, nek pluvegis, la muelisto diris al Hakob:

- Hakob efendio, kiel laboros la muelejo, kiam nek neĝo estas sur montoj, nek nuboj en ĉielo? Ĉu eble mi urinu en rivereton, ke la akvo sufiĉu?

- Vere, kie estas la rivereto? - demandis Hakob.

- La tero glutis, - diris la muelisto.

- Kaj kiam ĝi ree forkraĉos?

- Kiam pluvos, - diris muelisto. - Aŭ dum alia printempo, kiam degelos montaj neĝoj.

- Kaj kio okazos, se ni triope urinu en rivereton? – mia filo Vardan, mi kaj vi? - demandis Hakob. Verŝajne la rivereto vigliĝos kaj la tero forkraĉos ĝin, kiun iam ĝi glutis.

Revenante el muelejo, ili renkontis Bjulbjul, kiu sidante sur sia sennoma azeno, rajdis hejmen, al sia kabano – troviĝanta sur monto. Ŝi klininte estis sidinta sur sia azeno. Bjulbjul ligis sur vosto de azeno senkapan kokon, kaj de tranĉita kolo gutis sango – samtempe ĉia paŝo de azeno kaj makulis montan mallarĝan vojeton.

Kial vi antaŭtempe tranĉis kapon de koko? - demandis Hakob.

- Ĉar la azeno timis kokon, - diris Bjulbjul, - kaj maltrankvilante ĝi volis forĵeti min kaj kokon de si. Tiu ĉi koko estis tre maltrankvila, daŭre kokerikis, baraktis kaj skuis azenan voston, sur kiu estis ligita.

- Kiu donis al vi tiun ĉi kokon?

- Via patrino, maljunulino Hamest, - diris Bjulbjul.

- Ĉu ĝi estas nia koko Abdul-hamid?

- Ne, - diris Bjulbjul. - Ja vi vidas, ĝi estas fremda koko. Ĝi estas aperinta en via kokinejo kaj tumultigis, ĉar Abdul-hamid ne toleras ĉeeston de alia koko.

- Sed verŝajne tiu ĉi koko estis pli forta ol Abdul-hamid, kaj ni devus teni ĝin.

- Tiu ĉi ne estis pli forta, - diris Bjulbjul. - Abdul-hamid bekante mortigus ĝin, se Hamest permesus. KREDU MIN, Hakob efendio, du kokoj en sama kokinejo malpli toleras unu alian, ol du virinoj ĉirkaŭ toniro.

Post foriro de Bjulbjul Vardan demandis:

- Ĉu vere, ke Bjulbjul estas akuŝhelpistino? Kaj ĉu vere, ŝi helpis min naskiĝi?

- Jes, estas vera.

- Ĉu ŝi ankaŭ nutris min?

- Ne. Ŝi ne estas suĉigistino.

- Ŝi estas kurdino. Ĉu kurdinoj suĉigas siajn infanojn?

- Certe.

- Kaj kia estas ŝia lakto?

- Estas tiom dolĉa, kiom dolĉa estas lakto de aliaj patrinoj.

- Ĉu tiom dolĉa, kiom dolĉa estas lakto de mia patrino?

- Jes, - diris Hakob.

Ili ankoraŭ longe parolis pri Bjulbjul. Ili parolis pri sola kabano sur alta monto, kie ŝi vivas sole kun sia azeno kaj kokinoj. Ili demandis si mem: kiam mallumiĝas la tago, kun kiu ŝi interparolos, dum longaj vesperoj – kuŝinte ĉe toniro?

- Ŝi parolas kun siaj animaloj, kaj mi vetas kun vi, filo mia, ke tio tute ne estas enua, ĉar la animaloj povas aŭskulti pli bone, ol la homoj.

- Kial ŝi ne havas edzon?

- Oni diras, ke ŝi iutage estas havinta ..., - diris Hakob, ... - ĝis la veno ĉi tie ..., sed ŝia edzo forpelis ŝin el domo.

- Ĉu simple li ŝin forpelis el domo?

- Jes.

- Ĉu tiel faras nur muzulmanoj?

- Ne, - diris Hakob, - iam tiel estas okazinta ankaŭ ĉe kristanoj.

- Ĉu ankaŭ ĉe armenoj?

- Mi ĝuste ne scias, - diris Hakob. Mi ne aŭdis pri tia okazintaĵo en mia gento aŭ ĉe konatoj. Kaj neniam en Jedi Suo. Eblas, ke geedzoj insultas unu alian kaj kverelas – tio estas absurdo. Kiujn kunligis la Dio, la homo ne povas disigi.

Post iom da tempo en Jedi Suo okazis evento, pri kiu Vardan memoris dum tuta sia vivo. Najbare Ĥatisjanoj vivis armena komercisto. Li havis kurbnazan edzinon, pri kiu oni diris, ke ŝi ĉiunokte deziris ion. La komercisto kaj sia edzino jam havis 13 infanojn, kaj iunokte la edzo diris al sia edzino: “Sufiĉas!”.

La komercisto rare estis hejme, ĉar havadis aferiĵojn en Bekiro kaj en grandaj bazaroj. Ĉiam li revenis hejmen en sia ĉaro, pentiritan de mulo, kaj alportadis malavarajn donacojn.

Neniu precize sciis, kiajn aferiĵojn havis la komercisto. Oni diris, ke li ĉiam aferaciis kun iu greko kaj judo en bazaroj de Bekiro. La judo havis bruan ĉevalon, sed greko – bruan azenon. Kaj jen kiam mallumiĝis, kaj la homoj ne diferencis tiujn animalojn, la armeno rapideme vendis brunan ĉevalon de judo al iu facilcredema turko, poste en mallumiĝo aŭ malhela lumo li ŝanĝis ĉevalon je azeno, atentigante kaj erarigante turkon. La greko kaj judo helpis lin rimede iaj erarigantaj manieroj. Ĵus finis la afero, kaj la turko sidiĝis sur azeno, ili triope tuj malaperis. Ili noktis en domo de greko, kaj matene ree aĉetis alian brunan azenon tre etprezan ol la vendita azeno, por kiu la turko pagis anstataŭ ĉevalo. La profiton, t.e. la supervaloron, ili honeste interdividis. Sed kiel diras proverbo: “La kruĉo rompiĝas sur vojo al fonto”. Iutage ilin ĉiujn oni kaptis kaj arestis.

Certe iutage estis juĝo. La sola lerneja ftizula, sed klera instruisto de Jedi Suo zorgis pri advokato el Vano, kiu estis lia parenco. Tiu ĉi advokato, kiel rakontis la instruisto al vilaĝanoj de Jedi Suo, dum la juĝo provis pruvi, ke la supervaloro, profita de tiu ĉi tri friponoj, ne havas ian ligan kun teorio de supervaloro de iu fama Karl Marks, kaj ili trioje estas lojalaj civitanoj de Osmana imperio, ne havantaj iajn ligojn kun novaj ideoj de tiu ĉi senkredula franko de germana-juda deveno, kies ideojn disvastigis el malfeliĉa Frankistano en Turkujo diversaj vagantoj, konspirantoj, malprosperuloj, maldekstrulaj studentoj. Tamen, la defenda parolado de armena advokato nenian utilon havis, ĉar la friponoj ne povis kolekti sumon por korupti Superan juĝistaron. Do, okazis, kio devus okazi. Tri friponoj malliberiĝis po unu jaro kaj plus la tempo inter festoj Ramadano kaj Bajramo.

Do tiel, la komercista kurbnazula virino, kiu ĉiunokte deziris ion, pacience atendis sian edzon. Sed iutage ŝi pli ne povis pacienci. Kaj tiu kurbnazulino tre sopiris pri io, ĉar kiel oni diras, la gekurbnazuloj ne povadas atendi, precipe kiam interspaco de piedoj tro jukas.

En 1889 jaro la edzino de komercisto subite gravediĝis, kvankam ŝia edzo dum preskaŭ naŭ monatoj estis en malliberejo. La pastro Gabriel Hamadjan diris: “La armenoj ne eksedziĝas. Kaj eble ŝi estis gravedita de Sankta Animo, ĉar ŝi tro deziris tion. Nur la Dio de judoj estas punanta Dio, sed kristana Dio estas bonkora, same kiel Alaho – la muzulmana Dio, pri kies bonkoreco ofte rakontis la turko Taŝak.

Sed kiam la infano naskiĝis, kaj la homoj sciis, ke tiu estas eta ruĝharula knabineto, la pastro diris: “Ŝi ne estas naskita de Sankta Animo, ĉar la Sankta Animo neniam naskas ruĝharulojn, ĉar ili estas kaptita de diabloj. En la vilaĝo iuj supozis, ke la ruĝharula forĝisto sorĉis la virinon. Aliuloj diris, ke povas esti tiel: “La pliaĝa nigraharula filo de forĝisto, tamen heredinta patran sangon, kun komercista edzino naskis tiun etan ruĝharulan knabineton, ĉar la pliaĝa filo de



forĝisto gvatis ĉiujn knabinojn, sed kaŝobservis ankaŭ postajon de komercista kurbnaza edzino, kiam ŝi iradis alporti akvon de fonto, malgraŭ ŝi havis 13 infanojn kaj plu ŝi ne estis knabino. Mallonge dirante, la pliaĝa filo de forĝisto akuziĝis pro nasko de eta ruĝharula knabineto kun komercista edzino.

Jen tiel, la muĥtaro Jeprem Abovjan juĝis la virinon: Li ordonis tondi ŝiajn harojn kaj kun malleĝa infaneto kontraŭmaniere – kun vizaĝo al azena vosto, sidigis sur azeno. La homoj tra la vilaĝo tre malrapide pelis azenon de domo al domo. La vilaĝanoj kraĉis sur tiu virinon, ĵetis koton al ŝia vizaĝo, ne kompatis eĉ etan ruĝharulan knabineton, same kraĉante kaj ĵetante koton al ŝi.

En estonto Vardan memoris, ke plej multe kriis kaj insultis maljunulinoj, aspektantaj pli furioze. Iliaj venenaj flegmoj fluis el koroj. Post la fino de vilaĝa spektaklo la patro de Vardan diris: “La plej malbonaj estis maljunulinoj. Ili enviis, ĉar ili mem kun ĝojo dezirus provi membron de forĝista filo”.

Kaj vere, principe ne koleris vilaĝaj viroj, sed maljunulinoj... Ili estis veraj gardistoj de moraleco. Reveninte hejmen, la komercisto ne forpelis edzinon el domo. Oni diris, ke la edzino dormis en unu angulo de ĉambro – sole. Oni diris, ke ŝi nokte en sonĝoj laŭte krias kaj malbenas. Oni diris, ke la malleĝa ruĝharulino dormadas ne en lulilo, sed kun patrino – tutnokte baraktetante sub kovrlio ...

La infaneco de via patro ... La vilaĝo Jedi Suo ... La okuloj de kurdoj – kaŝitaj en altaj montaj embuskoj teritorioj ... La morto en dokumentoj de turkaj postenuloj ... La morto erupcios el tiuj turkaj raportoj kaj, kiel deluvo akvumos teritoriojn – forgesitajn provincojn ... La sultano en Konstantinopolo, kiu malamamis kristanojn – precipe armenojn ... La historio ... estante ie – sur rando de mondo... Dume nenio estas rigardebla de tondraj signoj, kiu poste atakos kiel deluvo.

- Jen tiel, - diris la fabelisto, - mi memoras diversaĵojn, kaj rakontas, kiel povas. Kaj mi ne scias, kiel mi nenion rakontis pri fratoj kaj fratinoj de via patro? La kulpulo estas mia implikita parolo.

- Ĉu pri gefratoj de mia patro?

- Ili ĉiuj estis pliaĝaj, ol Hakob, ĉar li estis la malpliaĝa. Sed vi jam scias tion.

- Jes, mi tion jam scias, Meddah.

- Unu el ili estis pliaĝa ol via patro je tri jaroj – kun nomo Tigran, kiun post certaj jaroj la turkoj pendumis de la Beatecpordego.

- Ĉu Tigran? Ĉu la ŝuisto, havinta flavajn ŝuojn? – la plej belajn en tuta Bekiro.

- Jes, estas li.

- Ĉu la sama Tigran?

- Jes, la sama. Dume en sepjara aĝo li diris al via kvarjara patro: “Kiam mi kreskos, mi iĝos ŝuisto, - kaj aldonis, - mi iros Bekiron – grandan urbon Bekiron, kaj kudros flavajn ŝuojn – la plej belajn en tuta Bekiro”.

- Ĉu vi venos Bekiron? - demandis via patro.

- Jes, Bekiron, - diris Tigran. - Tie vivas multaj miaj onkloj, kaj unu el ili estas ŝuisto. Li instruos la metion min.

- Ĉu tiu estas onklo Levon?

- Ne, li estas ĉaristo. La ŝuisto estas onklo Dro.

- Ĉu tiel? - demandis la Lasta Penso.

- Jes, estas tiel. Via onklo Dro estis ŝuisto en Bekiro, kaj Tigran en estonto iris lerni ĉe li. Li iĝis bona ŝuisto, edziĝis, iĝis memstara, havis multajn infanojn. lutage el kaproledo, el vera kaproledo li kudris belegajn flavajn ŝuojn, tiajn luksajn, ke oni diris: “Tiu ŝuoj estas la plej belaj en tuta Bekiro”.

Precipe admiris flavajn ŝuojn la ciganoj. Unu el ili volis interŝanĝi ĉevalinon kontraŭ flavajn ŝuojn, sed Tigran ne donis.

- Mi memoras, - diris la fabelisto. - La ciganoj venis el ĉevalbazaro kaj rajdis tra la kvartalo de armenaj metiistoj. Ili haltis antaŭ domo de Tigran. Tigran sidiĝis ĉe stablo kaj puris flavajn ŝuojn.

- Kontraŭ ĉi tiuj ŝuoj mi donas al vi ĉevalinon, - diris unu el ciganoj.

- Sed ĉi tiuj ŝuoj ne vendiĝas, - diris Tigran.

- Ĉio vendiĝas, se posedas la homo, - diris la cigano, - ĝenerale temas nur pri preciza kosto. Mi donos al vi ankaŭ kapron.

- Sed mi ne vendas tiujn, - diris Tigran.

La cigano diris:

- Eble ĉu vi povas sorĉi per tiuj ŝuoj, kiel Aladin per sia sorĉa lampo?

- Estas io – simila tion, - diris Tigran, - la aspekto de ĉi tiuj ŝuoj firmigas mian kredon, kaj se mia kredo estas firma, la laboro estas plezura, kaj mia afero pli prosperas.

- Pri kiu kredo vi parolas, efendio?

- Pri la kredo rilate mia arto kaj rilate mia persono. Rigardu, - diris Tigran, - la ŝuoj estas kaŭzo de sukceso. Kiam mi sukcesos kaj eksponos kelkajn parojn da bonajn ŝuojn, tio kuraĝigos min, kaj mi iĝos bona ŝuisto.

- Ĉu vi diras, ke ili estas kaŭzo de via sukceso?

- Jes.

- Nu, mi divenos laŭ via manplato, ĉu vere ili estas sukcesozaj ŝuoj?

- Ĉu vi volas diveni laŭ mia manplato?

- Jes, - diris la cigano.

Sed la cigano laŭ lia manplato nenion povis diveni. Kaj li alvokis sian maljunan patrinon. Ŝi venis kaj laŭ manplato de Tigran divenis lian estontecon.

- Mi vidas pendumiton, - diris la maljuna ciganino. - Li havas la samajn ŝuojn, kiaj estas metitaj ĉi tie.

- Kion vi ankaŭ vidas? - demandis Tigran.

- Mi vidas blindan almozulon, - diris la ciganino, - kaj li viajn ŝuojn ŝovas en sian malnovan saketon.

Sed Tigran nur ridis kaj rapide fortiris sian manon. Li diris al ciganino:

- Vi nur volas timigi min, ĉar mi ne deziras doni ŝuojn kontraŭ ĉevalino kaj kapro.

La fabelisto diris:

- La historion pri pendumito, sur kies piedoj estis flavaj ŝuoj de Tigran, kaj same la historion pri blinda almozulo kaj sia saketo, mi jam delonge rakontis al vi. Pri tio sciis ankaŭ la pastro Gabriel Hamadjan. Sed li diris: "Tio estas cigana deliraĵo. La honesta kristano antaŭe devis tri foje kruccsigniĝi, nur permesi diveni sian faton".

- Sed nun kion devos fari mia filo Tigran? - demandis Hakob pastron.

- Li devos kruccsigniĝi, se la ciganoj denove aperus antaŭ sojlo de sia domo.

- Sed se ili denove ne aperus?

- En tiu okazo li devos froti la ŝuojn per ajlo, - diris la pastro. - Poste dum unu semajno, t.e. ĝuste dum sep tagoj li ne devos surmeti ŝuojn. Poste li tenu sanktan Libron per dekstra mano kaj vesti heple maldekstra mano.

- Post multaj jaroj, - diris la fabelisto, - vizitante siajn parencojn en Bekiro, via patro revenis hejmen. Kiam li kun sia azenĉaro pasis tra Beatepordego, vidis blindan almozulon – kuŝintan sur strata rando. Ŝajnis, ke la veturantoj indifereente trapasos lin, kaj la jugitaj animaloj, ĉaroj frakasos, mortigos kuŝinton, se via patro ne kompatis lin. Via patro metis lin en sian ĉaron kaj kunportis Jedi Suon. Tie la familio de Ĥatisjanoj flegis almozulon, ĝis li saniĝis. Post semajnoj via patro blindan almozulon ree alportis ĉe Beatepordego. La nomo de tiu almozulo estis Mehmed efendio.

Tiam Mehmed efendio diris al via patro:

- Vi savis mian vivon, iam mi savos vian vivon.

Poste diris:

- Mi konas vian fraton Tigran – ofte pasantan preter Beatecpordego, por ke doni al mi duonpiastron kaj interparoli kun mi. Bona homo estas via frato Tigran, pro tio mi ĉiufoje donas al li bonajn konsilojn.

- Do, verŝajne, vi scias ankaŭ pri diveno de maljuna ciganino.

- Ĉu vi konsideras la historion pri pendumito... estendan post multaj jaroj? Ĉu pri pendumito kun flavaj ŝuoj de Tigran?

- Jes, Mehmed efendio.

- Ĉu ankaŭ pri blinda almozulo kaj pri lia malnova saketo, kie malaperos la ŝuoj?

- Jes, Mehmed efendio.

- Sed kio okazis kun malnova saketo?

- Eble tio estas via saketo, Mehmed efendio, - diris via patro kaj manon de blindulo metis sur la malnovan saketon – ĉiam kunportadan kun li.

Sed Mehmed efendio nur mirinde ŝancelis kapon kaj diris:

- Sed, Vardan efendio, ja ekzistas multaj aliaj blindaj almozuloj, kaj multaj malnovaj saketoj. Krom tio mi aŭdis, ke la sorĉo rilate ŝuoj de via frato Tigran, delonge neniigiĝis – helpe Biblio kaj ajlo.

- Ĉu vi kredas nian Biblion, Mehmed efendio?

- Mi kredas profetajn diraĵojn, - diris Mehmed efendio, - la Biblion la profeto eksplikas alimaniere.

- Ne atendu, - diris la fabelisto, - ke mi rakontos historiojn pri ĉiuj fratoj kaj fratinoj de via patro, aŭ des pli pri ĉiuj liaj onkloj, onkloj kaj pri aliaj geparencoj. Iuj de ili vivas en gerdastano de Jedi Suo, plej parte – en Bekiro aŭ en turkujaj aliaj urboj kaj en tiamaj aliaj provincoj, ekzemple, en Grekujo, Bulgario, Rumanio, Hungario kaj en Serbio, Bosnio, en tiaj urboj, kia estas Sarajevo – iam estinte turka urbo. Multoj de liaj geparencoj trapasis oceanon, kiel multaj armenoj, pri kiuj

la turkoj diras, ke ili vagadas pli multe, ol aliaj nacioj, ekzemple judoj, kaj aperadas ĉie – surmetinte malaperigantajn ĉapelojn kaj maskojn, por ke krei senordon. Rakonti pri ĉiuj, signifas iri malproksimen, kaj kiel mi finos mian fabelon? Ĉar Tovma Ĥatisjan jam mortas, kaj li havas mallongan tempon. Tamen li deziras scii, kion mi rakontos por lia Lasta Penso aŭ povos rakonti? Pro tio mi – la fabelisto, diras al vi: “La tempo estas mallonga. Se vi deziras, mi rakontos al vi, sed rapide, pri du fratinoj kaj tri fratoj, ĉar via patro tro amis ilin”.

Kaj la fabelisto diris:

- Unu el fratinoj je 14 jaroj estis pli aĝa ol via patro, kaj, kiam li naskiĝis, ŝi jam estis edziniĝinta. Ŝia nomo estis **Makruhi** – Purulino, kvankam ŝi ne estis pura. Oni diris, ke kiel kurdoj, ŝi sin banas nur somere, sed havas bonegan koron. Makruhi ĉiutage vizitis Ĥatisjanojn, ĉar ŝi vivis sur vilaĝa placo, de flanko Ĥatisjanoj, en spaco por fumi unu cigaredon. Ŝi helpadis patrinon kaj avinon en hejmaj aferoj, kaj ludis kun via patro. Vere, ŝi estis tre bonkora, ĉar metis gustozajn pecojn en buŝon de via patro. Kiam li dume estis en lulilo, ŝi banis lin en saloza akvo, se la avino mankis. En estonto ŝi puris liajn vundojn, kiam li falis aŭ kiam knabetoj interbatadis ludante ludon “turkoj, kurdoj kaj armenoj”. Makruhi edziniĝis kun selisto Armenak, malgraŭ oni lin nomis Armen. Ĉi tiu Armen havis grandajn fortajn manojn, tre fortajn manojn. Kaj per ĉi tiuj manoj li ĉiutage batis Makruhi, ĝis ŝi ekkomencis regule sin bani kaj vere konvenis sian nomon Makruhi.

La nomo de alia fratino estis **Aghavni** – Kolombo. Ŝi konvenis sian nomon, ĉar estis milda, kiel kolombino. Kaj iutage forflugis edziniĝi kun Pesak – kun filo de bekira riĉa tapiŝvendisto. Ĉi tiu Pesak ne estis belaspekta homo: li surmetadis okulvitrojn kaj iomete lernis en Istanbulo. Kiu povis pensi, ke ĉi tiu Pesak en komenco de jarcento iĝos daŝnako kaj iutage – unu el partiaj registoj, kiun serĉadis la polico.

- Ĉu vi tre deziras scii, kiel okazis la edziniĝo Aghavni kun Pesak? - diris la fabelisto. Nu, ŝafideto mia, tio okazis helpe de perantino Manuŝak<sup>39</sup>, kiun vilaĝanoj precize nomas - **Miĝnord Manuŝak**.

Ne, ŝafideto mia, Manuŝak estis nek juna, nek bela. Ŝi estis precize tia virino, pri kiu la armenoj diras **tan mnacac** (restinta hejme), t.e. maljuna virgulino.

Mi scias, kion vi deziras demandi, ŝafideto mia. Vi deziras scii, ke la fianĉino de via patro – la filino de vilaĝesto, ĉu perante Manuŝak edziniĝis kun li? Ne, ŝafideto mia, vi ja scias, ke tiu okazis alimanire, ĉar Hakob mem sukcesis ligi ilin. Pro tio, kiam ili fianĉiĝis, Manuŝak kverelis, sciante, ke Hakob kaj la vilaĝestro sen ŝia partopreno interŝanĝis monerojn antaŭ sakramenta toniro.

La nomo de unu el fratoj de via patro estis Sargis – juvelisto en Bekiro. Tiu Sargis estis edziĝinta kun kurbnaza virino, tiom pasia, kiom la kurbnaza edzino de komercisto el Jedi Suo. Pro tio Sargis estis spala, kun kavaformaj vangoj, ĉar lia kurbnaza edzino ne povis satiĝi je la tio, kio estis inter femuroj de Sargis, kaj kiel oni diras, la amoza Dio donacis tion al li urini, sed ne naski idojn. Sed la juvelisto ĉiunokte devis fari tion kun ŝi, por ke defendi pacon kaj trankvilecon ĉirkaŭ sakramenta toniro. Ankaŭ li ne volis, ke sia edzino tion faru kun aliuloj, ĉar iutage ne eviteble la homoj tondus ŝiajn harojn aŭ, kiel diris Hakob, nudigus ŝian kranion kaj sidigus sur azeno en kontraŭa pozicio, kiel okazis kun kurbnaza edzino de komercisto el Jedi Suo, kvankam la edzino de juvelisto ne naskis malleĝan idon, kiel la edzino de la komercisto, malgraŭ ŝia filino estis kreskita de Dio, kiel la frukto sur kampo.

Sed la edzino de juvelisto estis ne nur pasia, sed ankaŭ

---

<sup>39</sup> Violo/armene/.

monŝatema, pro tio ŝi ofte diris al Sargis: “Kial vi ekde mateno ĝis malfrua nokto turmentas ĉe tiu ĉi stablo? Kial vi ne laboras, kiel monŝanĝistoj. La monŝanĝistoj nur kalkulas monojn, nek semas, nek rikoltas, sed la Ĉiela Sinjoro ilin ankaŭ nutras”.

La nomo de alia frato estis Boghos. Tiu ĉi Boghos estis nenifarulo kaj simulis, kvazaŭ laboras en tapiŝvendejo de bofrato Pesak, en Bekiro. Sed li promenaĉis vane kun plej malbona kompanio. La kompanoj estis malsukcesintaj studentoj el Konstantinopolo, Erzrumo, Vano – revenintaj Bekiron, vivi ĉe siaj geparencoj per iliaj monoj. Ĉi tiuj junuloj, kun malbona reputacio, disvastigis maldekstrajn ideojn pri egaleco kaj frateco, kiuj fiksiĝis en cerbo de Boghos. Foje, kiam li venis Jedi Suon, diris al sia patro Hakob:

- Ĉu vi scias kiuj estas hnĉakanoj?  
- Jes, - diris Hakob, - estas frenezuloj.  
- Ili estas armenaj marksistoj-naciistoj, - diris Boghos. Kaj ree li demandis patron:

- Kaj ĉu vi scias kiuj estas daŝnakanoj?  
- Ili ankaŭ estas frenezuloj, - diris Hakob, - sed ili freneziĝis alimaniere.

- Ili estas armenaj naciistaj radikaloj, - diris Boghos.

Sed Hakob ŝancelis kapon kaj diris:

- Mi nenion komprenas.  
- Kaj ĉu vi scias, kiuj estas la marksistoj?  
- Ne, - respondis Hakob.  
- Ili estas egaligistoj, - diris Boghos, - imagu ĉiuj estas egalaj.  
- Sed ĉiuj ne estas egalaj, - diris Hakob.

Vere stranga homo estis tiu Boghos. Kiam li sopiris pri gustozaĵaj kukaĵoj – bakitaj de patrino aŭ avino, longtempe vizitis Jedi Suon. Vespere li ofte sidis kun Hakob ĉe toniro, kaj kunekun ili fumis la saman pipon. Kaj foje li diris al Hakob:

- Vi ĉiuj estas konservativuloj.



- Kion ĝi signifas?
- Vi volas, ke ĉiu restu, kiel en pasinteco.
- Nenian valoron havas nia volo, - diris Hakob. - Valoras tio, kion volas la amoza Dio.
- Sed kion volas amoza Dio?
- Ĉiu estu, kiel estis en pasintenco.

Kaj Hakob diris:

- Ĉu la koko anstataŭ frumatene devos kokeriki meznokte? Aŭ ĉu taŭgas, ke la malriĉuloj nutriĝu abunde, sed la riĉuloj malsatu? Kaj ĉu povas okazi, ke la armenoj batadu turkojn kaj kurdojn, sed ne kontraŭmaniere? Ĉio havas sian ordon, kaj la homo devas obei tion.

Estis ankaŭ unu frato – tiom amita de via patro, kiom Tigran – la ŝuisto. Tiu frato estis je 20 jaroj pli aĝa ol via patro. Lia nomo estis Hajkaz, kaj li estis la pliaĝulo inter infanoj de Hakob. Malalta kaj kalva estis tiu Hajkaz – ruĝvanga kaj dika, mallongpiedula kaj mallerta, eĉ iomete astmula. Li havis dikajn obezajn fingrojn kun oraj ringoj – ornamitaj per diamantoj kaj smeraloj. En 1858-a jaro, kiam Hajkaz falis el ventro de patrino sur jorghanon, sur la sama ava jorghano, sur kiu dum nasko kaŭris Tsovinar, la sama – plenita per ŝaflano kun viglaj puloj, ankaŭ kun iliaj mortaĉintaj idaroj, kun malpuraj muŝoj kaj kuloj – heredita de Vardan, jam tiam estis la sola astmula postenulo en gento de Ĥatisjanoj.

Lia unua viva krio el lia malgranda sendenta buŝo elflugis tusante kaj raŭke. Malgraŭ tio, li ne estis malsana. Post kelkaj minutoj, kiam la avino banis lin en saloza akvo kaj diligente frotis, Hajkaz tusis kaj kriis, ŝi diris al Tsovinar:

- La via unua naskito ne estas malsana. Li tusas nur pro malpacienco.
- Pri kio vi parolas?, - demandis Tsovinar.
- Nu kolombino mia, mi parolas pri tio, ke ĉi tiu knabeto, kiun ni nomos Hajkaz laŭ nomo de mia nun vivanta patro, kaj laŭ nombroj de

liaj tagoj — donu la Dio al via Hajkaz, ĉi tiu knabeto tudas nur pro malpacienco.

- Pri kia malpacienco vi parolas? - demandis Tsovinar.
- Via Hajkaz tute ne povas pacienci ĝis tempo de la grandaj aferoj, - diris avino.
- Sed kiaj grandaj aferoj?
- Precize grandaj aferoj – skribitaj sur lia frunto. lutage li iĝos riĉulo.
- Kaj kiel vi vidas tion?
- Laŭ formoj, kiel li sin gravŝajnigas kaj sulkigas frunton.
- Ĉu tio signifas, ke li iĝos riĉulo?
- Vi tute ne dubu.

La avino certe pravis, ĉar jam dum festo Ŝekerlio, t.e. dum festo de unuaj paŝoj, ĉiuj vidis, ke Hajkaz estas vigla kaj senpacienca infano, ĉar farante unuajn paŝojn, li ŝancelante iris nek al toniro, nek al sitelo kun akvo, aŭ nek al stalo, despli nek al lulilo kaj Biblio – metita tie de patrino, li iris, ne, li atakis sur siaj piedetoj eksteren, pasis tra pordo de odao kaj eliris sur sunplena vilaĝa strato.

Hajkaz same dum infaneco komencis de seksterka komerco, t.e. de tute ordinara gebova ekskremento, ĝuste kiel en estonto kondukis Vardan kaj multaj aliaj infanoj. Sed jam en sepa jaro la situacio ŝanĝiĝis. Hajkaz iris najbarajn vilaĝojn, aĉetadis diversajn aĵojn, kiuj mankis en sia vilaĝo, por ke poste vendi kun profito. En deka jaraĝo li foriris el domo, iris ĉe onklo, kiu estis ĉaristo en Bekiro. Li estadis en urbaj grandaj bazaroj, iĝis peranto en diversaj aferoj, okupiĝis per aliaj aferoj, ĝis finfine partoprenis en granda negoco de vendado de akvomelonoj – alportitaj el Diarbekiro. En dektri jaraĝo Hajkaz estis mastro de la plej granda akvomelona pavilono en bazaro de Bekiro. La homoj, venintaj el Bekiro rakontis, ke Hajkaz, kvankam, daŭras tusi kaj raŭki, kiel soifanta kamelo, sed estas ruĝvanga, kiel en pasinto. La vangoj similas postajojn de obeza infano – lasita de patrino sub suno.

Ili diris, ke Hajkaz havas ankaŭ grandan ventron kaj grasajn, pufiĝintajn fingrojn, certe, sen ringoj, kiujn li deziris aĉeti, nur kiam tiujn malkare trovis la frato Sargis, kiu, kiel diris la homoj, dume ne estis perfekta juvelisto kaj nur lernis. Mallonge dirante, Hajkaz iris laŭ plej bona vojo de riĉeco. Liaj akvomelonoj, tiel rakontis homoj, vere estis alportitaj el Diarbekiro, estis tiaj pezaj kaj grandaj, ke oni revis ili falu sur kapoj de malamikoj de armenoj.

Pri Hajkaz oni parolis multe, kaj lia akvomelona pavilono iĝis objekto por diversaj rakontaĵoj. En vilaĝa kafejo, situata apud cigareda paviloneto, la viroj spritis pri malalta, dika, iomete astmula Hajkaz – deziranta trovi feliĉon en Bekiro.

Ili flustris, ke ankoraŭ 13-jara Hajkaz volis edziĝi kun aĝula virino, kun 35-jara vualkovrita maljunulino. Ŝi ĉiuvespere sekvas Hajkaz, kiam li fermas sian pavilonon kaj en azenĉareto revenas hejmen.

Kaj okazis tiel: Hajkaz sciigis pri sia fianĉeco kaj post unu jaro edziĝis kun vidvino **Varduhi**<sup>40</sup>: ĉi tio nomo konfirmis, ke ŝi estas belaspekta, kiel **rozo**.

- Kiel povas la 35-jara virino esti belaspekta, kiel rozo? - diris Hakob al sia edzino. - Tiu virino estas pli maljuna, ol multaj avinoj en Jedi Suo. Kion ŝi volas de nia filo? Li estas malpli aĝa, kun pendita ventro, kiu tudas kaj raŭkas, kiam parolas, same kiam ne parolas, ĉar estas precize tia, kvankam lin ni banis en saloza akvo, ankaŭ bone frotis per saloza akvo. Do, kion volas tia virino de mia Hajkaz, kies semoj ankoraŭ estas ne maturaj kaj apenaŭ ŝpruciĝas?

- Vere, kion ŝi volas? - demandis Tsovinar. - Jes, mi same tre deziras scii.

Kaj la pastro Gabriel Hamadjan, sidinta apud ili, diris:

- Hakob efendio, la demando estas ne tia, kion ŝi volas de via

---

<sup>40</sup> Rozino/armene/.

filo, sed kion volas via filo de tiu virino?

- Jes, la demando estas tia, - diris Hakob.
- Jes, estas tia, - diris Tsovinar.
- Mi ankoraŭ aŭdis, ke ŝi estas tre riĉa, - diris la pastro.
- Mi ankaŭ aŭdis, - diris Hakob.
- Ŝia mortinta edzo estis la plej riĉa uzurpinto en tuta Bekiro.
- Pri tio mi ankaŭ aŭdis, - diris Hakob.
- La astmula Hajkaz ankaŭ estas komercisto!.
- En ĉiu okazo Hajkaz ne fiaskos, - diris Tsovinar.
- Ja li estas mia filo! - diris Hakob.
- Precize, - diris la pastro.

Tiel la homoj antaŭvidis konduton de Hajkaz. Edziĝinte kun vidvino Varduhi, Hajkaz partoprenis en granda negoco. Li ne iĝis uzurpinto, kiel la unua edzo de Varduhi. Kaj ĉar Hajkaz estis dika, ruĝvanga kaj ĝuis ĉiujn plezurojn de manĝado, estis siamaniere vivŝatemo kaj diboĉulo. Sekve pro tio, verŝajne ankaŭ pro aliaj kaŭzoj, Hajkaz partoprenis en granda negoco. Li iĝis gastejisto. Kaj ĉar Hajkaz estis tia, aŭ kiel diras muzulmanoj, tiel estis skribita pri li en **Ghsmet** – en Libro de Fatoj, ke lia nova diboĉejo nomita “**Restoracio Hajastan**”, iĝis la plej konata en tuta Bekiro. Oni diris ke en “Hajastano” estadis ankaŭ turkaj gastoj – dum diboĉoj iĝantaj amikoj de armenoj, ĉar Varduhi per naciaj gustozaj manĝaĵoj allogis ĉiun gaston. Tio pruvis la saĝan proverbon: “La amo pasas tra stomako”, kiu konfirmiĝis en Armenio – okupita de turkoj.

- Sed ni revenu al via patro, - diris Meddah. - Li en malgranda aĝo komercis per seksterko. Iomete kreskinte kaj maturiĝinte, via patro kaj Avetik komencis pli ofte iri Bekiron, vendi kolektitan kaj sekigitan sterkon. Iam ili kunprenis Karo, sed plejparte – turkon Gjog-gjog, ĉar li pli bone povis peli azenon. Eĉ la plej kaprican azenon Gjog-gjog povis rapidigi. La azeninon Cejda Gjog-gjog logis ne nur per bonodora herbo – skuante ĝin antaŭ ĝia muzelo, ankoraŭ li parolis

kun animalo, flustris tenerajn vortojn ĉe orelo de Cejda kaj frotis ĝiajn seksajn partojn. Kaj iam Gjog-gjog pinĉis ĉe analo de azenino, sciante certan lokon – precipe senteman, kaj laŭte ridegis, kiam ĝi subite saltis antaŭen.

- Ĉu almenaŭ vi konas homojn en Bekiro, aĉetontajn seksterkon de ni? - demandis foje Gjog-gjog, kiam Cejda ree kapricis.

- Certe, - respondis Vardan.

- Li scias eĉ homon – pagontan bonan koston, - diris Avetik.

- Ĉu li estas armeno?

- Jes, li estas armeno.

- Kaj ĉu li ne rakontos por vi mensogajn fabelojn, ekzemple, ke la seksterko estas kapra?

- Ne, li ne rakontos.

- Kiu estas la armeno en Bekiro, aĉetanta seksterkon?

- Li estas mia pliaĝa frato Hajkaz.

- Ĉu, la riĉulo?

- Jes.

- Ĉu li ne povas aĉeti brullignon?

- Povas. Sed la gebova seksterko estas pli malkosta.

## 8.

- En 80-aj jaroj, - diris Meddah, - la frankoj establis ne ordinarajn lernejojn en tuta Hajastano: tie instruis virgulinoj kaj pastroj, kaj ili nomiĝis misiistaj lernejoj. La celo de frankoj estis aligi armenojn – grigorianojn, al veran Kristan kredon. Pli malfrue venis ankaŭ amerikanoj – vivantaj sur alia flanko de oceano. Ĉe ili eblis diversflanke lerni kaj poste daŭri kleron en istanbulaj aŭ frankistanaj universitatoj. Multegaj geknaboj de armenoj lernis en tiuj lernejoj, sed ne el vilaĝo Jedi Suo.

En Jedi Suo ĉio restadis, kiel en pasinto. La knaboj lernis en

vilaĝa lernejo, kaj la knabinoj restadis hejme. La eksmuĥtaro de Jedi Suo, pli fama ol nuna, t.e. Eprem Abovjan, do la eksmuĥtaro, pri kiu oni diris, ke li persone defloris ĉiujn servistinojn en sia domo, estis tre riĉa kaj respektinda persono. Foje li diris: “La kleriĝinta virino pereigas familion”. Kaj pravis la muĥtaro! La ekzemploj kaj avertoj estas tre multaj. Eĉ la pastro diris al knabinoj: “Nu, rigardu bekirajn klerigintajn virinojn. La klero efikas iliajn cerbojn, kaj la sinŝajnigon – interspacon de femurojn. La fajro de ilia toniro estingiĝas kaj el odao malaperas familia paco. Iliaj edzoj estas malĝojaj kaj timitaj, ĉar efektive pro virina sinŝajniĝo la vira vosto ne erektas”. Poste la pastro aldonis:

- Mi konas homon en Bekiro – havantan kleriĝintan edzinon. Nu, divenu, kion li intime diris al mi?

- Kion, pastro?

“Pastro, - diris li, - mia edzino ne estas virino. Ŝia fonto sekiĝis. Inter ŝiaj femuroj loĝas diabloj. Ŝia sino similas timigilon kaj ŝia ĝua glita organo estas sekiĝita kaj similas senvoĉe insultantan tenajlon”.

- Via patro frekventis vilaĝan lernejon, - diris la fabelisto. - Li scipovis legi, skribi kaj nenion plu. Sed li scipovis ludi ŝalmon – preparitan de turko Gjog-gjog. Paŝtante ŝafojn – via patro ilin pelis ĝis malproksimaj montoj: sufiĉis ludi ion, kaj la ŝafoj revenis.

- Jes, en vilaĝo Jedi Suo ne multaj eventoj okazadis, - diris Meddah. - La sola grava okazintaĵo estis la historio pri libra kesto.

- Kia libra kesto, - demandis la Lasta Penso.

- Nu, pri la ordinara libra kesto.

- Jen kiel tio okazis, - diris la fabelisto. - En vilaĝa lernejo vivis unu ftizula instruisto, kiu mortis, kiam via patro estis sepjarulo. Poste venis Jedi Suon alia instruisto – same ftizulo. Li metis senrandajn okulvitrojn, kiel la antaŭulo. Lutage vilaĝanoj diris al la instruisto: “Kiam vi sidante sur via azeno rajdas al montoj, Ĥoĝa efendio, pli bone viajn okulvitrojn lasu hejme, ĉar al kurdoj ĉia okulvitrulo ŝajnas, kiel spiono.

Ili jam estis mortigintaj multajn okulvitrulojn”.

Sed la nova instruisto ignoris konsilon. Li ofte rajdis al montoj kaj iutage plu ne revenis. La homoj diris, ke li, estante ftizulo, verŝajne pro malforteco estas glitinta kaj falinta de azeno kaj ie restis kuŝinte. Sed aliuloj diris: “Ne, li metis okulvitrulojn, la kurdoj ja mortigas okulvitrulojn, ĉar pensas, ke la sultano ilin sendas spioni por zaptiĥoj kaj impostkolektistoj. Certe la kurdoj estis mortigintaj lin kaj la korpon estis ĵetintaj en montpasejon. Kaj la animo de instruisto estas ie ĉe Kristo”.

- Sed kie estas lia azeno? - demandis homoj.
- La kurdoj estas kunportintaj.
- La monta fera kurdo ne rajdas sidante sur azeno.
- Vere.
- Verŝajne ili estas buĉinta azenon kaj jam delonge estas manĝinta.
- Aŭ ili ambaŭ estas mortaĉigitaj kaj estas falita en montpasejo.
- En tiu okazo la animo de la azeno ankaŭ estas en ĉielo.
- Eblas.

Jes, efektive tio estis enigmo. La instruisto perdiĝis senspure. Li lasis nenian valoran aĵon. La sola lia heredaĵo estis kesto – plena de libroj.

Fakte, estis tiel. Veninte Jedi Suon, la instruisto kunportis keston kun libroj – tian pezan, ke malfacile alportis hejmen la ruĝharula forĝisto kunekun la filo de selisto – Karo. Ĉar la instruisto luis ĉambron en forĝista domo, sed en lia kamero loko ne sufiĉis, pro tio, kaj nur pro tio, ili keston metis en vastan forĝejon, malantaŭ balgo – laboranta rimede piedo. Kaj tie ĝi restis. Post la morto de instruisto la forĝisto volis bruli ĉiujn librojn, por ke ŝpari zorgeme sekigintan, bone bruliĝintan grandkvantan seksterkon. Alidire ŝpari monon. Sed okazis alimaniere.

- Kaj jen kiel, - diris Meddah. - Kiam la forĝisto jam volis bruli librojn, je tiu sekundo eniris lia baptofilo Vardan. Li diris:

- Mi donos al vi tri sakojn da seksterko anstataŭ tiuj libroj.
- Kion vi volas fari tiujn librojn?
- Mi volas legi, - respondis Vardan.
- Oni diris, ke ĉu vi deziras iĝi poeto?
- Jes, - diris Vardan.
- Ĉu pro tio vi devos legi ĉiujn librojn?
- Nu, ne.
- En tiu okazo, kial vi deziras legi ĉi tiujn librojn?
- Nu, mi simple deziras, - diris Vardan.

Kaj ili alvokis filon de selisto – Karo kaj triope alportis la keston en odaon de Ĥatisjanoj. Nek Hakob kontraŭis, nek Tsovinar. La odao estis vasta, ĉar la malgrandaj infanoj kreskis kaj kelkaj plenaĝuloj jam foriris el patra domo. Tiel, Vardan, scipovanta ludi ŝalmon, kion obeis la ŝafoj en montaj paŝtejoj, komencis ankaŭ legi librojn. En ĉi tiu kesto estis multaj bonaj libroj, pri kiuj rakontis la instruisto. Multoj estis skribitaj armene, sed alioj estis tradukitaj armene. Kaj ĉiuj tiuj libroj provas ekspliki mondon.

- Tia granda kvanto de libroj malbone efikos intelekton de nia filo, - diris Hakob al Tsovinar, - la akvoportisto same havas malutiliĝitan intelekton.

- Sed ne pro legado de libroj, - diris Tsovinar.

La ftizula instruisto foje tiel parolis kun Vardan:

- Kiam mi mortos, ĉiujn librojn de mia kesto vi prenu.
- Ĉu mi devos legi tiujn ĉiujn librojn, por ke iĝi poeto?
- Ne, - diris la ftizula instruisto.

Kaj la ftizulo diris:

- Mi vidis, kiel via ŝalmo obeas ŝafojn. Kiam vi ludas ŝalmon, la ŝafoj tuj haltas ĉe ravino kaj revenas.



- Sed ĉu tio pruvas, ke iutage mi iĝos poeto?, - demandis Vardan.

- Ne, - diris la ftizulo.

Kaj la ftizulo diris:

- Se vi deziras iĝi poeto, vi devos ludi alian ŝalmon.

- Sed, Ĥoĝa efendio, kian alian ŝalmon?

- Nevideblan ŝalmon, mia eta Vardan, la ŝalmon, kiu apartenas al alia mondo.

- Sed kial mi devos teni ĝin per miaj manoj, Ĥoĝa efendio, aŭ blovi, se ĝi ne ekzistas?

- Sed kiu diras, ke ĝi ne ekzistas? Aŭskultu min, ŝafideto mia: estas aĵoj, kiujn ni ne vidas, sed ili ekzistas.

- Sed kiel eblas ilin vidi, Ĥoĝa efendio?

- Ilin eblas vidi sen okuloj, ŝafideto mia.

- Kiamaniere?

- Nu, ŝafideto mia, certe helpe niaj sentoj kaj intelekto. Tiun ŝalmon, kiun ne eblas teni, iutage vi trovos kaj sen okuloj ekvidos ĝin, tenos sen manoj, kaj ĝi ĉiam estos kun vi.

Foje maljuna paŝtisto rakontis al Vardan pri konata kriptulo – nepovanta trovi edzinon. Kaj ĉar la kriptulo vivis sole kaj izolite, li komencis kanti pri amo kaj iĝis poeto.

- Ĉu kiam iu volas iĝi poeto, li nepre devos esti kriptulo?

- Jes, - respondis maljuna paŝtisto.

Sed la ftizula instruisto diris:

- Tio estas malĝusta. Ne nur kriptuloj iĝas poetoj. Poetoj similas ciganojn, sed ili ne legas sekretojn sur fruntoj kaj manoj. Poetoj legas manuskriptojn de animoj, poste ili tiujn transponas en vortaj melodioj.

- Kaj kiam mi eklegos manuskriptojn de animoj?

- Kiam alvenos la tempo de nevidebla ŝalmo, - respondis la ftizula instruisto.

- Sed kiam alvenos tiu tempo?  
- Iam alvenos. - La ftizula instruisto karesante buklajn harojn de Vardan, ridetis kaj diris: "Iam venos la tempo, kaj la nevidebla ŝalmo sendos al vi siajn heroldojn.

Kiam Vardan iĝis junulo, al li ŝajnis, ke la heroldoj de nevidebla ŝalmo aperis en siaj sonĝoj. Post tio en lia koro ekkreskis granda ĉagreno kaj granda timo, sed samtempe ankaŭ tremeta ĝojo – akompanata de febra atendo. La heroldoj de nevidebla ŝalmo ludis por li, kaj Vardan aŭskultis mil kaj unu melodiojn en siaj sonĝoj. Kion Vardan antaŭsentis, nun iĝas realeco. Li sentis, kvazaŭ renversaj torentoj, elfjetitaj el kaŝitaj fontoj, kunfluiĝis en riveroj, lagoj kaj maroj. La ruĝlipulaj anĝeloj blovis siajn trumpetojn. En sonĝo Vardan vidis sulkitajn mamojn de kurdino Bjulbjul. Ili, kvazaŭ sakoj, pendis de dorso de sennoma azenino. Ju malproksimiĝis Bjulbjul, des pli grandiĝis ŝiaj mamoj, kaj kiam la azenino atingis ĝis fino de vilaĝo, ŝiaj mamoj similis varmajn, molajn, tenerajn laktozajn mamojn de patrino de Vardan. Poste, la patrinaj mamoj ankaŭ komencis reŝanĝiĝi. Nun Vardan vidis la mamojn de sia fianĉino – neniam viditajn en pasinto. Ili estis malgrandaj, similis granatojn – kun allogaj mampintoj.

- Venu al ni, tenu nin, - vokis ili. Kaj la mamoj ridis, ĉar liaj manoj hezitis: - Vi povas!

Kaj Vardan tenis la mamojn.

- Ne premu, - petis la mamoj. - Vi devos konduki tenere kaj milde, tre milde.

- Ĉu mi devos tuŝi nur per manoj?

- Ne, ne, mia fianĉo!

- Kiel ankaŭ, gelin, mia eta fianĉino?

- Per viaj lipoj, fianĉo mia, per viaj lipoj!

Kaj Vardan ekkomencis suĉi mamojn, kiel suĉinfano. Ploretante kaj nesatiĝite li algluis al mamoj de fianĉino. Ju pli li suĉis, des pli la

mamoj malgrandiĝis, finfine tute malaperis.

- Ili plu ne ekzistas - diris li al sia fianĉino.
- Vi glutis ilin, - diris la fianĉino.
- Kion nun mi devos fari?
- Vi devos daŭri suĉi, mia eta fianĉo.
- Sed kion alian mi devos suĉi?
- Ĉiojn plezurajn por viaj lipoj, mia eta fianĉo.
- Ĉu ankaŭ viajn manojn?
- Ankaŭ miajn manojn.
- Ĉu ankaŭ viajn piedojn?
- Ankaŭ miajn piedojn.
- Kion ankaŭ?
- Ĉion, mia eta fianĉo. Ĉion.
- Ĉu inter viaj femuroj ekzistas lipoj?
- Jes, mia eta fianĉo.
- Ĉu vere ili estas teneraj, kiel la oreloj de nenaskita ŝafideto?
- Jes, mia eta fianĉo.
- Aŭ ĉu ili estas grandaj kaj ridindaj, kiel azenaj oreloj?
- Vi povas mem ĉion klarigi.
- Ĉu mi vere devos klarigi?
- Jes, vi devos.
- Ĉu ni jam estas edziĝintaj?
- Mi ne scias.
- Ĉu tio povas esti nia unua edziĝa nokto?
- Jes, povas esti.

Kiam la tremeta ĝojo fortuŝis timon, ĉagrenon kaj honton, kaj li pleniĝis de libereca sento, Vardan vekigis kriante.

- Do, kion plu?, - diris Hakob, kiam Tsovinar montris malsekan matracon de sia filo, **doŝakon**<sup>41</sup> – plenitan de pajlo kaj ŝaflano, ne tiom malnovan, kiom ava jorghano.

---

<sup>41</sup> Perse.

- Kion signifas “do, kion plu”, - diris Tsovinar.  
- Tio signifas, ke li iĝis viro, - diris Hakob.  
- Via filo malŝparis valorajn semojn, anstataŭ donaci al sia edzino.

- Sed li ne havas edzinon.
- Sekve, io devos ŝanĝiĝi.
- Ni devos edzigi lin.
- Jes.
- Kiam vi parolos kun vilaĝestro?
- Baldaŭ.

- Sed la tempo ankoraŭ ne alvenis, - diris Meddah. - Nur en sekvonta jaro la filino de vilaĝestro makulis doŝakon – plenitan de pajlo kaj ŝaflano, kaj makulis per sango – fluanta ne el vundo.

- Estas tempo, - diris la vilaĝestra edzino, kiam frumatene vidis sangan spuron sur doŝako. - Nun ni devos oficiale anonci pri la fianĉeco kun malpliaga filo de Ĥatisjanoj.

- Sed ŝi estas nur 11-jaraĝa, - diris la vilaĝestro.  
- Dekunu ne estas dek, - diris la edzino, - kial vi volas atendi, por ke ŝi iĝu maljuna virgulino?

- Ekzistas tradicio, - diris la vilaĝestro, - edziĝfestoj okazas post unu jaro ekde unua sangofluo. Do, nun edziĝfestoj ne povas esti.

- Sed kial ne povas esti?  
- Ĉar ni ankoraŭ ne obezigis ŝin. Ĉu vi kredas, ke la malpliagula filo de Ĥatisjanoj edziĝos kun skeleton, nur ĉar lia patro kaj mi interŝanĝis du monerojn?

- Sed kia tempo necesas por obezigo?
- Kutime du jaroj.
- Ni devis pli frue komenci obezigon.
- Jes.
- Ĉu vi diris du jarojn?
- Jes, mi diris tiel.
- En tiu okazo ni devos dum unu jaro fini tion aferon.

- Kaj tiel okazis, - diris la fabelisto. - Antaŭe okazis la unua fianĉeco – je la tago de interŝanĝo de moneroj, kiam la fianĉino estis en vindaĵoj kaj tute ne sciis kio okazis kun ŝi. Tio estis preskaŭ sekreta fianĉeco – honora afero de du viroj, akompanita de promeso, inter Hakob kaj vilaĝestro. Nun tute oficiale la fianĉeco konfirmiĝis, kaj estis realeco. La filo de Hakob kaj la filino de vilaĝestro nepre devos iĝi geedza paro. La vilaĝestro rakontis al ĉiuj, ke sia filino sangofluas sen vundo, kaj iĝis virino. La afero de obezigo ankaŭ ne restis sekrete. Ĉiuj sciis, ke ĉi tiu maldika, eta jam sangofluanta sen vundo knabino – konsistita de rompeblaj ostetoj, dum unu jaro devos iĝi bonstatura virino. Ĉiuj sciis, ke la promeson konfirmis la edzino de vilaĝestro per ĵuro je la nomoj de ĉiuj sanktuloj.

Ĉiuj sciis, ke la patrino de Vardan diris al edzino de vilaĝestro: “Mi sendos por via filino paĥlavaon da 40 sofraoj<sup>42</sup>, precize je la tago, kiam ni donos fianĉan ringon – jam preparita kaj sendita de mia filo juvelisto Sargis”. Poste ŝi aldonis: “Nepre 40 sofraojn, por ke la homoj diru: “La fianĉino ricevis 40 sofraojn, laŭ la tradicio, ĉar fianĉiĝas infanoj de famaj homoj””. Oni diris, ke la edzino de vilaĝestro respondis: “Jes, nepre 40, precize paĥlavaon da 40 sofraoj. Kaj ĉiufoje kiam mia filino formanĝos la vican kvanton, mi devos ree pleni la sofraon”.

“Por Dio, - diris Tsovinar, - ŝi devos esti obeza kaj belstatutra. Vi dikigu mian bofilinon, por ke mian filon oni ne moku”.

Vardan rare vidis sian fianĉinon. Kvankam dum infaneco ili ofte ludis kunekun, tamen estis hontinde, se iu vidus lin aparte kun sia estonta edzino. Ankaŭ estis malrespekte pririgardi aŭ tuŝi ŝin dum ludoj.

- Estu atenteme, neniam staru ĉe ŝi!, - diris la patrino, - kontraŭe la homoj tuj ekkomencos klaĉi.

- Kaj kio okazos poste?

---

<sup>42</sup> Pleto/turke/.

- Poste la homoj diros: “Lia fianĉino ne estimas sian vualon”.
- Sed ŝi nenian vualon uzas.
- Sed ŝi uzos, malsaĝa knabo. - Kaj lia patrino ripetis: “Estu atenteme! Neniam iru al ŝi hejmen, ĉar ŝi ne havas fianĉrington sur fingro. La ŝia bona reputacio estas ankaŭ via bona reputacio, same bona reputacio de viaj infanoj kaj nepoj”.

La periodo por obezigo de fianĉino kaŭzis kalumniojn kaj malbonajn maljunulinajn plaĉojn. La homoj diris, ke la knabino de la vilaĝestro neniam dikiĝos, ĉar dum infaneco patrino ŝin ne banis per saloza akvo. En la vilaĝo homoj dum banado ne uzadis sapon, sed nur natrion el lago Vano, kiun komercistoj vendis al vilaĝanoj. La vilaĝestro havis grandan kvanton da tiu natrio, pro tio cirkulis onidiroj, ke la knabinon de vilaĝestro la patrino neniam banis per salo, laŭ ordo, sed per akvo, anstataŭ salan akvon, t.e. per akvo el lago Vano. Ĝi dum unuaj 40 tagoj de vivo malfortigas korpon, sed la salo, kiel estas konate, tion ne faras. Sed la vilaĝestro vilaĝanojn mokis. Li diris:

- Aŭskultu vi, la natrio el la lago Vano kaj la salo estas tute la samaj aĵoj. Mi vetas kun ĉiu, kiu kuraĝos same veti, je 30 ŝafoj. Mi vetas, ke mia filino Arpine en tago de sia edziĝsoleno kun malpliaĝa filo de Ĥatisjanoj en preĝejo, estos tiom dika, ke ne povos pasi tra la truo de puto **Katnaghbjur**, eĉ ŝi deziros.

- Kiel vi imagas tion, muĥtaro bejo? Kiu volos fali en puton aŭ ĉu vi pensas ŝi falos sur ĉirkaŭrando de puto Katnaghbjur?

- Sed kial, malsaĝuloj? Ĉu mia filino falos sur ĉirkaŭrandon, se saltos en puton? Kiel vi ne volas kompreni? Mi pensas, ke ŝia postaĵo tiom grandiĝos, ke ne trapasos puton. Mi pensas tiel.

- Sed ne ekzistas tiaj dikaj postaĵoj, muĥtaro bejo. Ni simple scias, ke tiaj grandaj postaĵoj ne estas.

- Mi pruvos, - diris la vilaĝestro.

- Sed kiel vi volas pruvi, kiam via filino ne vidis salon? Ŝin vi banis per pulvoro el la lago Vano.

- Tamen mi pruvos.  
- Kaj kiom da paŭlavao ŝi devos manĝi, ĝis ŝia pastro neniam vidanta salon, iĝos tiom dika, kiom vi insistas?

- Nu, se vi volas scii, efendioj, ŝi devos ĉiutage manĝi po 40 pecojn da paŭlavao, ĉar precize necesas po 40. Kaj sciu, kiom pecoj da paŭlavao devis baki mia kompatinda edzino, donu Dio al ŝi sanon, por ke nia filino iĝu belstatura virino.

- Ne, muĥtaro bejo. Tion povi kalkuli nur la ftizulo – nia antaŭa vilaĝa instruisto. Sed li mortis kaj kun sia azeno malaperis en montpasejoj. Dio kvietu lian animon.

Jes, okazis tiel, - diris Meddah. - Ĉiuj atenteme observis dikiĝon de fianĉino – precipe du familioj, ĉar tio rilatis al honoro de vilaĝestro kaj Hakob. En vilaĝestra domo dum tuta jaro bakiĝis paŭlavao, kaj tra vilaĝo daŭre disvastigis ĝia dolĉaodoro. Finfine eĉ kurdoj sur altaj montoj flaris la odoron. Kaj jen la kurda ŝejko Sulejman diris al siaj filoj: “Baldaŭ tie okazos edziĝfestoj. Se miaj spionoj ne trompas min, temas pri filino de kalva vilaĝestro, muĥtaro Jeprem Abovjan kaj pri malpliĝa filo de vilaĝano Hakob. Ne donu Alah, ke ili evitos doni edzan imposton al mi kaj al mia gento”.

## 9.

Vardan senpacience atendis tagon de edziĝfestoj. Ju dikiĝis la fianĉino, des pli li deziris posedi tion grandan postajon, kiu enbariĝos en puton Katnaghbjuro, estante pli granda kaj alloga, ol akvomelonoj el Diarbekiro. En sia sonĝo li aŭdis voĉojn invitantajn aĉetulojn en granda bazaro de malproksima urbo, kaj la akvomelonoj estis de viando kaj sango – pli grandaj, sukozaj, pezaj, ol la plej granda, sukoza kaj peza diarbekira akvomelono. Kaj ĉu tiu akvomelono falos en puton Katnaghbjuro? Ho, Dio, kreinto de akvo en puton kaj pulpo en akvomelono! “Kial la akvomelono ne falos en puton?”, - pensis

Vardan en sia sonĝo, kaj li vidis homojn antaŭ akvomelona pavilono.

Unu el aĉetantoj estis riĉa turko kun ora poŝhorloĝo – videbla de post malbutonumita jako.

- Hej vi, vendisto! Kial la akvomelonoj ne povas fali en puton?

- Mi ne scias, efendio. Sed mi supozas, ke Alaho kreis grandan akvomelonon, sed konstruis mallarĝan puton.

- Sed Alaho puton ne konstruas, perfekta stultulo! Alaho nur donas akvon, puton konstruas la homo.

- Jes, efendio. Mi ĵuras je la nomo de Alaho. Vi diras ĝustecon.

- Kiu konstruis tian mallarĝan puton?

- La armenoj, efendio.

- Ĉu tiuj senkredulaj hundoj?

- Ĝuste tiel, efendio. Ili intence konstruas mallarĝajn putojn, por ke la granda akvomelono enbaru.

- Sed kial?

- Mi ne scias, efendio. Sed mi supozas por ke la homoj vidu, kia granda estas la akvomelono, kia peza, sukoza, dika, ke ne povas fali en tiun malbenitan puton – nomatan de armenoj Katnagħbjuro, kaj ĝia enirejo estas tre mallarĝa por tiu armena akvomelono.

- Ĉu la akvomelono estas armena?

- Ĝuste tiel.

- Sed kiel ĝi kreskas en Turkio?

- Ĉar la armenoj insistas, ke ĉi tiu landparto ne estas turka. Tiu ĉi lando nomiĝas **Hajastano** – Armenio. Kaj ĉirkaŭ ni ĉio estas Hajastano kaj ĉio kreskinta ĉi tie apartenas al armenoj. La akvomelonoj ankaŭ.

- Sed kio okazos, se vi vendos tiun akvomelonon kontraŭ mia ora horloĝo?

- Domaĝe, ne eblas, efendio.

- Mi deziras truiĝi ĝin kaj ŝovi tien mian langon. Mi vetas, stultula hundo, ke per mia lango mi eligos mielon kaj ĝuos.

- Sed, efendio, ja en akvomelano mielo ne ekzistas.

- Certe ekzistas, stultulo. En akvomelono ekzistas mielo! Kaj mi vetas. Ho, kia mielo!



- Sed, efendio, mi ne povas vendi tion.
- Sed kial vi ne povas, filo de diablo! Ja mi kontraŭ donas mian oran poŝhorloĝon.
- Ĉar la akvomelono jam estas vendita.
- Verŝajne vi vendis al armeno, ĉu ne?
- Jes, efendio.
- Tiuj hundoj forportas ĉion de ni.
- Jes, efendio.
- Kaj ĉu vi scias nomon de tiu hundo?
- Lia nomo estas Vardan Ĥatisjan. Li estas 14-jara filo de Hakob Ĥatisjan.
- Tiun Hakob kaj lian filon frapu la fulmo. La Alaho per glavo kaj fajro prudentigu tiujn senkredulojn. Ĉu vi ne vidas, ili ĉiojn bonaĵojn, eĉ akvomelonojn, forprenas de ni?

Vardan en sia sonĝo aŭdis voĉojn invitintajn aĉetulojn, kaj la voĉon de riĉa horloĝgula turko. Li aŭdis zumadon de granda bazaro kaj inspiris odoron de milaj gustozaĵoj. Poste subite li vidis, kiel granda akvomelono, la postaĵo de sia fianĉino, supreniĝis en aeron kaj sidante sur fluganta tapiŝo, alflugis ĝis Jedi Suo kaj rekte eniris sub lia jorghano. .... diris tiu graso akvomelono al Vardan:

- Mi estas via. Ni baldaŭ edziĝos. Sed ne forgesu pagi edzan imposton, t.e. precize duonon de doto.
- Se ĉu mi forgesus?
- En tiu okazo min defloros la kurdoj.
- Sed tio ne povas esti!
- Tamen povas esti.

En sonĝo Vardan tenis la akvomelonon, kaj kvankam li neniam kuraĝis, vere ne rajtis, nun karesis rondan karnon kaj, sur malsupra parto de akvomelono li sentis arbuston. Ĝi malfermis, disiĝis, kiel la Ruĝa maro antaŭ bastono de patriarko.

- Malantaŭ arbusto mi sentas buŝon – kun malfermantaj lipoj.

- La lipoj – nur estas la maro, fianĉo mia. Ĉu vi havas bastonon?
- Jes, gelin, fianĉino mia.
- La maro malaperis, fianĉo mia. Ĉu vi ekrigardis tion?
- Jes, gelin, fianĉino mia.
- Restis nur lipoj – malfermantaj por vi.
- Jes, gelin, fianĉino mia.
- Ili estas teneraj, kiel oreloj de nenaskita ŝafideto.
- Ne, gelin, vi ne pravas, tiuj estas grandaj, kiel oreloj de aĝa azeno.
- Tute egale, fianĉo mia. Mi ne estas kulpa, ke ege multe manĝis paŭlavaon, kaj ili tiel grandiĝis kaj dikiĝis.
- Mi ne scias, eta gelin, fianĉino mia.
- Ĉu eble vi volus maldikan pupeton?
- Ne, eta gelin.

- Neniu divenis, kiom da li nokte ŝprucigis sur jorghano, - diris la fabelisto, - sed mi pensis, ke la bonkvalita semaĵo, malŝparita dum obezigo de sia fianĉino, plenigus argilajn potojn, metitajn ĉe muroj de odao, se ili estus malplenaj, kaj ne plenitaj de selakto, fromaĝo, peklitaj verdaj tomatoj, piproj kaj aliaj nutraĵoj. Tion certe vidis la avino kaj patrino.

- Mi ja diris, ke vi ne tuŝu vian vosteton: ĉu vi volas iĝi kiel la akvoportisto?

- Sed mi ne tuŝas, panjo. Ĉio okazadas en sonĝo. Ĉu mi estas kulpa, ke la akvomelono – konsistita de viando, sango kaj mielo persekutas min en dormo.

- Ĉu tio ĉiam venas dum viaj sonĝoj?
- Jes, panjo.
- Sed kiu en viaj sonĝoj frotas vian ankoraŭ infanan vosteton?
- Neniu, panjo.

En vilaĝo Jedi Suo la edziĝfestoj ĉiam okazis post kolekto de rikolto. Tiel estis ĉiam. Kiam post draŝado la vento forblovis restitajn

ŝelojn tra tuta Hajastano, la maljunulinoj kutime diris: “Baldaŭ ree estos **harsanik-plav**<sup>43</sup>. Ili konsideris rizan armenan manĝaĵon – konatan ankaŭ de turkoj kaj nomitan de ili **cerde-plav**. La maljunulinoj bone scias tion. Precize estis tiel. Kun la aŭtuno, senvoĉe paŝante, venas pagana diino Anahit kaj trapasas ĉiujn armenajn vilaĝojn kaj urbojn, por ke allogante fianĉinojn, alkonduki al domoj de fianĉoj. Tiel okazis ankaŭ en 1893j., kiam Hakob en sia sonĝo vidis Anahit, kiu diris: “Estas la tempo, Hakob, edzigi vian malpliaĝan filon, ĉar rigardu, Hakob, la fianĉino dikiĝis kaj por via malpliaĝa filo iĝos fruktodona kampo, kie via filo povas semi kaj rikolti.

Pri la atendanta edziĝfesto oni interparoladis en vilaĝo. La maljunuloj spritis, starinte ĉe Jotnaghbjur – Sep fontoj, kaj la maljunulinoj honteme ridetis:

- Hakob deziris, ke sia filo iĝu fiŝkaptisto, - diris maljunulinoj, - sed li iĝis vilaĝa paŝtisto, pensinta, ke iĝos ankaŭ poeto.

- Li estas fiŝkaptisto, - diris maljunuloj, - ĉar kaptis dikan fianĉinon. - Kaj maljunuloj ridante daŭris, - por tia graso fiŝo la fiŝkaptisto bezonas firman fiŝkanon. Kiel vi pensas, la malpliaĝa filo de Ĥatisjanoj ĉu havas bonan firman fiŝkanon, por ke tenu ĉiam tian granan fiŝon sur pinto de fiŝhoko?

La maljunulinoj ruĝiĝante pro honto kaj sub kaptukoj diris:

“Ni tion ne scias. Sed lia fiŝkano estas juna. Donu la Dio al li multajn infanojn!

Antaŭ sep tagoj de edziĝfesto, sidante sur sia sennoma azeno, Bjulbjul venis najbaran provincan urbon Gjoklio, por ke sciigi oficialan heraldon – Nazim efendion. La heraldo Nazim efendio estis turko kun lama piedo kaj surda orelo, estis respondeculo por sep armenaj kaj du turkaj vilaĝoj en tiu ĉi provinco.

- Mi alvenis kun misio de Hakob Ĥatisjan, - diris Bjulbjul al heraldo. - Lia filo Vardan dum sekvonta semajno edziĝas kun filino de

---

<sup>43</sup> Edziĝfesta pilafo/armene/.

vilaĝestro Jeprem Abovjan. Ĉu vi povas pri tio sciigi ĉiujn armenajn sep vilaĝojn kaj diri al vilaĝanoj, ke ĉiuj estas invititaj, krom malsanuloj kun ĥolero kaj franka malsano?

- Kial Hakob Ĥatisjan persoe ne alvenis?, - diris la heraldo.
- Ĉar li sendis min - respondis Bjulbjul.
- Kiel pagos tiu armeno al mi?
- Li donos al vi paron da novaj ŝuoj, kiujn kudros lia filo Tigran.
- Sed kial mi devos kredi, ke mi ricevos tiujn ŝuojn?
- Kiom da jaroj vi konas min?, - demandis Bjulbjul.
- Jam pli ol 20 jaroj, - diris la heraldo.
- Ja ofte mi venis al vi kun sciigoj!
- Sufiĉe ofte, - diris la heraldo.
- Ĉu iam mi trompis vin?
- Ne, - diris la heraldo.

- La heraldo konis ĉiujn loĝantojn de 7 vilaĝoj, - diris la fabelisto.

- Kaj certe ĉiuj konis heraldon. Ĉiufoje, kiam li kun sia senhara fela ĉapo, eluzitaj vestaĵoj kaj ŝuoj, kaproleda tamburo kun du bastonetoj – penditaj de rimeno, lamante pasis tra stratoj, por ke en vilaĝa placo li sciigu vilaĝanojn pri lastaj deklaroj de sultano, la infanoj kriadis: “Venas la mjunadio! Venas la mjunadio!” Kelkaj infanoj ĉe lia surda orelo kriis mokajn vortojn kaj insultojn. Ĉar la heraldo sciis nek legi, nek skribi, kun si venis instruita armeno, scipovanta legi turkan tekston kun arabaj literoj. La instruita armeno legitan tekston flustris ĉe la sana orelo de lama turko – kun unu surda orelo. Kaj la turko tenante paperon antaŭ nazo, simulis, kvazaŭ povas facile legi ĉion, kaj poste sultanon tekston li kriis al amaso. La voĉo de la mjunadio estis tiom fortega, ke homoj timis, eĉ kiam sciigoj estis bonaj. Oni diris, ke Nazim efendio tiom laŭtege kriis, por ke la eĥo de sia parolo atingu montajn kurdojn, kvankam mjunadio sciis, ke ordonoj de sultano ne interesas kurdojn.

Kiam lastfoje la edzino de Hakob estis graveda, la mjunadio kun sia armeno ree venis vilaĝon, Hakob lin alvokis flanken kaj demandis:

- He, Nazim efendio, kiajn novaĵojn?  
- Baldaŭ aŭskultos vi, - diris la mjunadio.  
- Ĉu vi ne povas nun sciigi min, Nazim efendio.  
- Ne, Hakob efendio.  
- Ĉu eĉ por drinkmono? Ĉu por eta baĥŝiŝo?  
- Pri tio mi devos bone pensi, Hakob efendio. - Kaj singarde aldonis: Hakob aghao.

Kaj ĉu eĉ, se mi donos al vi grandan donacon?  
- Ĉu vi diris grandan donacon, Hakob aghao? Ĉu mi ĝuste aŭdis, Hakob bejo?  
- Jes, vi guste aŭdis.  
- Nu, Hakob paŝao. Por granda donaco eblas konsenti, kaj mi sciigos vin pluon, ol mi scias.

- Hakob paŝao, - diris la mjunadio, - la rusa-turka milito finiĝis. La rusoj denove remarŝas. He, kion vi diros pri tio?

- Kia milito ... Nazim efendio?  
- Simpla milito, Hakob paŝao, en 1877-a jaro kaj laŭ mia opinio en 1978-a jaro. En tiu ĉi milito mi pensas ni malvenkis, sed la rusoj subite ial foriris.

- Ĉu vere, nun ni militas?  
- Certe, Hakob paŝao.  
- Sed ni ĉi tie nenian soldaton vidis.  
- Kaj ĉu nek rusojn?  
- Ne, nek rusojn.

- Ĉu vi havas aliajn sciigojn, Nazim efendio?  
- Jes, Hakob paŝao. Domaĝe, malbonajn sciigojn.  
- Ĉu vi povas malbonajn sciigojn lasi por vi.  
- Ne, Hakob paŝao, bedaŭrinde ne eblas, ĉar vi – armenoj, devos pagi militan imposton, t.e. bedelon, ĉar al mi ŝajnas, ke vi – timemaj hundoj, estas ege malfortaj, por ke havi armilojn en la armeo de sultano.

- Sed ni tute ne estas tiaj malfortaj, Nazim efendio.
- Ĉu eblas ke vi kaŝas armilojn?
- Ne donu Dio, Nazim efendio.

- Bonvolu diru, Nazim efendio, ĉu vi povas legi ion nesribitan en tio ordono? Ĉu vi povas legi por vilaĝanoj, ke la sultano gratulas min, okaze mia filo Vardan?

- Sed kie estas via filo Vardan, Hakob paŝao?

- Li ankoraŭ ne estas ĉi tie, sed baldaŭ alvenos, ĉar mia edzino estas graveda.

- Kiam via filo aperos, Hakob paŝao?

- Precize, kiam la unuaj folioj forfalos de arboj, Nazim efendio.

- Nu bone, Hakob paŝao, mi faros ion. Povas esti, ke la sultano diros ion, kion li tute ne diris. Ĉe Alaho ĉio eblas. Verŝajne la sultano gratulis vin kaj tute ne scias pri tio.

- Estas tiel, Nazim efendio.

- Kaj finfine, Hakob paŝao, se ni bone ekpensu, kial la sciigo pri remarŝo de rusoj estas pli grava, ol baldaŭa alveno de via filo Vardan.

- Estas tiel, Nazim efendio.

- Kaj kia estas valoro de via donaco?

- Nu, Nazim efendio, kia estos via parolo.

- Pri kio temas, Hakob paŝao? Ĉu pri milito, aŭ bedelo, aŭ remarŝo de rusoj?

- Ne, Nazim efendio, mi konsideras la aferon de mia filo.

- Ĉu tion?

- Jes, precize tion aferon.

- Tio okazis tre delonge, - diris Meddah. - Kaj nun la sama heraldo iris vilaĝojn sciigi, ke la filo de Hakob – Vardan, kiun li gratulis de nomo sultano, ankoraŭ antaŭ de naskiĝo, jam ne nur estas ĉi tie – en tiu ĉi mondo, sed havos edziĝfeston kun filino de vilaĝestro de Jedi Suo Jeprem Abovjan.

## 10.

Antaŭ du tagoj de edziĝfestoj el Ameriko alveturis onklo Nahapet. Kun li alveturis lia pliĝa filo Hovard, kies nomo estis Hovanes, kiel nomiĝis la malsaĝa akvoportisto. Eble vi kredos aŭ ne kredos, Hovard estis fraŭlo, malgraŭ je la kvin jaroj estis pli aĝa ol Vardan. La alveno de amerikanoj Jedi Suon estis tia evento, ke la paseroj sidantaj sur tegmentoj pro miro forgesis siajn lingvojn – certe nur portempe. Ĉar kiam la paro malleviĝis el ĉaro antaŭ domo de Ĥatisjanoj, la paseroj, sidantaj sur plataj tegmentoj, ree ekĉirpis pli emocie, kvazaŭ interrompante unu alian.

- Tiu estas frato de Hakob, - diris homoj. - Li estas ĉifonvendisto, sed milionulo.

- Kaj kiu estas lia filo?
- La filo estas heredanto de Nahapet.
- Kiel la ĉifonvendisto metis larĝrandan ĉapelon?
- Ni ne scias.
- Lia filo ankaŭ metas tian ĉapelon.
- Jes, ni vidas.
- La turkoj ilin batante mortigos, se ili promenu tra la stratoj – metinte tiajn ĉapelojn.
- Sed ne en nia vilaĝo.
- Ĉu ili en Bekiro ankaŭ paŝadis tiel?
- Ni demandu ilin.
- Sed ili estis en Bekiro, ĉu jes?
- Jes, ili kelkaj tagoj vivis en domo ĉe filo Hakob – Hajkaz.
- Ĉu ĉe la mastro de "Hajastano"?
- Jes.

- Mi aŭdis, ke la pliĝa filo de Hakob telegramis al ĉifonvendisto – okaze edziĝfestoj.

- Jes, mi ankaŭ aŭdis.
- La ĉifonvendisto en Ameriko verŝajne donis al poŝtisto grandan baĥŝiŝon, kontraŭe li ne ricevis la telegramon.

- Jes, estas ĝuste.

- La poŝtistoj en Ameriko ŝajnas bone gajnas per drinkmonoj.

Nu vi kalkulu, kiom da monon ŝovas li en sian poŝon, se ĉiutage alportas multajn telegramojn por multaj milionuloj?

- Jes, estus tre bone labori kiel poŝtisto en Ameriko.

- Mi vetas, ke tie la poŝtistoj ankaŭ estas milionuloj.

Dume la virinoj kolektiĝis ĉe Sepfonto – interŝanĝi lastajn novaĵojn kaj ankaŭ paroli pri amerikanoj, pri iliaj kvadratitaj jakoj, gladiĝitaj pantalonoj kaj grandaj larĝgrandaj ĉapeloj, poste same pri la fianĉino, kiun morgaŭ oni alkondukos en hamamon<sup>44</sup> – gjoklian banejon – en proksima provinca saŭno, por ke tie antaŭtago de edziĝfesto bani kaj purigi. La paro da amerikanoj, ĉirkaŭita de viroj, sidiĝis en vilaĝa kafejo kaj mirigis homojn.

- Ĉu, vere, en Ameriko viroj paŝadas tra stratoj – metinte larĝgrandajn ĉapelojn?, - demandis la muĥtaro.

- Jes, - diris la ĉifonvendisto.

- Kaj ĉu pro tio ilin neniu mortigas?

- Neniu.

- Ankoraŭ rakontu por ni la historion de viaj ĉapeloj, - diris Hakob, - mi imagas kio okazis en Bekiro, kiam vi, metinte viajn amerikajn larĝgrandajn ĉapelojn, promenis.

- Ja mi foje jam rakontis.

- Sed ne ĉiuj aŭskultis.

- Nu, bone, en tiu okazo mi ree rakontos.

Sed la onklo Nahapet verŝajne ne rapidis rakonti historion pri ĉapeloj. Li rakontis pri Ameriko, pri lando de libereco, kie la kurdoj, turkoj kaj armenoj pace kunvivas. Tie ekzistas nek milita imposto, nek pasporto interne lando, nek edziĝfesta imposto, kie la kurdoj kaj

---

<sup>44</sup> Turke.



armenoj pace kunvivas, kaj la kutimaj vortoj **bedel** kaj **teskere**<sup>45</sup> estas ne konataj. Tie la muzulmanoj ne koleras, kiam kristanaj viroj rezignas circumcidi siajn vostojn. Ĉiuj homoj tie estas egalaj, kaj ĉiuj havas egalajn rajtojn. Nur rilate negroj estas alimaniere, ĉar tiuj ne estas veraj homoj, sed hejmigitaj semioj. Pri tio al li rakontis loĝanto el suda ŝtato.

- Ho, kiel mirinde li scipovis paroli, - diris Nahapet. Vi imagu, tiu blankhaŭta loĝanto el suda ŝtato rakontis, kiel iu nigra hejma semio senhonorigis blankan virinon. Tiam nokte alvenis blankaj kapuĉulaj viroj, tiun semion ellitigis kaj tuj tie pendumis. Ĝuste tiel estis. Sed ĝenerale en Ameriko ĉio estas en ordo. La monoj tie estas falita sur stratoj, sed nur aferemaj homoj povas tion vidi kaj kolekti. Certe, ankaŭ kiuj cerbumas. La aliuloj estas malriĉaj pro siaj propraj intelektoj. Ĉiuj povas rapide riĉiĝi, se estas kapabla al tio, kaj se lin subtenas amoza Dio.

- Sed kion vi rakontos pri amerikaj grandaj ĉapeloj? - demandis Hakob.

- Pri kiaj amerikaj grandaj ĉapeloj?

- Pri tiuj ĉapeloj – metitaj de vi, en Bekiro.

- Aĥ, ĉu pri ĉapeloj?

- Jes, pri ĉapeloj.

- Do, jen kiel tio okazis, - ekkomencis la onklo. - Atendu vi, mi bone pripensu.

La amerika dikvanga onklo sidiĝis ĉirkaŭita de viroj. Lia ebria ruĝa nazo kaj liaj nigraj malgrandaj ruzaj okuloj ŝajnis senĉese ridas.

- Mi naskiĝis en Hajastano – Armenio, - diris la onklo. Mia filo Hovanes, kiun ni nomas Hovard, naskiĝis en Ameriko.

Samtempe la onklo ironie montris sian filon – maldikan, iomete palan, sidantan inter Hakob kaj Vardan. Li iam post iam konfuze suĉis nargileon – metitan de Hakob ĉe li.

---

<sup>45</sup> La vortoj ambaŭ estas turke.

- Ĉi tiu amerikana malsaĝulo, - diris la onklo – kvazaŭ plendante senĉese montrante sian filon, - scipovas paroli nek kurde, nek turke, nur scias kelkajn armenajn vortojn, kaj la kvanto estas tiom kompatinda, ke mi devos ridi, por ke ne ploru.

- Sed kiun lingvon posedas li?

- Nur **inglizan**<sup>46</sup>.

- Sed kial li parolas nek kurde, nek turke, nek armene?

- Ĉar li estas vera amerikano, - diris la onklo, - kaj opinias, ke ĉiuj homoj en mondo parolas nur **inglize**.<sup>47</sup> Tiu lingvo sonas, kvazaŭ en homaj buŝoj estas pavimŝtonoj aŭ io abomeninda.

- Nu, ni, metinte niajn grandajn ĉapelojn, iris promeni tra Bekiro, - diris la onklo. - Mi vere timis, ke la turkoj nin mortigos. Sed kiel vi vidas, ankoraŭ ni vivas.

- Ĝuste estas, - diris Hakob.

- Do ni, metinte niajn ĉapelojn, iris promeni, - diris la onklo. - Mi timis, ke la turkoj nin mortigos, sed ankoraŭ ni vivas.

- Vi jam foje diris tion, - diris Hakob.

- Estas ĝuste, - diris la onklo.

- Do, ni niajn ĉapelojn portis promeni tra Bekiro, - diris onklo, - kaj homoj – precipe turkoj, ankaŭ aliaj muzulmanoj nekompreneble rigardis nin.

- Mi imagas, - diris Hakob.

- **Sinek kagidi**<sup>48</sup>, - diris ili laŭte, por ni aŭdeble.

- Kion signifas tio? - demandis mia filo – ĉi tiu amerika stultulo.

- Tio signifas muŝkaptisto, - diris mi al li. - Jen kion.

- Sed kial bekiranoj nomas nin muŝkaptisto?

- Baldaŭ vi ekvidos - diris mi.

---

<sup>46</sup> Anglan.

<sup>47</sup> Angle.

<sup>48</sup> Turke.

- Ni iris tra la interstrateto de butikistoj, kie ĝenerale laboris armenoj, - diris la onklo.

- Inter ili laboris ankaŭ unu turko. Li dormis sidinte antaŭ sia butiko kaj kaptis muŝojn.

- Kiel li povis kapti muŝojn dorminte? - demandis Hakob.

- Do, tiel.

- Ni staris antaŭ butiko kun dorminta turko. "Ĉu vi vidas multnombrajn muŝojn? - diris mi inglize al mia filo. - Ĉu vi scias de kie ili alflugis?".

- Ne, patro, - diris li.

- Mi ankaŭ ne scias, - diris mi. "Do la afero estas tia", - diris mi. - Ĉi tie ekzistas urbo kun nomo Turkalo. Tio estas la plej malpura urbo en Turkio. Somere tie estas tiom da muŝoj, ke la turkoj ilin kaptas eĉ en edziĝfesta supo.

- Ĉu en edziĝfesta supo? - ree demandis la amerikana stultulo.

Nu, jes, precize en edziĝfesta supo, - diris mi. - La turkoj tion supon nomas **djudun ĉorbasi**.

- Sed kial tie ekzistas multegaj muŝoj? - demandis li.

- Ĉar la malnovaj stratoj anticipe situis je tri metroj malsupre nunaj stratoj.

- Kaj je la konto de kio leviĝis malnovaj stratoj?

- Je la konto de balaaĵo, filo mia, - diris mi. - La homoj dum centjaroj elĵetas sur stratoj balaaĵon, ankaŭ ekskrementon kaj aliajn multajn fiaĵojn. Tie estas faligitaj mortaĉitaj katoj, hundoj. Sur tiuj stratoj mortas kaj putras ankaŭ almozuloj. Kaj ĉio dum jarcentoj ramadiĝas sub homaj piedoj, radoj kaj hufoj.

- Kaj kia estas pureco ĉi tie – en Bekiro?

- Pli malbone, - diris mi.

- En tiu okazo ĉu Bekiro estas la plej malpura urbo en Turkio?

- La plej malpura kaj la plej bela - diris mi.

- Poste mi montris dormintan turkon kaj diris. - Ĉu vi vidas, filo mia, ĉiufoje, kiam lin mordas muŝo, li vekigas.

- Jes, patro. - Mi vidas.

- Kaj li rigardas per duonfermitaj okuloj.

- Jes, patro.

- Kaj li iomete atendas ĝis la muŝo rampas supren – sur nazo, frunto ĝis rando de feso.

- Jes, patro.

- Kaj nur post tio li mortaĉigas ĝin. Ĉu vi ekvidis tion?

- Jes, patro.

- Li faras tiel, por ke sur sia vizaĝo restu spuro nek de muŝo, nek de sango. Li malrapide, kun plezuro frakosas muŝon sur sia ruĝa feso kaj poste per unu fingro mortaĉigintan muŝon ĵetas sur straton.

- Jes, patro, mi ekvidis.

- Pro tio la turkoj ne metas larĝgrandajn ĉapelojn, - diris mi al mia filo, - ĉar kiel povas turko per unu bato ĵeti muŝon sur straton, se li anstataŭ feso metu larĝgrandan ĉapelon. Tio ne eblus, ĉar la muŝo restus algluita sur rando de ĉapelo.

- Ĉu pro tio larĝgrandaj ĉapeluloj estas muŝkaptistoj?

- Pro tio, filo mia.

- Sed la muzulmanoj precipe koleris, kiam ni pasis preter moskeo, - diris la onklo. - Ili pli ne diris **sinek kagidi**, sed diris **ŝapkali**. Mia filo demandis: “Kion tio signifas?”. Kaj mi diris al li: “Tio estas turka vorto – signifanta ĉapelulo. Tio estas danĝera vorto, filo mia”.

- Sed kial ĝi estas danĝera?

- Nu, kial, filo mia? Mi ne scias. Ĝi estas danĝera.

Kaj mi diris al li:

- Kiam mi estis ankoraŭ knabeto, ofte mi iris promeni tra Bekiro. Ni vagadis tra bazaroj kaj rigardis virinojn – havantajn **ĉarsavojn** kaj duoblajn **ĉadrajn**<sup>49</sup>. Tie estis anglano – metinta precize saman

---

<sup>49</sup> La du vortoj estas turke.

ĉapelon, kiaj estas niaj. La homoj insultis lin kaj nomis ŝapkalio. Je la sekvonta tago anglanon oni trovis ekster urbo. Lia kapo estis tranĉita kaj apud kapo estis metita ĉapelo – sen larĝaj randoj. Kaj mi supozas, ke tranĉinto la kapon tranĉis ankaŭ larĝajn randojn de ĉapelo, ĉar precize tiuj kolerigis lin.

- Kial? - demandis mia filo.

Kaj mi diris:

- Malsaĝulo! Tute egale kial? Sufiĉas, ke la larĝaj randoj de ĉapelo kolerigis ilin.

Nun ekparolis la pastro, kiu nur aŭskultis – sidinta apud ĉifonvendisto.

- Estas kaŭzo, - diris la pastro.

Kaj la pastro diris:

- Kiam la homoj grandajn larĝgrandajn ĉapelojn nomas muŝkaptistoj, tio estas sendanĝera, ĉar ili uzas siajn langojn por mokado. Ili nek mortigas ĉapelulojn, nek senkapigas, des pli nek tranĉas larĝajn randojn de ĉapelo. Sed la afero estas alia, kiam ili diris ŝapkalio – ĉapelulo. Tio ne estas moka vorto, ĉar ili opinias, ke ĉapelulo alvenas ĉi tien eksciti muzulmanojn kaj moki **Mahdi**.<sup>50</sup>

Kaj la pastro diris:

- Mahdio vivas en paradizo de ĝustaj kreduloj, jam dum siaj vivaj tagoj li konsideriĝis kiel sanktulo. Iam post iam Alaho permesas Mahdion malleviĝi sur teron (tiel opinias la muzulmanoj), por ke informi al ĝustaj kreduloj pri unu el paradizaj sekretoj. Mahdio aperas ĉe kredulo, kiam li fastas kaj puriĝas, ankaŭ dum preĝo, kiam kredulo per sia frunto tuŝas polvon kaj prononcas nomon de Alaho. Kiam Mahdio aperas al muzulmano – genuita antaŭ Alaho, la kredulo ne devas stari, sed nur sian rigardon devas direkti supren. Tiam li vidas Mahdion.

---

<sup>50</sup> Servisto – Religia kaj eklezia gvidanto de muzulmanoj.

- Sed ĉu tio rilatas al ĉapeloj?

- Certe, - diris la pastro, - ĉar kiel povas la kredulo, genue, preĝante sur preĝtapiŝo kun frunto en polvo, direkti sian rigardon supren, kiel povos li vidi Mahdion, se la larĝaj randoj de ĉapelo fermas lian vidadon? La randoj de ĉapelo ja ne estas vitraj?

- Jes, ili ne estas vitraj, - diris Hakob.

- Estas tiel, - diris pastro.

- Ĉu pro tio la muzulmanoj ne metas larĝgrandajn ĉapelojn?

- Nur pro tio, - diris la pastro.

- La ĉapeloj efektive estas danĝeraj, - diris Hakob. - Morgaŭ mia pliaĝa filo Hajkaz alvenos ĉi tien. Mi petos lin por mia frato kaj lia filo aĉeti konvenajn ĉapelojn.

- Estas bona penso, - diris la pastro. - En Bekiro eblas facile elekti bonajn ĉapojn sen larĝaj randoj. Via pliaĝa filo senprokraste post la edziĝfesto devos aĉeti. Mi pensas, kiam li revenos Bekiron, devos tre rapide kun iu ĉaristo sendi ĉapojn ĉi tien. Malgraŭ turbano ne estas malbona, sed mi pensas, ke noblaj sinjoroj – via frato kaj lia filo, devos meti ruĝajn fesojn. Ĉu vi pensas, Hakob efendio, diri al via pliaĝa filo, ke por sinjoroj la plej bonaj estos ruĝaj fesoj.

- Jes, - diris Hakob.

La viroj en kafejo drinkis grandan kvanton da rakio, ankaŭ armenan brandon, manĝis gustaĵojn, trinkis teon kun spicoj kaj dolĉan kafon. La onklo metis sian brakon sur ŝultro de Vardan kaj flustris ion ĉe lia orelo. Vardan ruĝiĝis, kaj pro tio la onklo ripetis demandon tre mallaŭte, por ke krom Vardan neniu povis aŭdi.

- Nu, diru, nevo, ĉu vi iam estis kun virino?

- Ne, onklo Nahapet.

- Sed, ĉu vi scias kion kaj kiel devos fari je la unua edziĝnokto?

- Ne, onklo Nahapet.

- Sed ĉu via fianĉino scias?

- Mi pensas – ne.

- En tiu okazo ni poste interparolos.

Neniu kaj neniam vidis nudan postaĵon de fianĉino, eĉ nek la akvoportisto, kiu iam sukcesis vidi postaĵojn de virinoj, kiam ili iris en stalon pro natura postulo. Kaj Vardan ankaŭ ne povis imagi ion – konvenantan al realeco. Iometa ebleco scii pri postaĵo kaj aliaj aĵoj estis en diraĵoj de virinoj, kiuj antaŭ edziĝfestoj akompanis fianĉinon al saŭno. Jen kial la vizito hamamon estis tre interesa por Vardan, kaj ĉiuj neĉeestantoj tie. La viroj interŝanĝis diversajn pensojn, la virinoj – neakompanintaj fianĉinon en saŭnon, ekscitite babilaĉis interrompante unu alian. Kiam vespere la akompanintaj virinoj finfine revenis el hamamo hejmen, la atendantoj donis multegajn demandojn:

- Ĉu vi vidis ŝian postaĵon?
- Ne, la fianĉino ĉirkaŭvolvis ĝin per viŝtukoj.
- Sed la baninta virino – **hamamĝi**<sup>51</sup>, certe vidis ŝian postaĵon – helpante survolvi viŝtukojn.
- Jes, ŝi vidis.
- Kaj kion ŝi diris?
- Ŝi diris: la postaĵo estas bona, kaj la femuroj estas grasaj kaj elastaj. Ankoraŭ la hamamĝio diris, ke ŝi havos multajn infanojn.
- Sed kiel aspektis la postaĵo?
- La hamamĝio diris: “Precize, kiel ŝia vizaĝo – graso globo”.
- Sed ja tiel ne povas esti. La postaĵo havas nek okulojn, nek orelojn, nek nazon.
- Ĝuste, sed ĝi similas vizaĝon, se imagi vizaĝon sen okuloj, oreloj kaj nazo.
- Sed kion pri la buŝo?
- La postaĵo havas buŝon, sed ĝi similas fendon – de supro malsupren.
  
- Nu, kaj kiaj estas ŝiaj mamoj? Ĉu vere ili similas granatojn, aŭ similas grandajn fromaĝajn sakojn, por elpremi selakton?

---

<sup>51</sup> Turke.

- Ŝiaj mamoj similas nek granatojn, nek fromaĝajn sakojn, - respondis virinoj, vidintaj nudajn mamojn de fianĉino en hamamo. - Ŝiaj mamoj kvazaŭ estas du senplumulaj kolomboj kun ruĝaj bekoj. Kaj vi volas kredi aŭ ne, kvankam ĉi tiuj kolomboj estas senplumulaj, sed aspektas kvazaŭ jen ili forflugos.

- Do, estas tempo de edziĝfesto, - diris la viroj, - por ke la malpliĝa filo de Hakob ekstenu la mamojn, ne permesu ilin forflugi.

- Ĝuste, - diris la virinoj.

- Sed la malpliĝa filo de Hakob deziras iĝi poeto, - diris la viroj, - liaj manoj estas teneraj, ne povas firme teni.

- Necesas lerni lin - subridis la virinoj.

- Tio estas ĝuste, - konfirmis la viroj.

- La Dio kreis mondon dum ses tagoj, - diris Meddah, - kaj la sepan tagon Li nomis **ŝabat**<sup>52</sup> – ripozo. Do ne estas mirinde, ke la edziĝfesto de Vardan daŭris sep tagoj, kaj la eklezia edziĝo okazis je la sepa tago, t.e. dimanĉe, ĉar la kristanoj prokrastis sakramentan ŝabaton je la dimanĉo.

Jam antaŭtage edziĝfesto, kiam virinoj alkondukis fianĉinon en hamamon, la geparencoj de Ĥatisjanoj en siaj ĉaroj atingis vilaĝon. Kelkaj parencoj alveturis el malproksimaj urboj, kiaj estas Beogrado kaj Sarajevo, urboj iam apartenitaj al Osmana ŝtato.

Inter geparencoj estis ankaŭ Ghazar/*signifanta Lazaro* – tr./ Ĥatisjan – posedanta kafejon en Sarajevo, kun edzino kaj ses infanoj, ankaŭ kun sia bofrato Ĥaĉatur Babajan – posedanta teksaĵan uzinon en Beogrado. Mi ne povas trakalkuli por vi ĉiujn geparencojn de Ĥatisjanoj – alvenintajn el najbaraj vilaĝoj, el malgrandaj kaj grandaj urboj, iuj en azenĉaretoj, iuj en ĉaroj – junginte bovojn, ĉevalojn aŭ mulojn, ĉar la tempo estas malmulta kaj ni ambaŭ bone scias tion, - diris Meddah al la Lasta Penso. - Sufiĉas kredigi vin, ke la plej amitaj personoj de via patro estis tie.

---

<sup>52</sup> Jude.



La fabelisto daŭris:

- La kurdoj kelkajn gastojn rabis dum vojaĝo, kaj ili venis sen donacoj, iuj venis eĉ preskaŭ nude. La parencoj alveturis el Bekiro, certe, havante defendon de akompanantoj, ĉar interrilatoj de Hajkaz kaj registoj estis bonaj. Ili per granda sumo dungis 20 armilulajn zaptihojn – defendi mastron de “Hajastan”, lian edzinon kaj infanojn. La zaptihoj akompanis karavanon tra kurda landparto ĝis Jedi Suo.

- Jes, okazis tiel, - diris la fabelisto. - Ekde komenco de festo la vilaĝo estis plenita, kaj la pastro Gabriel Hamadjan estis devigita disloki kelkajn gastojn en preĝejo, ĉar pli ne estis lokoj en loĝejoj, keloj, staloj. Ili ankaŭ estis armenoj – alvenintaj el sep vilaĝoj kaj eĉ turkoj el najbara vilaĝo Kheferi Khjoj – la parencoj de turka familio en Jedi Suo. Subite en vilaĝo aperis persaj, rusaj, arabaj komercistoj, ankaŭ duonnomadaj kurdoj kaj kelkaj ĥaldoj – nestoranoj – restaĵoj de antaŭkristana sekto, vivantaj en kavernoj nemalproksime sep armenaj vilaĝoj. Subite Jedi Suo pleniĝis de neinvititaj gastoj – ciganoj, diablokultistoj, almozuloj, malriĉuloj, ĉiam ĉeestintoj dum festoj, kiam la manĝaĵojn kaj brandon neniu ŝparas. Oni diris, ke la sciigo pri edziĝfestoj de Vardan dank'al frapoj de tamburo de mjunadio disvastiĝis fore sep armenaj vilaĝoj, kaj helpe eĥo kaj vento atingis malproksimajn lokojn. Kun almozuloj venis ankaŭ la blindulo – estinta ĉe Beatecpordego – Mehmed efendio. Lin, certe, alkondukis ŝuisto Tigran.

En Jedi Suo homoj delonge kutimis diri: “Kiu havas knabinon, perdas ŝin je la edziĝfesta tago, ĉar la fianĉino lasas gepatran domon – enirante sub tegmenton de fianĉo. Tute alia afero havas knabon. Gepatroj de fianĉo gajnas knabinon”.

Sekve ne estis mirinde, ke en domo de Ĥatisjanoj estis nur ĝojeco, sed en domo de muĥtaro la gepatroj kaj parencoj laŭte ploris.

- Tie la fianĉino jam kolektas siajn aĵojn, - diris la homoj. - Nun la koro de patrino rompiĝas.

Mi dubas, - diris Meddah, - ĉu efektive malĝojis la patrino de fianĉino, tamen kial Abovjanoj tiel rapidis edzinigi sian obeziĝintan filinon? La laŭtaj krioj kaj plorado, preparinte doton kaj aliajn necesaĵojn por adiaŭi, estis deca kutimo. La gepatroj de fianĉino devos montri al tuta vilaĝo, kiel dolorinde estas perdi, amitan filinon. Por tio du **aŝughoj**<sup>53</sup> alkondukitaj de Hajkaz, el Bekiro, laŭ deziro de myĥtaro staris antaŭ domo de vilaĝestro, iam antaŭ fenestro, iam antaŭ malfermita pordo – kantante ŝercajn kantojn. *“Iru filineto mia, kaj la Dio estu kun vi”*, - kantis unu el ili – imitante voĉon de patrino de fianĉino, - *“Iru, la Dio estu kun vi, filineto mia, kaj ne forgesu nin”*.

*“Kiel mi povas forgesi vin, patrino”*, - kantis la alio – imitante paseran voĉon de fianĉino, - *“Kiel mi povas forgesi vin, patrino, ja mi nutriĝis per via dolĉa lakto”*.

*“La Dio estu kun vi, iru filino mia”*, - kantis la unua, - *“Iru filino mia – nutrita per mia dolĉa lakto”*.

Jes, estis tiel, - diris Meddah. - Hakob por la patrino pagis mil piastron. Tiun sumon la armenoj nomas **dramojit**, kiel tradicio de estimataj familioj, ankaŭ alian sumon, kiun la armenoj nomas **ojit**, t.e. doto. Antaŭtage festo Tsovinar alportis por sia bofilino poton da henaon (precipe en argila poto) – metinte sur ligna pleto, abunde ornamita per diversaj fruktoj. La henaon kaj la fruktoj simbolis diinon **Anahit**. La fianĉino – manĝinte bopatrinajn fruktojn antaŭ edziĝfestoj, kaj poste farbinte per henaon manajn kaj piedajn ungojn, estos fekundema kaj donacos multajn nepojn. Kiam Tsovinar etendis pleton al bofilino, diris: “La dika postaĵo ankoraŭ ne garantias. Vi devos manĝi ĉi tiujn fruktojn, gelin, bofilino mia. Kaj ĉiujn ungojn, kreskintajn laŭ Dia volo sur viaj manaj kaj piedaj fingroj, vi farbu per ĉi tiu ruĝa farbo. Kaj ne forgesu meti Biblion ĉe via lito, kiam mia sana filo – kun bona sango, fluanta tra liaj venoj, fekundigos vin laŭ helpo de Dio kaj nia Savanto. Ankaŭ vi pendu aĵojn sur pordo”.

---

<sup>53</sup> Orienta bardo.

Hakob buĉis pli multajn ŝafojn kaj ŝafidojn, ol estis en sia ŝafaro. Muĥtaro ankaŭ bonkore donacis animalojn de sia ŝafaro.

- Ne restis animaloj por fianĉina imposto al kurda ŝejko - diris Hakob al muĥtaro.

Siavice la muĥtaro diris:

- La diablo prenu kurdan ŝejkon kaj lian imposton.
- Ni esperu, ke la kurda ŝejko forgesis la imposton.
- Ni povas nur esperi, - diris muĥtaro.

Tra la vilaĝo disvastigis plezura kaj delikataodoro. Iam post iam la vento fumon kaj odoron de rostata viando levigis sur **ŝampuroj**<sup>54</sup> kaj tra la plataj tegmentoj forportis ĝis altaj montoj.

- Tiu ĉiodoro atingos nazon de ŝejko, - diris Hakob.
- Ni esperu, ke la vento ŝanĝos direkton, - diris muĥtaro.

Laŭ tradicio, antaŭtage eklezia edziĝo iu fama razisto devostondi fianĉajn harojn kaj razi lin. Tio signifis, ke la fianĉo serioze koncernas edziĝon kaj estas preta por virta familia vivo. Ju fama estis la razisto, des pli prudenta estis la fianĉo. Laŭ tradicio, trovi tian famkonatan raziston estis devo de la baptopatro. Tiu razisto dum razado kaj tondo devis kanti malnovajn armenajn kantojn pri edziĝfestoj, multinfanaj familioj, virteco, granda feliĉo, mono kaj ĝojeco. Ĉar la ruĝharula forĝisto – la baptopatro de Vardan, konis nenian raziston, konvenan al postuloj de Ĥatisjanoj, Hakob estis devigita komisiisian pliaĝan filon Hajkaz – alkonduki faman raziston el Bekiro, ĉar ĉiuj sciis pri tiu, ke en tia granda urbo ekzistas konataj kaj kantantaj razistoj. La mastro de “Hajastan” en sia ĉaro, vere alkondukis ne eventualan personon, sed faman raziston Vagharŝak Bahadurjan – veran edziĝfestan raziston. Li ofte vizitis riĉulojn kaj pli bone konis barbojn kaj harojn de iliaj filoj, ol iliaj patrinoj aŭ edzinoj. Tiu fama razisto jam priservis al Hajkaz, kiam li edziĝis kun aĝa

---

<sup>54</sup> Rostostango /armene/.

Varduhi. Kaj antaŭ kelkaj jaroj li propramane preparis por edziĝo tiaman armenan urbestron de Bekiro, kiu estis vidvo kaj edziĝis je dua fojo. Tio estis kuraĝeco, ĉar tiama muĥtaro de Bekiro estis kalva, kiel muĥtaro de Jedi Suo Jeprem Abovjan, havis necedemajn haregojn kaj barbon, suferis pro ventraj pufiĝoj, ruktoj, precipe dum tondo kaj razado, kiam iu tuŝis per akraj iloj lian haŭton aŭ harojn. Tamen, la fama razisto Vagharŝak Bahadurjan, kiel specialisto, ne nur tondis liajn buklojn, ankoraŭ elpinĉis blankajn harojn sur kaj ĉirkaŭ oreloj, kaj ordigis harojn de tempioj, kaj ankaŭ frotis harojn per roza oleo kaj glatigis. Unuvorte, tio estis majstra laboro, vera arta kreaĵo. Oni diris, ke la razadon li ankaŭ plenumis sukcese kaj sen difektoj. Tio estis efektiva sensacio. Tiu ĉi razisto, diris la homoj, scipovis kanti, kiel najtingalo dum sunleviĝo, kaj lia voĉo alportis feliĉon, sanon, bonan seksan kapablecon, ĉar la edziĝintoj, invitintaj Bahadurjan, ankoraŭ estas viglaj, vivplenaj, havis multajn infanojn, eĉ la tiama muĥtaro de Bekiro, malgraŭ edziĝis duan fojon, plu ne estis juna kaj jam havis dubindajn pufiĝojn kaj suferis pro ruktoj.

- Dum sep tagoj, dum sep noktoj mi nevideble vagis tra la stratoj de Jedi Suo, - diris Meddah. - Neniu min vidis, al mi ŝajnis, ke mi same kun festantoj manĝis kaj drinkis, kantis kaj dancis sur mallarĝaj vilaĝaj stratoj kaj placoj. La vetero estis tre bona, ĉar la amoza Dio nubojn – kovrintajn ĉielon, forpelis al la montoj. Do, ne estas mirinde, ke la flava suno, ĉiuvespere kaŝita de sovaĝaj kurdoj en altaj montoj – en kaproharaj nigraj tendoj, dum tuta tago afable ridetis al lando Hajastano kaj precipe, kiel ŝajnis al mi, al montbazo, kie situis la malgranda vilaĝo Jedi Suo kun sia apostola kleriganta preĝejo, bazara placo, kafejo, forĝejo, mallarĝaj polvozaĵaj stratoj, blankaj argilstukitaj kabanaj kaj domoj – konstruitaj de rokpecoj, ŝtonoj. La hela suno brilis super Jedi Suo, super ĝiaj subĉielaj plataj tegmentoj, sur kiuj vilaĝanoj dormis dum someraj varmaj noktoj kaj sur kiuj estis pendita lavita tolaĵo, sekiĝas sterko. Sur la samaj tegmentoj la virinoj metis maldikajn ladojn – ŝmiritajn kun fruktaj pulpoj kaj potojn –

plenitajn de vinbera, de morusa sukaj – sub sunaj radioj, en kiuj turniĝis muŝaj, kulaj svarmoj.

Diverskoloraj estis virinaj vestaĵoj, iliaj morakenaj delikataj plandŝuoj, brilis ornamaĵoj sur iliaj brakoj, oreloj, koloj kaj duoblaj kapvualoj.

La viroj impresis kontraŭe kun siaj grandampleksaj botoj, senmanikaj malbelaj jakoj, blankaj, brunaj, cinamkoloraj pufpantalonoj, nigraj felaj ĉapoj. “Kio okazus, - demandis mem min, se dum tiu edziĝfesto pluvus? Ĉu ili povus ĝoji sub malkovrita ĉielo? Kiel la dancantoj starus sub tegmentoj, ĉar estis tre malmulta spaco sub tiuj tegmentoj? Kiel ili dancus en tiuj mallarĝaj putrodoraj ĉambretoj? Aŭ ili restus ekstere – sub pluvo kaj en korto? Kaj kiel devis ludi la muzikistoj sub pluvo?”

Je la sesa festa tago mi laciĝite ripozis sub orienta arko de preĝejo. Apud mi sidiĝis mia videbla ombro, aŭ kiu povis esti kiel mia ombro.

- Ĉu plaĉas al vi tia vetero? - demandis mi.
- Jes, plaĉas, - respondis mia ombro.
- La kurdoj, por ke kolerigi armenojn, povus aresti la sunon.
- Sed ili tion ne farus.
- Ĝuste, - diris mi.
- Ĝuste, - diris ankaŭ mia ombro.
- Aŭ, se la amoza Dio pli ne forpelus, forigus nubojn, tiam la nuboj kovrus la sunon, kaj ĝiaj radioj ne helpus dum pluvado.
- Jes, tio eblus.
- Sed dum armenaj edziĝfestoj ne pluvus!
- Sed kial?
- Ĉar Kristo estas inter festantoj!
- De kie vi scias tion?
- Ĉiuj scias tion, - diris mi. - Kristo ĉeestas dum ĉia armena baptego, dum ĉia armena edziĝfesto.
- Ĉu la armenoj estas Lia plej amataj kristanoj?

- Jes, ŝafideto mia, - respondis mi – fabelisto. - La armenoj estas Lia plej amataj kristanoj, ĉar ĉi tie – en muzulmana lando, ili estas en granda danĝero.

- Ĉu en granda danĝero?

- Jes, en granda danĝero.

- Ĉu pro Kristo?

- Jes, pro Kristo.

- La vizaĝo de Hakob brilas pro ĝojo, - diris mi al mia propra ombro, - ĉar ĉio estas en ordo.

Ne nur la vetero estas bona, ankaŭ bona estas la muziko. Dum nenia vilaĝa edziĝfestoj mi ne vidis tiom multajn muzikistojn, - diris la ombro.

- Ĉi tiu korda muzikilo, iomete similanta mandolinon, nomiĝas **saz**<sup>55</sup>. La sazojn kaj tamburojn alportis jedisuaj junuloj, - klaris mi, - blovinstrumentistoj alvenis el najbaraj vilaĝoj, ankaŭ el Gjuklio, kaj unu el muzikistoj estis eĉ el Bekiro. Hajkaz alkondukis lin kun la razisto en sia ĉaro.

- Mi vidis ciganojn, ankoraŭ iajn figurojn en eluzitaj vestoj.

- Kaj ĉu vi vidis iliajn violonojn?

- Jes.

- Ciganoj alvenis el Rusujo, - diris mi. - Ili estas kontrabandistoj – transportantaj armenan fruktan brandon el Erivano tra la limo ĝis Vano. Iam ili alvenas same ĉi tiun landparton. La ciganoj neniam vojaĝas sen siaj violonoj. Kaj kvankam ili ne scias notojn, sed sen notoj la homajn revojn kaj amon scipovas esprimi rimede melodioj. La violono havas sian apartan lingvon; kaj kiam ili rakontas pri homaj revoj kaj aspiroj, la virinaj okuloj malseketiĝas, kaj la viraj rigardoj iĝas ekscititaj.

---

<sup>55</sup> Perse.

Kaj mi diris:

- La vento forportas edziĝfestan muzikon ĝis kurda tendaro, ĝis iliaj oreloj. Ĉar mi havas orelojn – aŭdantajn, kion la kurdoj aŭdas, do mi diras nun al vi: la kurdoj estas en kaŝejo, iliaj spionoj jam delonge agas.

- Ĉu la kurdoj atakos vilaĝon?

- Mi ne scias.

- Kaj mi povis aŭdi, kiel la patrino de kurda ŝejko turnis sin al li:

- Filo mia, ĉi tiuj armenoj tiel bruas, ke via mortinta patro turniĝas en tombo.

- Mia patro devas pace ripozi en sia tombo, - diris la ŝejko.

- Sed tiuj senkreduloj ne permesas lin ripozi.

- Vi pravas.

- Ili ree edziĝfestas. Estas edziĝfesto de malpliaĝa filo de Hakob kaj filino de kalva muĥtaro Jeprem Abovjan.

- Mi scias.

- Ĉu Hakob kaj la muĥtaro jam pagis fianĉinan imposton?

- Ne, ankoraŭ ili ne pagis.

- Do, vi devos iri kaj postuli imposton.

- Mi precize faros tion.

- Kaj, kiam?

- En sepa tago de edziĝfesto.

- Ĉu vi forprenos fianĉinon?

- Certe.

- Kaj kiu defloros ŝin?

- Unu el miaj filoj?

- Kaj kiu el ili?

- Ankoraŭ mi ne scias.

La maljunulino kapjesis. Poste ekridis kaj diris:

- Tio estos edifo. En sep vilaĝoj oni devos kompreni: **“Ve al armeno – nepagitan fianĉinan imposton!”**

- Hakob ŝparis nek fruktan brandon, nek vinon, - diris mi al mia ombro. - Ĉu vi vidis? Eĉ la turkaj gastoj tre multe drinkis.

- Kiel ne? - diris la ombro. - En Korano nenio estas skribita pri armena brando kaj vino. Sekve, kial ne devas muzulmanoj drinki?

Ni ankoraŭ iomete interparolis, mi kaj mia ombro, poste mia fabela voĉo iomete dormetis, sed baldaŭ vekigis kaj frotetis siajn nerealajn okulojn. En la sesa tago de festo, tagmeze, mi – la fabelisto, deflugis de preĝeja arko – akompanite de mia ombro, flugis super vilaĝo, finfine alterigis sur bazara placo, antaŭ kafejo, kie la forĝisto ĵus drinkis por sano, bonvivo de sia baptofilo.

- Nu, ni devas iri, - diris forĝisto, - ĉar baldaŭ antaŭ vilaĝanoj necesas razi kaj tondi harojn de Vardan.

- Ĉu tuj sur bazara placo necesas razi kaj tondi la harojn? - demandis iu.

- Ne, antaŭ odao de Ĥatisjanoj, ekstere, - diris la forĝisto.

- Tiam ni devas rapidi, por ke havi lokon – stari proksime.

Kaj mi sekvis viran amason. Malantaŭ ni venis virinoj. Ĉiuj deziris ĉeesti, vidi la ceremonion kaj admiri, kiel laboras la famkonata razisto Vagharŝak Bahadurjan, pri kiu oni jam aŭdis multon.

Hakob metis du sakojn da greno antaŭ pordo, sur ili sternis dikan tapiŝon, kie sidis Vardan, kiel la juna reĝo sur sia trono. La granda amaso ĉirkaŭis lin. Ĉiuj babilis. Iam post iam oni demandis: “Sed kie estas la razisto? Kie estas Vagharŝak Bahadurjan? Ĉu Vagharŝak efendio ...?”

Mia ombro kaj mi pasis tra amaso, sidiĝis apud Vardan. Ni eksentis, ke Vardan estas maltrankvila kaj iomete konfuzita, ĉar neniam sentis tian honoron kaj atenton. Pro modesto li neniam pensis, ke mem unu tagon estos en centro, ĉirkaŭ kiu turniĝos ĉiuj. Vardan per rigardo serĉis fianĉinon, kiun ne povis vidi. Kaj blindiĝite



de tagmeza lumozsuno, li nur vidis diverskolorajn vestaĵojn de festantoj – ĉirkaŭintaj sin, spiris odoron de ŝvito de drinkuloj – drinkintaj brandon, vinon kaj, verŝajne, pensis: “Baldaŭ venos la razisto – bone tondi kaj ordigi miajn harojn – antaŭe edziĝa lito. Morgaŭ okazos kronado en preĝejo kaj poste, jes, poste, mi devos deflori mian fianĉinon, kaj pendi littukon kun sangaj makuloj sur pordo, por ke ĉiu vidu – ŝi estis virgulino, mi estas la unua viro en ŝia vivo, kaj ŝia virguleco estas mia honoro”.

- Ni – armenoj, la honoron nomas **pativ**, ĝi estas kara ol ĉio, - unu tagon diris li al turko Gjog-gjog, - la honoro estas ĉio, kaj la honoro de fianĉino samtempe estas honoro de fianĉo.

Kaj la turko Gjog-gjog diris:

- Por ni – turkoj, same.

Tiel ni – mia ombro kaj mi, nevideble sidiĝis apud Vardan. Kiam la razisto finfine venis kaj komencis tondi liajn harojn, ni kuris kaj staris ĉe unu parenĉino de Vardan.

- Kaj kie estas la fianĉino? - demandis mia ombro.

Mi respondis:

- Fianĉinon ankoraŭ kaŝis ŝiaj parenĉoj. Sed ŝi certe baldaŭ alvenos, ĉar la pastro devos beni edziĝajn vestaĵojn de fianĉino kaj de fianĉo. La preĝeja kronado okazos morgaŭ.

- Sekve ĉu la pastro hodiaŭ benos vestaĵojn?

- Certe, - diris mi, - hodiaŭ, ĉe la sakramenta toniro.

- Ĉu tuj poste razado?

- Tuj poste tio, - diris mi.

- Ĉu vi vidis ciganinojn? - demandis la ombro. - Unu el ili anticipas sorĉis razistan tondilon ankaŭ razilon.

- Ŝi kraĉis sur tondilo kaj razilo, sed tio estas signo de feliĉo, - diris mi.

- Ĉu de feliĉo?

- De feliĉo kaj de bonaj agrablaj pensoj, - respondis mi.

- La ciganoj ĉion scias, - diris mi. - Necesas demandi ilin, kiam komencos la **mets depk**.

- Ĉu la granda masakro?

- Jes.

- Aŭ demandi ilin, ĉu la kurdoj forŝtelos la fianĉinon?

- Ja la kurdoj tion faras en sepa tago de edziĝfestoj, post preĝeja kronado, se la fianĉina imposto ne estas pagita.

- Kaj kial la kurdoj ne forŝtelas fianĉinon antaŭe kronado?

- Ĉar la defloreco estas pli influa kaj malhonoriga por fianĉo, kiam la fianĉino jam ricevis edziĝan ringon kaj kun la ringo ankaŭ fianĉan familnomon.

- Do, ĉu la kurdoj forŝtelos la fianĉinon?

- Verŝajne ili forŝtelos, - diris mi. - Por ili tio estas afero de honoro. Sed la ŝejko havas aliajn aferojn kaj li eble forgesis edziĝfeston. Ĉio eblas.

- Nu, ni nur esperu, - diris mia ombro.

- Jes, guste tiel, - diris mi.

Poste mi parolis pri ciganoj:

- Ili kvin tagojn daŭre dormas ekstere – sub sakramenta arbo, ĉar ili pensas, tio estas sorĉoza.

- Ĉu kvin noktojn senĉese?

- Jes. Hodiaŭ estas la sesa tago.

Nun ni observas la raziston – sperte ordigantan fianĉan kapon. Baldaŭ li komencos razi. La razisto intence laboris malrapide. Iam post iam li tondilon metis flanken por ke kolekti drinkmonojn – laŭ kutimo donitajn de gastoj. La kupraj, arĝentaj kaj oraj moneroj ŝutiĝis kiel pluvego. Neniu muskolo de razisto moviĝis – kolektante drinkmonojn. Li nek dankis, nek parolis.

Nur kiam la razisto komencis razi kaj sapumi vizaĝon de Vardan per bonodora franca sapo, li ekkantis, kaj lia voĉo vere similis voĉon de ĉarma birdokantado dum sunleviĝo. Nun la muzikistoj ankaŭ prenis siajn muzikilojn kaj akompanis raziston.

- Sed kie estas la ciganoj?
- Ili estas ĉi tie, safideto mia, - respondis mi.
- Kial ili ne ludas siajn violonojn?
- Ili ankoraŭ atendas, ŝafideto mia, - diris mi.

Kiam la rusujaj ciganoj ekludis violonojn, la aliaj ĉiuj muzikiloj silentis, mallaŭtiĝis ankaŭ la voĉo de razisto. La ploretoj de violonoj levis kaj portis min kaj mian ombron. Ŝajnis, ke kun sorĉaj sonoj de violonoj kaj kun ni leviĝas en aeron la tuta vilaĝo – la bazara placo, polvokovritaj stratoj, kliniĝitaj domoj kaj seksterko – teceko, sur tegmentoj. Kaj inter ni estis Kristo, ĉar li ĉeestis dum tuta tempo. Ni leviĝis en ĉielon, ree malleviĝis. Sed kiam subite la violonoj silentis, ni ĉiuj denove estis sur siaj lokoj.

- Mi vidas en amaso homojn, - diris mia ombro, - pri kiuj nedelonge la pastro Gabriel Hamadjan diris, ke ili estas el diablokultista sekto. La viroj aspektas sovaĝe, vestis turbanojn, kaj la virinoj – kurdinajn diverskolorajn vestaĵojn.

- Mi ankaŭ vidas ilin.
- Nokte ili dormas sur tegmento de forĝejo.
- Nu, kie ili povas dormi? - diris mi, - kiam ĉiuj lokoj estas okupitaj.

- Ĉu la pastro permesus ilin eniri en preĝejon?

- Mi ne scias.

- Mi timas diablokultistojn, - diris mia ombro.

- Ili estas nedomaĝaj homoj, - trankviligis mi.

- Ĉu vere ili adoras diablon?

- Ne, ili adoras Dion, - diris mi, - sed kredas ankaŭ, ke la lukto

inter bono kaj malbono ne estas finita?

- Ĉu ili preĝas al Dio?

- Ne, ili ne preĝas al Dio, - diris mi, - ĉar pensas, ke la Dio estas tro bonkora kaj ne povas puni. Ĉar la Dio ne punas, ne bezonas trankviligi Lin.

- Sed al kiu ili preĝas kaj kiun petas?

- Al diablo. Ĉar li estas malica kaj diablokultistoj terure timas lin.

- Ankoraŭ ili adoras Melek Thaŭz, - diris mi. - Tio estas bronza birdo. Nur sep tiaj birdoj ekzistas en ĉi lando.

La **khavaloj** tiun ĉi birdon portas el unu vilaĝo al alia vilaĝo, ĉar Melek Thaŭz karnas Dian animon sur tero.

- Sed kiuj estas la khavaloj?

- Ili estas diablokultistaj eklezianoj.

Mi diris al mia ombro:

- La vivo de tiuj khavaloj estas malfacila. Ili vere turmentiĝas, ĉar ne nur kuntrenas tiun bronzan pezan birdon el unu vilaĝo al alia, ankoraŭ devas kuŝi kun edzinoj de siaj adeptoj, ĉar por ĉiu diablokultisto estas honoro, kiam sia edzino, dormante kun khavalo, fekundiĝas de Dia animo.

Mi diris al mia ombro:

- La diablokultistoj baptas siajn infanojn, kiel la kristanoj. Sed ili knabojn ankaŭ cirkumcidas, kiel la judoj kaj la muzulmanoj. Ili estas strangaj homoj.

- Al mi ŝajnas, ke ili estas timigitaj.

- Pri kio temas? - demandis mi.

- Nu, evidente, - diris mia ombro, - la diablokultistoj volas havi bonajn interrilatojn kun tri religioj kaj solidaras nek kun kristana Dio, nek kun juda Dio, nek kun muzulmana Dio.

- Tio povas esti, ŝafideto mia.

- Kiel kondukas la sultano rilate tiuj turkaj ŝtatanoj?

- Nun bone, - diris mi. - Dum lastaj jaroj la sultano persekutis ilin kaj publike mortigis virojn – sidigante ilin sur palisoj. Sed nun sultano ilin ne maltrankviligas.

Ni – mia ombro kaj mi, longtempe interparolis pri diversaj aĵoj kaj ne ekrigardis, ke la fama razisto finis sian laboron. Ni ambaŭ sole sidiĝas apud la grenaj sakoj – kovritaj per tapiŝo.

- Kaj kie estas la homoj? - demandis mia ombro. - Kaj kie estas la fama razisto? Kaj krom ĉio kie estas Vardan? Li ĵus sidiĝis sur grenaj sakoj, kiel reĝo.

- La familianoj alkondukis Vardan en odaon, - diris mi, - ĉar dum ĉi tiu tempo alvenis la fianĉino – kun amaso de siaj geparencoj kaj certe ankaŭ kun la **gnkhamajr**<sup>56</sup> – baptopatrino. Alvenis same la pastro.

- Ĉu la pastro nun benos vestaĵojn?

- Jes, - diris mi.

- Mi ekrigardis, - diris mia ombro, - kiam la razisto tondis harojn de Vardan, sapumis lian vizaĝon, razis kaj frotis per bonodoraj akvoj, kiam li sidiĝis sur grenaj sakoj – kovritaj per tapiŝo, mi ekrigardis ankaŭ, ke li estis vestinta la plej malnovajn vestaĵojn.

- Tio havas kaŭzon, - diris mi. - La fianĉino, ĵus alkondukita fianĉan odaon, same estis vestinta tre malnovajn vestaĵojn.

- Kial?

- Tia estas la tradicio, - diris mi. - Nun Vardan sidiĝas ĉe toniro, kaj malantaŭ li staras la fianĉino. Ŝi silentas, ne rajtas prononci iun vorton. Baldaŭ alvenos Boghos – alportante du volvaĵojn. La volvaĵoj estas pakitaj per grandaj tukoj – havantan sekreton.

- Pri kiu sekreto temas?

- En unua volvaĵo estas pakitaj fianĉaj vestaĵoj, en dua – fianĉinaj – kun nova vualo. La pastro benos novajn vestaĵojn kaj vualon.

---

<sup>56</sup> Armene.

Antaŭe li preĝos, poste, prenante dekstrajn manojn de gefianĉoj kaj kuniĝos. Poste la fianĉo kaj la fianĉino iros sin bani: Vardan – en stalo de Ĥatisjanoj, fianĉino – en stalo de myĥtaro. Poste ili vestos siajn novajn vestaĵojn kaj tiel, nur tiel, ili prezentiĝos al festantoj.

Kaj mi diris al mia ombro:

- Nun mi povas sciigi vin pri sekreto. La fianĉinaj vestaĵoj estas ruĝaj: ŝia edziĝfesta vesto estas ruĝa, ruĝaj estas same la supera kaj la suba vualoj. La suba vualo kaŝas la buŝon kaj la mentonon. Ankaŭ ruĝaj estas ŝiaj pantofloj. Mi konsideras, ke la marokenaj pantofloj estas nekredeble delikataj.

- Kial estas nekredebla?

- Ke tiu ĉi luksaj pantofloj kapablas elteni premon de la graso – kolektitan de fianĉino dum obezigo.

- Kaj ĉu Vardan?

- Vardan vestos nek longan kaj larĝan pufpantalanon, - diris mi, - nek botojn, nek senmanikan jaketon, nek kutiman felan ĉapon.

- Sed kion li vestos?

- Modernajn vestaĵojn – aĉetitajn por li de pliaĝa frato Hajkaz en Bekiro: istanbultan jakon, ruĝan kravaton el Vano – armena urbo kun citadeloj kaj ĝardenoj, botetojn el Erzrumo, kaj veran bekiran feson – ruĝan, firman.

- Li aspektos kiel dando.

- Li ne estas dando.

Tsovinar kaj Hamest, same la filinoj de Tsovinar kun sofraoj – plenitaj de dolĉaĵoj, paŝadis tien kaj reen inter gastoj kaj aspektis kiel ofendiĝitoj, se iu diris: “Ne, ne, mia ventro estas plena”. Kaj kiam la virinoj tiel, jen tiel, paŝadis kun plenaj sofraoj tien kaj reen, al ni ambaŭ – al mi kaj al mia ombro ŝajnis, ke ni ankaŭ gustumis dolĉaĵojn, antaŭ ĉio paŝlavaon – bakitan de Tsovinar. Ankoraŭ ŝajnis, ke ni proponis avon de Vardan verŝi fruktan brandon kaj vinon por ni kaj ni estis terure ebriaj. Verŝajne tiel ebriaj, ke ni baldaŭ dormis. Kiam ni vekiĝis, la sesa tago jam finiĝis.

Kaj jam estis la sepa tago – la tago de preĝeja kronado. Dum la ceremonio ni – mi kaj mia ombro, kiel gardistoj staris antaŭ vilaĝa malgranda gregoriana preĝejo.

- Se la kurdoj alvenos forŝteli fianĉinon, ni devos ion fari, - diris mia ombro.

- Jes, - diris mi – la fabelisto.

- Sed kion? - demandis mia ombro. - Ja ni reale ne ekzistas: vi – la fabelisto, kaj mi – via ombro.

- Vi vere pravas, - diris mi, - aŭ ne pravas. Tamen verŝajne ni ekzistas, sed ekzistas alimaniere.

- Kaj kion ni povas fari ĉi tie?

- Daŭrigi gardi, - diris mi, - kaj daŭrigi priskribi eventojn por mondo.

- Ĉu por Tovma Ĥatisjan?

- Ĝuste tiel.

- Bone, - konsentis mia ombro.

Kaj precize en momento, kiam la ombro diris tion, ni ambaŭ fikse rigardis montan vojeton – kondukantan tra la tegmento de Ĥatisjanoj al montoj ĝis nigraj tendoj de kurda ŝejko Sulejman.

Unu tagon ĉevalo de kurda rajdanto stumblis sur vojeto – pasanta tra la tegmento de Hakob, - diris mi al mia ombro. - La rajdanto kaj la ĉevalo pasis tra la tegmento kaj alteriĝis apud la toniro.

- Mi scias tion historion, - diris mia ombro.

- Kiam la kurdoj alvenos deflori fianĉinon, - diris mi, - ni petos amozan Dion – faligi ĉiujn tra la tegmento. Eble ili ĉiuj rompigos siajn kolojn.

- Aŭ rekte falus en toniron, - diris mia ombro.

Dume ni rigardis malproksimen kaj interparolis, tra la duonfermata pordo de preĝejo ni aŭskultis liturgian kantadon de pastro kaj de komunumo. Inter multegaj voĉoj aŭdiĝis ĝoja plorĝemo

de Tsovinar. Ni aŭdis ankaŭ malĝojan plorĝemon de edzino de vilaĝestro, kiu perdis sian filinon.

- Nun la fianĉo kaj la fianĉino staras kontraŭe, - diris mi al mia ombro. - Baldaŭ la pastro tenos iliajn kapojn kaj premos iliajn fruntojn kaj poste, laŭ tradicio, li ĉirkaŭvolvos aparte iliajn kapojn per edziĝaj perloornamitaj amuletoj, kiujn ili devos havi sur siajn kapojn tutan semajnon. Tiu ĉi amuleto nomiĝas **narot**<sup>57</sup>. Ĝi estas kontraŭ malicaj fantomoj kaj estas pli influaj ol la ajlo aŭ surporda huffero.

- Por kio estas tiuj krucetoj? - demandis mia ombro.

- Ĉiuj ĉeestantoj havas lignofaritajn malgrandajn krucojn, - diris mi. - Nur la forĝisto – babtopatro de Vardan, havas grandan krucon, kaj li tiun grandan krucon tenas super kapojn de novedziĝintoj, kiel defendeco.

- Sed kie estas la edziĝaj ringoj?

- La pastro prezentos ringojn – metitajn sur telero, - diris mi. – Tiam Tsovinar, ankaŭ la edzino de vilaĝestro pli laŭte plorĝemos. La manoj de juna paro ektramos, ĉar la metado de ringoj estas la fina ceremonio. Nur la morto povas disigi ilin.

- Ĉu la ringofingroj ankaŭ ektramos?

- Ili ektramos precipe, - ŝafideto mia.

Dume ni – mi kaj mia ombro, staris kaj rigardis vojon, la ceremonio en preĝejo proksimiĝis al fino. Larĝe malfermiĝis la pordoj kaj la rideta novedziĝinta paro eliris eksteren. Ni vidis, kiel la pliaĝa frato de Vardan – Hajkaz, metis teleron antaŭ piedoj novedziĝinta paro – haltinta ĉe la sojlo de preĝejo, kaj kiel Vardan rompis la teleron. Ni aŭdis ankaŭ, kiel kelkaj ĉeestantoj plorĝemis, alioj ridis. Precipe laŭte ridis Hakob. La avo same ridis kaj per sia kvikema voĉo ripetis: “La telero estas rompita, la longa vivo estas donita”.

Poste ni ambaŭ – mi kaj mia ombro, deflugis.

---

<sup>57</sup> Armene.



Sed baldaŭ ni revenis akompani edziĝfestan ĝojan procesion tra la vilaĝo.

- Mi malfacile sin detenis, ĉar deziris pinĉi postaĵon de fianĉino, - diris Meddah, - tian elastan, junan postaĵon ne eblas vidi ĉiutage. Kiel plenita vina felsako, sur mallongetaj piedoj, kun gebaptopatroj kaj geparencoj paŝis la grasulita fianĉino tra la mallarĝaj stratoj. Ĉiujn admirigis edziĝfesta ruĝa kara vesto – manbrodita per ora fadeno, la virina malgranda ruĝa feso kun blanka kaj ruĝa vualoj, oraj ornamaĵoj kaj la perloornamita kolĉeno – kun arĝentaj moneroj inter perloj. La virinoj sekvis viran procesion. Kiam la novedziĝintoj eliris el preĝejo, la muzikistoj ree ekludis. La diablokultistinoj, muzulmaninoj kaj ciganinoj laŭte ekkantis **talil** – ciganajn modulaĵojn, kiuj trapenetris mjelon de kristanoj. Precipe klopodis la diablokultistinoj – starintaj sur forĝeja tegmento, de kie ili preferis sekvi la procesion. Ŝajnis, ke ili samtempe deziris trankviligi diablon. La edziĝfesta procesio ofte haltis antaŭ domoj por ŝerci kun maljunulinoj – sidintaj antaŭ pordoj, aŭ akcepti donacojn. Kelkaj maljunilinoj ŝmiris farungluon sur oraj, arĝentaj, kupraj moneroj, por ke glui ilin sur frunto de fianĉino. Ŝi permesis, dankis, poste deŝiris gluitajn donacojn, transdonis al baptopatrino, kiu kaŝis monerojn malantaŭ antaŭtuko. Jes, tiu estis vera, granda festo. La tago jam vesperis, kiam la procesio finfine atingis domon de Hakob.

Pasintjare Hakob malantaŭ stalo konstruis ĉambreton, kie devos vivi Vardan kun sia juna edzino. La ĉambreto eĉ havis propran toniron kaj ankaŭ fenestron, kio estis neordinara por Jedi Suo, sed Hakob diris: “Ili havu fenestron, kiel la riĉuloj en urboj”. Ankoraŭ li diris: “En Frankistano eĉ malriĉuloj havas fenestrojn en siaj domoj. Kiam mia filo matene vekigis, laŭ volo de Dio, li alproksimiĝos al fenestro – spiri freŝan aeron kaj scii, kia estas la vetero?”.

La edziĝfesta procesio finfine atingis domon de Hakob. Antaŭ doma porĝedo estis kuŝita ŝafideto kun ligitaj piedoj. Kaj la pliaĝa frato de Vardan estis starinta ĉe la ŝafideto, kun tranĉilo en mano.

Precize tiamaniere okazis la edziĝfesto de Hakob. Kaj tiam lia patro diris al li: “Jes, tia estis same la edziĝfesto de mia kaj de via patrino. Tiel okazis ankaŭ edziĝfestoj iliaj gepatroj kaj de gepatroj de iliaj gepatroj. Kaj efektive, tiel estis ĉiam. Kaj kial estus aliamaniere?”

La festantoj ŝutis grenerojn sur la kapoj de novelzintoj, kaj kiam Vardan prenis tranĉilon de Hajkaz, kelkaj homoj aplaŭdis. Vardan per maldekstra mano karesis la kolon de ŝafideto, tuj kie li devos rapide tranĉi per tranĉilo. Vardan kraĉis sur tranĉilon kaj tranĉis kolon de ŝafideto. Kiam la sango strifluis al pordo, Vardan desaltis, forportis skuiĝantan ŝafideton de pordo. Li montran fingron ŝovis en vundon de oferdona ŝafideto kaj ŝmiris sangon sur edzina kaj sia fruntoj. Poste li eligis glavon, kaŝitan sub jako, kaj kiel simbolo de defendo de sia juna edzino, levigis ĝin super ŝia kapo. Nur tiam ŝi kun defendo de ĉi tiu glavo, trapaŝis sojlon de nova loĝejo. La muzikistoj, ĉesigintaj ludon je kelkaj sekundoj, nun denove ekludis pli laŭte kaj ĝoje. La homoj laŭte babiladis, ritme aplaŭdis. Kaj la talilo pli laŭtiĝis, ĉar diablokultistinoj malleviĝis de forĝeja tegmento kaj vibrante voĉojn kuris al domo de Hakob. Ilin sekvis du ciganinoj – imitante diablokultistinojn. Baldaŭ anhelante alkuris la vilaĝestro: li alportis sakramentan fajron el propra toniro, transdonis al sia filino, kaj ŝi ree tra la pordo eniris loĝejon. Kaj tiel la bofilino prenis kaserolon kun gepatra sakramenta fajro, ekploris, kiam la patro etendis kaserolon kun fajro. Ŝi kisis patran manon kaj plorante paŝis al edza ĉambro. Tie, en nova toniro, ŝi bruligis sian propran fajron.

Vardan kaj lia juna edzino jam tri foje turniĝis ĉirkaŭ la toniro, kiam Hakob kaj Tsovinar eniris novan ĉambron. Sur brako de Tsovinar estis sternita blanka littuko.

- Via patrino alportis por vi blankan littukon, - diris Hakob al

Vardan, - nun ni vin lasos sole, por ke vi plenumi vian viran devon. Vi longe ne pensu, faru rapide, ĉar la homoj malpacience atendas antaŭ nia domo.

- Kion ili atendas?

- Littukon kun sangaj makuloj, kiun vi poste pendos sur via pordo. Ĉiu homo devos vidi, ke via edzino estis virgulino, - diris Hakob.

- Ĉu tion mi nun devos plenumi?

- Jes, vi nun devos plenumi, - diris Hakob, - ĉar kiam mallumiĝos la homoj ne vidos sangon.

- Ĉu ne eblas atendi ĝis mateno?

- Ne, - diris Hakob.

- Por la Dio, ne malrapidu, filo mia, - diris Tsovinar, - kaj ne malhonorigu nian familion.

- Via patrino pravas, - diris Hakob, - nun faru, ĉar morgaŭ matene, kiam kokerikos kokoj, jam estos malfrue.

Sed Vardan estis ege emociita pro penso, ke li nun devos deflori edzinon. Pro tio li tenis ŝian manon kaj ankaŭ foje ŝin kondukis al domo de Ĥatisjanoj, poste por gajni tempon, alkondukis malproksimen – ĝis bazara placo. “Poste, mi tion faros poste”, - pensis li.

Hakob kaj Tsovinar pravis, ĉar estas aferoj neprokrasteblaj ĝis sekvonta tago, kiam kokerikos la kokoj. Kiam Vardan kaj lia edzino revenis el bazara placo, cent armilulaj kurdejoj rajdantoj rapidege invadis en vilaĝon. Iliaj bruoj, krioj estis pli akrosona ol virina talilo. La kurdejoj pafis supren, dispelis homojn. Ili rajdis al domo de Hakob, poste al bazara placo, ree malantaŭen. Subite ili ekvidis Vardan kaj lian junan edzinon. La kurdejoj ĉirkaŭis ilin, frapis kapon de Vardan, kaptis kiantan edzinon, ĵetis sur ĉevalon kaj kun ŝi rapidege rajdis el vilaĝo.

## 11.

En domo de vilaĝestro kolektiĝis vilaĝaj maljunuloj, ankaŭ kelkaj homoj de familioj de novedziĝintoj, la gebaptopatroj. Tie estis ankaŭ la pastro. La viroj, sidinte ĉirkaŭ toniro en selamliko, fumis.

- Kial vi ne pagis fianĉinan imposton? - demandis la ruĝharula forĝisto.

- Mi ne scias, - diris Hakob.

- Mi ankaŭ ne scias, - diris la vilaĝestro.

- Verŝajne vi pensis, ke la kurda ŝejko forgesus pri edziĝfesto, - diris la pastro.

- Jes, ni pensis tiel, - respondis muĥtaro.

- La kurdoj ne defloros fianĉinon, se ni senprokraste pagos la imposton, - diris Hakob. - Nur estas malfacilaĵo: la elaĉeto estos pli granda ol duono de doto.

- Jes, la fianĉina imposto estus pli malgranda, diris la pastro.

- Ni devos seli niajn bonegajn ĉevalojn, - diris la vilaĝestro, - kuregi post kurdoj. Se ni atingos ilin kaj proponos bonan elaĉeton, ni povos liberigi mian filinon.

- Ŝi jam estos deflorita, ĝis ni atingos, - diris Hakob.

- Tio povas esti, - diris la muĥtaro.

- Kaj tiam mia filo malhonorigĝos!

- Ŝajnas, jes, - diris la vilaĝestro.

Kaj la fabelisto diris:

- **Estas, ne estas, estas** tri rajdantoj. Ili selis la bonegajn ĉevalojn de vilaĝo kaj kuregis post kurdoj. Unu el rajdantoj estis bofrato de Vardan – Pesak, la aliulo – frato de Vardan – Tigran, kaj la tria – filo de forĝisto – Avetik.

Kiam la rajdantoj revenis vilaĝon, preskaŭ vesperiĝis.

- Ĉu vi atingis kurdojn? – demandis la muĥtaro.

- Jes, - diris Pesak, - ili atendis nin en montpasejo, ĉar sciis, ke ni

proponos elaĉeton.

- Sed ĉu mia filino ankoraŭ estas virgulino?
- Ŝi estas virgulino.
- Kiel vi sciis pri tio?
- La kurdoj postulas dudek ŝafojn por deflorita knabino.
- Sed mi deziras mian knabinon nedefloritan.
- En tio okazo ili postulas cent ŝafojn.
- Cent ŝafojn estas tro multe!
- Kie ni trovos cent ŝafojn?
- En tiu okazo donu nur dudek, muĥtaro bejo, dudek ŝafojn por vivo de via filino.

- Ni povas nur dudek, se Hakob certe donas dek ŝafojn. Mi povas doni nur dek.

- Ĝuste, - diris la pastro, - dudek ŝafojn el du familioj. Tio ne bankrotigos vin.

- Vi pravas, - diris la vilaĝestro, - sed nenion valoros vivo de mia filino, se ŝi ne estus virgulino. La socio ne agnoskos ŝiajn infanojn kaj infanojn de ŝiaj infanoj same. Kaj mia bofilo ... kiel li daŭros vivi? Li estos mokinda objekto por tuta vilaĝo. Kiu parolos kun mia filino? La maljunulinoj kraĉos sur ŝian vizaĝon, kaj junuloj eĉ ne rigardos ŝin. Kaj mi..., ĉu mi povos resti kiel vilaĝestro? Tio malhonoriĝo ĉiam estos kun niaj familianoj.

- Vi pravas, myĥtaro bejo, - diris la pastro. - Donu al ili 50 ŝafojn, la aliajn 50 ŝafojn donos Hakob.

- Sed kio restos de niaj ŝafaroj. - diris la myĥtaro.
- Jes. Kio restos de niaj ŝafaroj? - ripetis Hakob.

Vespere la viroj de du familioj pelis al kurda montlando 100 ŝafojn. La sola virino, iranta kun ili, estis kurdino Bjulbjul. Ŝi sidiĝis sur sia sennoma azeno kaj devigis hasti sian azenon, virojn kaj animalojn.

- Hej, Bjulbjul, - diris Hakob, - kial vi volas ĉeesti ĉie?
- Sed kiel mi ne ĉeestus? - diris Bjulbjul.
- Jes, vere, kiel vi ne ĉeestu? - diris Hakob.

- Kaj kial mi ne ĉeestus? - diris Bjulbjul. - Ĉu eble vi mem volas kontroli virgulecon de via bofilino?

- Ĉu vi volas kontroli? - demandis Hakob.

- Sed alie kiu? - respondis Bjulbjul. - Ĉu eble vi volas doni 100 ŝafojn al kurdoj, anticipe nesciinte, ĉu ŝi ankoraŭ estas virgulino aŭ ne?

- Efektive mi ne volas, - diris Hakob.

- Se ŝi plu ne estas virgulino, - diris Bjulbjul, - doni 100 ŝafojn estos tro multe.

- Jes, - konfirmis Hakob.

- Se ŝi jam ne estas virgulino, vi pagos nur 20 ŝafojn, - diris Bjulbjul.

Nur malfrue nokte la viroj, Bjulbjul kun bofilino revenis hejmen. Vardan kaj aliaj Ĥatisjanoj staris inter pordoj, kiam la stranga mistera procesio alvenis. La oleaj lampoj ankoraŭ brilis en vilaĝo.

- Hej, Bjulbjul, - alvokis Vardan.

- Jes, mia eta bofilo, - diris Bjulbjul.

- Nu, kion, Bjulbjul?

- Nenion, - respondis Bjulbjul.

Kvankam estis malfrue, sed la vilaĝanoj ne estis dormitaj. Eĉ ne dormis gastoj sur tegmentoj. Feliĉe la turka tamburisto – la surda mjunadio kun kripla piedo, ankoraŭ estis inter edziĝfestantoj.

- Prenu vian tamburon, - diris Hakob al li, - kaj sciigu, ke mia bofilino estas virgulino kaj la pativo(honoro) de du familioj estas savita.

- Ĉu pativo? - demandis la turko.

- Jes, pativo, - respondis Hakob.

- Ĉu ankaŭ ion mi devos diri?

- Jes, - diris Hakob. - Diru al ĉiuj, ke morgaŭ frumatene, tuj post unua kokeriko de koko, ili vidos littukon kun sangomakuloj – penditan sur pordo de mia domo.

- Ĉu vi pensas, ke morgaŭ la koko kokerikos?
- La koko ĉiam kokerikas frumatene, - diris Hakob. - Ĝi kokerikis, kiam la Dio kreis unuan tagon.
- Do, ĉu la koko ekzistis antaŭe unua tago de kreado? – demandis la mjunadio.
- Ĝuste tiel, - diris Hakob.

Arpine estis tiel laca kaj timigita, ke tuj dormis en edza lito, ĝis lia edzo povis fari tion, kio estis lia sakramenta devo. Sed Vardan mem nenion povis fari, ĉar estis tre ekscitita, kolerinta, lia kapo forte doloris pro frapo de pafilo. Sekve li kuŝis ĉe sia edzino kaj mem ankaŭ tuj dormis.

Vardan vekigis nur foje, meznokte. “Kion pensos la homoj, se la littuko ne estos sangomakuloza?” - pensis li. Vardan palpis edzinan dikan postajon. “Mi devas vekigi ŝin” - pensis li, sed ne kuraĝis.

Vardan provis prezenti sin, kiom da pecojn da paŭlavao manĝis ŝi, por ke akumuli tiom da grason? “Ĉiutage 40 pecojn, - pensis li, - kaj tiel dum tuta jaro”. Li provis kalkuli, kiom da pecojn dum unu jaro, ĉar li estis poeto, sed ne kontisto, nenian rezulton ricevis. Li provis kalkuli multegajn pecojn da paŭlavao, kiel oni kalkulas ŝafojn – po paroj kaj pro tio li dormis – neirante malproksimen. En sia sonĝo li vidis tutan monton de kukajtoj.

Vi imagu, kia bruo, kia plorego ekkomencis matene Tsovinar, kiam sciis, ke la littuko ne estas sangomakuloza. Hakob estis apud ŝi.

- La homoj ekpensos, ke anstataŭ mia filo tion la kurdoj faris, - diris Hakob.

- Ni malhonorigis! - kriis Tsovinar.
- Ni malhonorigis, - ripetis Hakob.
- Kio okazis? - demandis Hakob sian filon. - Ĉu la bofilino estas virgulino aŭ ne?
- Ŝi estas virgulino.
- Ĉu vi povas pruvi? - demandis Hakob.

- Ne, - diris Vardan.

- Ĉu mi kun vivo donis al vi viran sanan membron? - demandis Hakob.

- Vi donis, patro, - diris Vardan.

- Sed kial la littuko ne estas sangula.

- Ĉar ŝi tuj dormis, - respondis Vardan.

- Ĉu vi estas viro, se ne kuraĝis vekti vian edzinon?

- Mi ne scias, - diris Vardan.

Kiam la koko kokerikis sep foje, venis Bjulbjul, frapis pordon. Kvazaŭ ŝi sciis, ke ĉi tie oni bezonas bonan konsilon, kaj helpon.

- La littuko estas blanka, kiel la neĝo, - diris Hakob. - Kion pensos la homoj pri ni?

- Ĉu via filo ne havas viran tubon?

- Kiel ne? Li havas, - diris Hakob. - Ja vi helpis Vardan naskiĝi, tiam, en stalo? Ĉu vi ne memoras?

- Mi memoras, Hakob.

- Pro tio mi supozas, ke vi ekpensos ion – savi lian honoron.

- Jes, eble mi cerbumos ion, Hakob. Ĉiam mi ion trovas.

- Ĉu vi ion trovos?

- Atendu, mi bone pensu, Hakob.

Bjulbjul pensis kaj diris al Hakob:

- Nun vi buĉu kokon Abdul-hamid. Kaj ĝian sangon ŝmiru sur littuko. Poste la blankan littukon kun ruĝaj makuloj vi pendu sur via pordo.

- Ĉu mi faru tiel?

- Jes, Hakob.

- Sed kion ekpensos la homoj?

- La homoj ĝojos, - diris Bjulbjul, - kaj ili diros: "La kurdoj vere ne defloris ŝin. Tion faris Vardan. Jen la pruvo – la littuko estas farbita per ruĝaj makuloj. Kaj Vardan estas vera viro. Li havas bonan fortan



tubon. La Dio benu lin kaj liajn gepatrojn, de kiuj li heredis la tubon. La Dio benu ankaŭ gepatrojn de bofilino – zorgintajn, ke la virgulina membrano de sia filino restu nedifektita”.

- Guste, Bjulbjul, - diris Hakob.
- Donu al mi la kokon Abdul-hamid, - diris Bjulbjul.
- Vi ricevos la kokon, Bjulbjul, - diris Hakob.

Bjulbjul tranĉis kolon de koko, kiam ĝi jam kokerikis kelkfoje. Poste kelkajn gutojn da sango ŝi ŝmiris sur blanka littuko. Kaj ŝi ĝin tenis super fajro de toniro, por ke la sango sekiĝu. Poste ŝi diris:

- Nu, Hakob efendio, pendu littukon sur pordo.

La okan tagon, post tagmeze Vardan iris domon de bopatrino – kunportante la sangulan littukon. La avo de Vardan rakontis al li, kiam li mem edziĝis kun lia avino, du tagojn veturis en azenĉaro, por ke portu la sangulan littukon – montri al bopatrino. Tio estis delonge, multjara tradicio, signo de respekto kaj dankemo: “Jen la littuko, - diris li tiam al sia bopatrino, - jen la pruvo, ke via filino, estis bone edukita. Ŝi estis pura kaj ne tuŝita ĝis edziniĝo”. Kaj lia bopatrino respondis: “Ne eblis alimaniere, bofilo mia. Ja ŝi devenas el bona, deca familio, ĉu ne?”

“Ne ekzistas knabino el pli nobla familio, kiu meritas edziniĝi kun Ĥatisjano”, - diris li tiam.

Poste la bopatrino iomete ploris, flaris la littukon kaj diris al li:

“**Aĉked lujs**” – ĉiam havu bonan vidakrecon, bofilo mia, kaj la Dio benu vin”.

“Mi devos diri la saman al edzino de vilaĝestro, kion tiam diris mia avo al sia bopatrino, - pensis Vardan, - se ŝi flarus la littukon kaj dirus: “Mi sentas odoron de koko”, mi simple devos nei”.

Sur vojo al domo de bopatrino, Vardan renkontis amerikan onklon kaj lian filon, kiu parolis nek turke, nek kurde, nur sciis kelkajn armenajn vortojn.

- Tiu ĉi stultulo, - diris la onklo – montrante sian filon, - tiu ĉi stultulo rezignas edziĝi kun iu knabino de ĉi tiu vilaĝo, kvankam mi diris, ke ili estas la plej bonaj kaj fidindaj knabinoj.

Sep tagoj kaj sep noktoj pasis, ĝis Vardan sukcesis koni sian edzinon.

- Ŝi havas sekiĝitan puton inter siaj femuroj, - diris li al sia patro. Kaj la patro diris:

- Ŝia puto ne estas sekiĝita, filo mia. Vi devos lerte, tenere, paciencie fosi, atingi fundon kaj vi eksentos, kiel rapide la akvoj ekŝprucos.

- Sed nenio okazis, - diris Vardan.

- Tiam vi uzu ŝafan grason, filo mia. Ĉar kie la vojo estas malmola kaj la borilo estas rigida, la bona graso preparos molan vojon al eniro.

Kaj Vardan obeis patron kaj konis edzinon. Kaj ŝi gravediĝis.

- Se ŝi naskus knabon, - diris la avo, - nomu lin Tovma.

Sed okazis tiel, ke Tovma naskiĝis de alia virino, kaj ne de unua edzino de Vardan. Ĉar ŝia viva vojo estis mallonga, tiom mallonga, ke la ciganinoj ektimis – vidante vivan vojon sur ŝia manplato.

La avino Hamest avertis edzinon de Vardan: “Dum gravedeco neniam rigardu spegulon”. Sed Arpine mokis maljuanulinon, ĉar ne amis la avinon kaj enviis ŝian monopolan staton en gerdastano. Ĉar laŭ karaktero Arpine estis memŝatema, kaprica, maldiligenta kaj kun kreskanta gravedeco malestimis siajn hejmajn aferojn kaj ŝuldojn, havis tempon ofte kaj longe rigardi sin en spegulo. Sed pro tio en ŝia interno la nenaskiĝito konis anstataŭ vera patrino la spegulan bildon kaj kuŝis kontraŭe.

- Sin gardu! - Avertis la avino, - vi ne scias kion faras.

- Sed nenio okazus kun mi, - diris Arpine, - ĉar mi pendis du hufferojn antaŭ pordo de nia dormejo kaj metis Biblion ĉe mia lito, pendis ajlojn en ĉiuj anguloj de la ĉambro, ĉirkaŭ mia kolo, kiel vi –

avino. Mi eĉ ŝmiris oleon sur randoj de pordo. Kiel la ĝinoj povas sorĉi mian nenaskiĝitan infanon?

- Almenaŭ pendu vian oran kruceton sur spegulo.
- Sed kun plezuro mi havas ĝin inter miaj mamoj.
- Ĉu inter viaj grasozaj mamoj, tute neplenitaj de lakto?
- Jes, - diris Arpine.

Kaj okazis tiel, kiel devos okazi. Arpine mortis dum akuŝado, post naŭmonata gravedeco, apud infana liteto.

Ŝi mortis, kiam la arboj de lando Hajastano jam delonge estis kovritaj de verdaj folioj kaj la amoza Dio okaze Ĉieliro de Kristo ornamis tutan vilajeton per diverskolora flortapiŝego, por ke ĉiuj, ankaŭ la muzulmanoj, la judoj, la ciganoj kaj la diablokultistoj ĝoju dank'al ĝi. La paseroj sur plataj tegmentoj de Jedi Suo jam proklamis pri la somero.

- Eble la jezdioj pravas, - diris Vardan al pastro Gabriel Hamadjan, - ĉi tiuj malsaĝaj diablokultistoj kredas, ke la lukto inter malbono kaj bono ne estas finita. Kiel mi devos kompreni, ke la volo de ĝinoj en sorĉita spegulo de mia respektinda kaj memorinda edzino estis pli potenca ol la Dia volo?

- Vi ne peku, - diris la pastro, filo mia. - Certe, laŭ Dia volo ŝi mortis, kontraŭ okaze ŝi vivus post akuŝado.

- Sed kial mia filo Tovma mortu kun ŝi?

- Tiu estis ne via filo Tovma, - diris la pastro. - Tiu estis jam mortinta kaj naskiĝita sennoma infano. Kaj certe estas Dia volo, ke vi havu alian edzinon kaj kun ŝi naski alian infanon – nomondan Tovma.

- Ĉu Tovma?

- Jes, Tovma, - diris la pastro.

Post semajno de enterigo Arpine, mortis ankaŭ la praavino. Ĉar ŝi kutimis senmovante dum horoj sidiĝi ĉe toniro, neniu ekrigardis motron de praavino. Simple ŝia kapo estis klinita. Nur vespere, unu el

bovinoj, pasante apud toniro al stalo, per sia skuita vosto batis praavinson, kaj ŝi falis. Hakob ekrigardis tion.

- Ŝia morto delonge estis atendita, - diris la homoj, - ja ŝi travivis cent jarojn.

- Ŝi, certe, ĉagreniĝis, ke mia nepo Tovma naskiĝis jam mortinta, - diris Hakob, - verŝajne, iu diris al ŝi pri tio.

- Sed la pastro diris, ke li ne estis Tovma, - diris Tsovinar. - Tiu estis sennoma infano. Nia Tovma ankoraŭ poste naskiĝos.

## 12.

Ĉi tie aŭdiĝis la fabelista voĉo:

- Estis 1894 jaro – la jaro, kiam en lando Hajastano la tamburistoj kaj heraldoj en ĉiaj sociaj lokoj anoncis de nomo sultano bonajn ŝanĝaĵojn – malmultigo de impostoj por **raisoj** kaj **gjavuroj** – por ĉiuj senkreduloj, kiujn la Alaho, estu benita lia nomo, malbenis eterne. La sultano promesis pli multajn rajtojn pri memdetermino de **miletaj**<sup>58</sup>, de kristanaj vilaĝaj komunumoj. La mjunadioj ĝojante tamburis la promesojn por loĝantaro. La armenoj pagos militan imposton – bedelon por sultano, kiel pagis ĉiam. Ili ne rajtas havi armilon, krom kelkaj armenaj zaptiĥoj, kiuj kun muzulmanaj zaptiĥoj devos zorgi pri ordo kaj paco de miletoj. La sultano por armenoj promesis havi sian reprezentadon en registaro kaj persvadis ĉiujn armenajn perfidojn dum milito en 1877 – 1878 jj., anstataŭigi siajn kaŝitajn rusajn pasportojn je la osmanaj pasportoj. La mjunadioj estis spertaj heraldoj kaj iliaj anoncataj promesoj sonis tiel plezure, kvazaŭ iliaj buŝoj estis plenitaj de mielo.

En vilaĝo Jedi Suo malmultaj homoj komprenis, kion konsideras la sultano, kaj Hakob, poste publika legado, demandis mjunadon:

- Efektive, kion konsideras la sultano?

---

<sup>58</sup> Popoloj /turke/.

- Mi ankaŭ ne scias, - diris la mjunadio.

Kaj tiam Hakob demandis armenon – sciulon pri skribaĵoj – akompanantan mjunadion ĉiam.

- Tio nenion signifas, Hakob efendio, - diris la armeno, - ĝenerale nenion, Hakob efendio.

- Sed devos esti en vortoj de sultano iu senco.

- Nu, certe, - diris la armeno. Ĉu vi iam aŭdis pri Berlina kongreso, Hakob efendio? Mi konsideras kongreson en 1878 jaro.

- Ne, ĉelebio, - diris Hakob.

- Tiam la sultano al kristanaj grandaj ŝtatoj promesis certajn aĵojn, antaŭ ĉio – reformojn. Li promesis liberecon por kristanoj en Osmana imperio, defendon de kurdoj kaj de arbitroj de turkaj postenuloj.

- Sed ni ankoraŭ nenion vidis, - diris Hakob.

- Jes, ĝuste, - diris la kleriĝita armeno.

- Sed kiajn interesojn havas kristanaj grandaj ŝtatoj, se ni ĉi tie pli bone vivus? - demandis Hakob.

- Tute neniajn interesojn, - diris la kleriĝita armeno.

- Sed kial ili serĉas danĝeron pro ni?

- Tio estas nur preteksto, - eksplikis la kleriĝita armeno, - preteksto enmiksiĝi en ĉi tiaj aferoj. Tio estas oportuna por iliaj politikaj intereso. Ĉu vi komprenas?

- Ne, ĉelebio, - diris Hakob, - mi ne komprenas tion.

Poste, en kafejo, la kleriĝita armeno diris al Hakob:

- Por grandaj ŝtatoj la kristanoj estas preteksto, por ke **malsanulon de Bosporo**<sup>59</sup> devigu uzi **iliajn proprajn**<sup>60</sup> lambastonojn, ĉu vi komprenas?

- Ne, ĉelebio, mi ne komprenas tion, diris Hakob. - Kaj kiu estas la malsanulo de Bosporo?

- Vi, pri tio demandu mjunadion, li scias.

---

<sup>59</sup> T.e. Turkio /trad./.

<sup>60</sup> T.e. eŭropajn /trad./.

Sed la mjunadio ankaŭ ne sciis tion.

Dum prediko la pastro diris.

- Ĉiu foje, kiam la sultano anoncas pri reformoj, aranĝas masakron.

- Sed kial pastro? - demandis iu el komunumo.

- Ĉar lin kolerigas sia propra grandanimeco, - diris la pastro. Aŭ li volas kolerigi kristanajn grandajn ŝtatojn, kiujn li trankviligis per sia reforma programo.

- Kaj kiujn ili buĉos?

- Nu, kiujn? - diris la pastro.

En fino de 1894 jaro, en anatoliaj malproksimaj vilaĝoj efektiviĝis masakro, sed ne 7 vilaĝoj aŭ en najbaraj vilaĝoj. La vojaĝantaj armenaj komercistoj rakontis pri tio. Unu el ili diris:

- La kurdoj tranĉas kolojn de armenajn vilaĝanoj, aliuloj brulas vivajn korpojn de armenojn.

- Pri kiaj kurdoj temas? - demandis la pastro.

- Pri la 150000 kurdoj – rekrutigitaj de sultano. Ili nomiĝas **hamidie**<sup>61</sup>. Ĉu vi nenion aŭdis pri ili?

- Ne, - diris la pastro.

- La sultano pagas grandegajn sumojn al kurdaj bejoj por iliaj soldatoj.

- Ĉu la kurdaj bejoj bezonas monon? Kiel?

- Ĝuste tiel, pastro.

- Sed por kiaj celoj la sultano uzas kurdajn regimentojn?

- Mi ĝuste ne scias, - diris la armena komercisto. - Mi supozas, por ke minacadi naciajn minoritatojn kaj verŝajne terurigi grandajn ŝtatojn.

- Vere, malmultaj eventoj okazadis en Jedi Suo kaj en najbaraj vilaĝoj, - diris la fabelisto. - Eĉ en 1895 jaro, kiam la masakro pli vastiĝis, ĉi tie ankoraŭ estis trankvile. La maljuna turka zaptiĥo, kiel

---

<sup>61</sup> Turke.

antaŭe, sidaĉis en kafejo aŭ dormis ekstere sub sunaj radioj, kaj la infanoj gardis lian pafilon – malnovan, ol mem zaptiĥo. La armitaj rajdantoj de Sulejman nur aperadis tiam, kiam necesis pagi la impostojn, sed ili estis trankvilaj, se vilaĝanoj donis postulitan. La turkaj postenuloj venadis, nur kiam bezonis monon. Unu tagon iu komercisto alportis anglan ĵurnalon. Ĝin neniu povis legi.

- Pri kio estas skribita en tiu ĉi ĵurnalo? - demandis la pastro.

- Estas skribita, ke la kurda rajdantaro de hamidieo, buĉis 300000 armenojn, - diris la komercisto. La masakro estis eĉ en grandaj urboj. En Konstantinopolo la mortigitaj armenoj estas falitaj sur stratoj. Kaj en Urfao kurdoj brulis 1000 virinojn kaj infanojn – kaŝitajn en preĝejo.

- Sed tiel ne povas esti, - diris la pastro. - Ĉu vi kredas ĵurnalajn skribaĵojn?

- Jes, diris la komercisto.

- Sed ĉu vi mem per propraj okuloj vidis ion?

- Jes, - diris la komercisto. - Mi vidis veran buĉadon en malgranda urbo. Tie estis kurdaj hamidianoj kaj ankaŭ turkoj.

- Ĉu ili buĉis ŝafojn?

- Ne, ili buĉis armenojn.

Tamen en vilaĝo neniu kredis terurajn sciigojn de armenaj komercistoj. Malmultaj turkaj vilaĝanoj estis amikoj, iliajn vizitantajn geparencojn jedisuanoj delonge konis. Kaj ili estis nek bonaj kaj nek malbonaj ol armenoj, kvankam ne kredis Kriston. Neniu el ili estis murdisto, neniu permesis masakron, des pli bruladon de virinoj kaj infanoj en preĝejo. Kaj eĉ sola turka zaptiĥo en vilaĝo ne esceptis. Li kartludis en kafejo, kiel aliaj viroj, iam ludis **tavla**<sup>62</sup> – ludon kun ĵetkuboj kaj tabulo, drinkis nek multe kaj nek malmulte, fumis la samajn cigaredojn sed iam laŭte furzis, kiam manĝis multe aŭ rapide. La vivo en vilago fluis laŭ sia ĉiutaga ordo, malgraŭ timindaj sciigoj.

---

<sup>62</sup> Turke.

Poste Naskiĝtagaj festoj, kiujn armenoj festas dum januaraj unuaj tagoj, Hakob diris al sia malpliĝa filo:

- Vere, vi pensu pri nova edziĝo. Kiel vi opinias, filo mia? Ĉu mi parolu kun Manuŝak? Ŝi estas sperta perantino en edziĝaj aferoj. Kaj ŝi perantis por via fratino edziniĝi kun riĉa tapiŝvendisto en Bekiro.

Sed Vardan ne deziris helpon de perantino.

La 21-a januaro estis tago de Sankta Sargis – sanktulo protektanta geamatojn. En tago de Sankta Sargis la fraŭloj kutimis viziti Katnaghbjur kaj nutri birdojn. Necesis ĵeti kelkajn panajn peceretojn antaŭ puto kaj atendi, kiam la malsata birdo alflugos, per sia beko kunprenos peceretojn, kaj poste fraŭlo observis ĝin. La direkto de birda flugo estos la direkto de estonta fianĉino. Necesas iri post birdo kaj sendube junulo renkontos sian veran amatinon, kiun atendis ĝis nuna tempo.

En tago de Sankta Sargis Vardan ankaŭ iris Katnaghbjuron – nutri birdojn. Sed li kondutis pli saĝe ol aliuloj. Li preparis kaptilon antaŭ puto, kaptis paseron – prenintan en bekon pecereton, sternis tuketon sur ĝi, tenis, ligis al piedo ringeton kaj poste forlasis flugi. Vardan fidis – observante birdan flugan direkton, laŭ ĝia pieda ringeto li trovos nemalproksime estontan fianĉinon.

En tiu tago Vardan kuradis dum kelkaj horoj tra neĝkovritaj lokoj senĉese sekvante direkton de forfluginta birdo. Posttagmeze li atingis Jaziĝeon. Ĝi estis la plej malgranda el sep vilaĝoj – konsistinta de kelkaj domoj.

La vilaĝeto estis brulita. Du kurdinoj kun diverskoloraj kaptukoj, disfosis ruinojn. Iliaj ĉevaloj ekhenis, kiam Vardan alproksimiĝis.



- Ĉi tie estis hamidianoj, - diris unu el kurdinoj. - La fumon ni vidis de montoj.

- Ĉu iu estas vivanta? - demandis Vardan.

En vilaĝo ĉiuj estis mortintaj. Ne eblis kompreni, kiel la kurdoj mortigis vilaĝanojn: ĉu per pafiloj, ĉu per blankaj armiloj, aŭ ĉu rimede alia diabla maniero? Ĉar mortintojn – virinojn kaj infanojn, kurdoj ĵetis en lignofajron kaj brulis. Ne ĉiuj kadavroj estis karbiĝitaj. Vardan eksciis, ke mankas kapoj kaj seksaj organoj de viroj.

- Ĉu vi vidis, kiel ili faris tion? - demandis Vardan.

- Ne, - diris unu el kurdinoj. - Ni nur vidis la fumon.

Vardan en ruinoj de brulitaj domoj serĉis, sed trovis nenan signon de vivo. La kurdinoj ambaŭ sekvis lin. Pro la malvarma vento iliaj vizaĝoj estis ruĝaj. Ili firme tenis siajn kaptukojn.

Evidente, tiuj kurdinoj estis el montaj duonnomadaj vilaĝoj, kaj nek ili, nek iliaj viroj faris ion kun hamidianoj. Vardan ofte turnis sin al kurdinoj, sed ŝajnis pri nenia malbono ili intencis. Kiam li atingis lastan sepan domon, ekvidis mortintan birdon. Tio estis lia birdo de festo Sankta Sargis. Ĝi estis frostiĝita. La ringeto, alligita kiel diferenca signo, estis sur piedeto.

Subite Vardan aŭdis ian voĉon. La kurdinoj ankaŭ aŭdis mallaŭtan ĝemadon el brulita domo, antaŭ kiu estis falita la mortinta birdo.

- Hieraŭ, ĉi tie la virino estis naskinta infaneton, - diris unu el kurdinoj. - Hieraŭ mi estis veninta ĉi tien, por ke vendi kokon al ŝia edzo.

“La vivo estas miraklo”, - ekpensis Vardan.

La kurdinoj frotis infanon per neĝo, poste sekigis, poste ili ree kaj ree frotis infanon. Unu el ili mamnutris novnaskiĝiton, la alio alportis kovrilon por ĉevalo kaj envolvis infanon.

- Tiu estas knabineto, - diris la mamnutrino. - Ŝin ni kunportos.

Sed Vardan diris:

- Ne. Mi kunportos ŝin.

- Kaj okazis tiel, - diris la fabelisto, - Vardan ĝustatempe iris post birdo de festo de Sankta Sargis – savi la vivon de Anahit, kiu iutage sub brusto devos porti filon Tovma.

La rakonto de Vardan, kaj aspekto de brulita infano, ĉies okuloj nur estis vivplenaj, terurigis ĉion vilaĝon. La homoj fermiĝis en siaj domoj.

La knabineton Vardan enmanigis al pastro Gabriel Hamadjan, kaj li, malgraŭ estas strange, ordonis alvoki kurdinon Bjulbjul, ĉar ŝi, kiel diris la pastro, en sia kabano havas kuracemajn kreskaĵojn, kaj scipovas sorĉi. Kvankam ŝi estas kurdino, havas bonozajn manojn – fidindaj flegi etan armeninon.

La vilaĝanoj kun alarma atendo firme ŝlosis siajn domajn pordojn, ĉar okaze masakro ili nenien povis fuĝi, krom senvojaj altaj montoj, kie ĉiuj kunekun mortos pro malsato kaj frosto en neĝoj kaj glacioj. Sed ĉiu sciis, ke la ŝlositaj pordoj ne estas fortikaĵoj – nevenkeblaj por hamidianoj, do la homoj denove malfermis siajn pordojn, ĉirkaŭrigardante eliris kaj ekokupiĝis per kutimaj aferoj. Estu kio estenda. Neniu nenion povas fari.

- Ni konfidu Dion kaj Jesuon Kriston, - diris la pastro.

- Mi min kaj nian familion defendos per hakilo, - diris Karo – la filo de selisto – decidinta iĝi daŝnako, kiel la bofrato de Vardan – Pesak.

- Tiujn diablojn mi persekutos per forĝista martelo! – diris la filo de forĝisto Avetik.

- Kaj mi prenos mian edziĝfestan glavon, - diris Vardan.

La vilaĝaj turkoj promesis siajn helpojn.

- Ni estas muzulmanoj, - diris Taŝak, - kaj ni rajtas havi armilon. Mi havas malnovan pafilon en stalo. Mi disĵetos cerbojn de tiuj

hamidianaj hundoj. Kiam ili mortos, mi persone disrompos iliajn testikojn.

En kafejo la homoj multe paroladis pri hamidieo. La dormema maljuna zaptiĥo, fiere paŝante tien kaj reen inter tabloj, fumis, laŭte ruktis kaj iam post iam furzis, diris:

- Mi ĉiujn ilin forpelus, se ili venus. Finfine mi estas reprezentanto de leĝo. Tiuj hamidieanoj estas sovaĝaj partizanoj, ne pli bonaj ol la baŝibozukoj. Kaj mi ne scias, kial sultano Abdul Hamid donis sian nomon al tiuj timemaj hundoj?

Sed hamidieanoj ne venis. La sola minaco estis la ŝtorma vento – blovanta de montoj kaj minacanta forporti tegmentojn kun tremolaj traboj, ankoraŭ dum printempa komenco – riveretoj devenitaj pro neĝa degelo kaj fluantaj de montoj, povantaj kunporti kliniĝantajn dometojn. Ĉio estis paca.

La vojaĝantaj komercistoj – venantaj en vilaĝon, kun malfermo de vojo ree alportis belajn silkaĵojn, rarajn ornamaĵojn kaj fruktojn el malproksimaj landoj. Ili diris, ke la tutmonda ĵurnalaro bruegis, certe, pro armenoj.

Hakob demandis unu komerciston, kial la tutmonda ĵurnalaro ne helpas armenojn? La komercisto respondis:

“La ĵurnaloj konsistas de papero kaj presa farbo, kaj la literoj estas ĝiaj mizeraj soldatoj, kiuj nenion helpas, krom grandulojn kaj potenculojn, de ĉies nomoj presiĝas ĉio – krianta tra la tuta mondo. Ili ne estas pli bonaj, ol unusonaj false adoremaj krioj de heraldoj en Bekiro.

Ankaŭ Jedi Suon alvenis aliaj multaj komercistoj – rakontantaj pri diversaj aĵoj. Kiam maturiĝis la moruso, jam oni nenion parolis pri hamidieanoj, ĉar la sultano ilin sendis Arabujon. La rusoj, kiel diris la komercistoj, la hamidieanojn konsideras kurdajn kozakojn kaj atendas, ke dum estonta milito ĉi tiuj partizanoj unuiĝos kun rusoj. La homoj diris, ke la caro ĝis rusa limo al aghaĵoj kaj bejoj promesis

“orajn montojn”, ankaŭ aliajn bonaĵojn – pli bonajn armilojn por rajdantoj, pli bonajn ĉevalojn, felajn ĉapojn, orajn rublojn, virinojn kaj aliajn rabaĵojn. La komercistoj ridis, trankviligis vilaĝanojn kaj konsilis tute ne timi kaj aĉeti necesajn aĵojn, ĉar la masakraj tempoj fine forpasis. La komercistoj asertis vilaĝanojn, ke estos pli saĝe eligi orajn monerojn el ŝuoj, el vatitaj jakoj, el kavoj en staloj, el kampaj kaŝejoj kaj elspezi – aĉetante silkaĵojn, belajn ornamaĵojn, fruktojn. Unu el komercistoj demandis:

- Hakob efendio, ĉu vere, ke via malpliaĝa filo veturos Amerikon?
- Kiu diris al vi? - demandis Hakob.
- La poŝtisto, kiu en mia ĉaro veturis.
- Sed la poŝtisto kiel sciis pri tio?
- Mi supozas, ke li legis leteron estintan en sia saketo.
- Ĉu vi konsideras leteron – ricevitan de Ameriko, de mia frato

Nahapet?

- Ĝuste tion mi konsideras.
- Nahapet nedelonge ĉeestis ĉi tie dum edziĝfesto, - diris Hakob,
- kun sia pliaĝa filo – stultulo, neparolanta armene.
- Kaj ĉu via frato volas vian filon – Vardan, alkonduki Amerikon?

Ĉu tiel estis skribita en letero?

- Jes, tiel estis skribita en letero, - respondis Hakob kaj poste daŭris. - Mi donis al poŝtisto multan drinkmonon, por ke li ne malfermu niajn leterojn.

- Sed la poŝtisto diris al mi, ke vi donis baĥŝiŝon, por ke li alportu poŝton ĝustatempe. Vi eĉ ne parolis pri malfermo de leteroj.

- Tio povas esti, - diris Hakob. - Diablo prenu poŝtiston. Por mi estas tute egale, ke li scias, pri kio skribas mia frato. Tio ne estas sekreto. Kaj por la sultano ankaŭ estas tute egale, ĉu mia frato allogas mian filon aŭ ne? Mi konsideras vojaĝon al Ameriko.

- Kaj okazis tiel, - diris Meddah. - La amerikana onklo serioze pripensis pri propono alkonduki Vardan Amerikon. Vardan ne rezignis, ĉar post masakro de vilaĝo Jaziĝie plu ne deziris resti en Hajastano.

En 1897 jaro, aŭtune, alvenis vilaĝon stranga homo – metinta grandan ĉapelon. Li diris, ke alveturis el Ameriko, alportis monon de frato Nahapet, kaj la mono estas por malpliaĝa filo de Hakob. Li, vere, alportis monon – kaŝinte en rando de granda ĉapelo.

- Mi memoras, - diris Meddah, - kiel Hakob kalkulis monon kaj poste diris:

- Ĉi tiu mono ne sufiĉas por tia kara vojaĝo.

- Ĉi tie estas precize la duono, - diris la amerikano.

- Kiel?

- Tiel, - respondis la amerikano, kiu kvankam metis ĉapelon, sed origine estis el Hajastano kaj daŭris paroli, kiel paroladas la lokanoj, kaj li inspiris fidon. Liaj mimikoj kaj gestoj estis lokaj. - Jen tiel, Hakob efendio. Tiu ĉi mono sufiĉos por ŝipa duonbileto.

- Ĉu per ŝipa duonbileto eblas veturi ĝis Ameriko? - demandis Hakob?

- Ne, - diris la amerikano.

- Do, mia filo pasos duonon de vojo kaj poste foriros el ŝipo. Sed kiel mi scias, la homo ne povas foriri el ŝipo sur mezloko de oceano.

- Ne, - diris la amerikano, - Vardan devos preni monon, kaj restan kvanton vi devos trovi. Via ruza frato diris, ke vi devos fosi korton kaj eligi orajn monerojn. - Kaj la amerikano, la tute ne vera amerikano, montris korton, kie kuradis anseroj, gekokoj kaj anasoj.

- Do, ĉu mi devos fosi ĉi tie kaj elegi?

- Jes, - diris la amerikano.

Kaj Hakob fosis kaj eligis ceterajn orajn monerojn, donis al sia filo, kiu printempe en 1898 jaro forveturis Amerikon. Hakob en azenĉaro lin alkondukis Bekiron: de ĉi tie li daŭris vojaĝon kun karavanoj de greka, armena, juda komercistoj, kies ĉarojn defendis akompanantaj zaptiĥoj. Kiam Vardan atingis Konstantinopolon, lin jam atendis kelkaj onkloj kaj onkloinoj, kiujn li tute ne konis. La granda urbo

timigis lin, kaj feliĉe la ĉiu armeno ĉie havas geonklojn – zorgantajn pri li. Vardan vivis ĉe geparencoj kaj kiuj, en forvetura tago, lin alkondukis havenon, kiu lin pli timigis, ol la granda urbo.

Vardan ne sciis, ke la fabelisto staras apud si, sur supra ferdeko. Li ne vidis ankaŭ, kiam la fabelisto desaltis malsupren, kiam la ŝipa fumtubo forsendis al ĉielon grandan kvanton da fumo, la ŝipo forĵetis vaporon kaj fajegis, kiel signo de forveturo. Kiam la fabelisto desaltis malsupren, la ŝipo ekstremis stimulate de ŝvitozaj hejtistoj – ĵetantaj per fosiloj ŝtonkarbon en fornego de vaporaj kaldronoj. Kiam la ŝipo malproksimiĝis, la fabelisto ne volis atingi ĝin kaj malaperis en tempo. Sed iutage li denove elnaĝis el 1899 jaro, por ke ensalti en novan jarcenton.

FINO DE LA DUA LIBRO



EREVANA ŠTATA UNIVERSITATO  
INSTITUTO DE ARMENSCIENCAJ  
ESPLORADOJ

Նկարչ. ձևավորումը՝	<b>Գ. Վ. ՄԱՐԻԿՅԱՆ</b>
Համակարգչային ձևավորող՝	<b>Կ. ՉԱԼԱԲՅԱՆ</b>
Տեքստը հավաքել է՝	<b>Մ. ՀԱՐՈՒԹՅՈՒՆՅԱՆ</b>
Սրբագրիչ՝	<b>Հ. ԴԱՆԻԵԼՅԱՆ</b>
Խորհրդական՝	<b>Է. ՏԱՆՏԻՆԻ (ԻՏԱԼԻԱ)</b>

Ստորագրված է տպագրության՝ 21.03.2017:

Չափսը 60/84 <sup>1</sup>/<sub>16</sub>: Տպ. մամուլը՝ 11:

Տպաքանակ՝ 100:

ԵՊՀ հրատարակչություն, Երևան, Ալ. Մանուկյան 1

**EDGAR Hilzentar**  
**LA FABELO DE LA LASTA PENSO**  
**ROMANO**  
**LIBRO DUA**

Desegna dekoracio –	<b>G.V. MARIKJAN</b>
Komputila decoracistino –	<b>K. ĆALABJAN</b>
Tekston enkomputilis –	<b>M. HARUTJUNJAN</b>
Korektistino –	<b>H. DANIELJAN</b>
Konsilistino –	<b>E. TANTINI (ITALIO)</b>

Eldonkvanto – 100.

Eldonejo EŠU, Erevan, A1. Manukjan 1